

EL POPOLA CINIO

人民中國報道

6 · 1964





Ferbovoj Elstaliĝas.

Foto de Tang Moŭlin

一九六四年北京科学讨论会

THE 1964 PEKING SYMPOSIUM
LE SYMPOSIUM DE PEKIN DE 1964
EL SIMPOSIO DE PEKIN DE 1964



Nie Jonggen, vicĉefministro de la Ĉina Popola Respubliko varme salutas en la nomo de la ĉinaj registaro kaj popolo dum la inaŭgurado de la 1964-a Pekina Simpozio. Foto de Li Gilu

Nova Mejlŝtono de Sciencita Disvolviĝo

KE JAN

PEKINO, kie leviĝis ĉijare la standardo de revolucio en la kampoj de kulturo kaj arto, samtempe enskribiĝis la komenco de nova epoko en la monda historio de sciencoj. En la ŝaŭmantaj ondegaj de la teatra movado prezenti la Pekinan Operon kun revoluciaj nuntempaj temoj, okazis ĉi tie la historie senprecedenca 1964-a Pekina Sciencita Simpozio, en kiu partoprenis sciencistoj el Azio, Afriko, Latinameriko kaj Oceanio.

Dum la Simpozio, kiu daŭris 11 tagojn ekde ĝia inaŭguro en la 21-a de aŭgusto, 367 sciencistoj el 44 landoj kaj regionoj interŝanĝis spertojn kaj rezultojn de sciencita esplorado, serĉis la ĝustan vojon disvolvi sciencajn laborojn kaj akceli socian progreson sub malsamaj kondiĉoj de la diversaj landoj kaj plifortigis la amikecon kaj kunlaboradon inter ili. Ĝuste kiel la sciencistoj montris: Tio estas, kiel diris iuj el la partoprenintoj, la nova deira punkto por ĉiuj popoloj en la kvar kontinentoj disvolvi memstare siajn proprajn sciencojn kaj kulturon, la mejlŝtono sur ilia vojo por atingi paŝopostpaŝe la nivelon kiun havas la progresintaj landoj en sciencoj kaj kulturo.



ALTA NIVelo DE SCIENCIOJ

Riĉaj estas la sciencaj rikoltaĵoj atingitaj de la Simpozio kaj multaj el ili estas altnivelaj. 299 disertaĵoj estis en ĝi legataj kaj diskutataj, kiuj montris

grandan disvolviĝon en diversaj sciencaj sferoj de la landoj en la kvar kontinentoj. Manifestiĝis ke en la regiono nova prosperiĝo komenciĝis ĉu en esplorado de la fundamentaj sciencoj aŭ de la fakaj teknikaj sciencoj.

La sciencistoj el diversaj landoj, tute konforme al la kondiĉoj kaj la bezonoj de siaj propraj landoj, sukcese akiris multe da esploraj rezultatoj kiuj faras gravan kontribuon al agrokulturo, industrio, medicino kaj higieno. Iliaj disertaĵoj koncernis la agronomajn problemojn de plantaĵoj, grundo, sterko, plantoprotektado, bestobredado, bestokuracado, akvaj produktoj, forstumo, silkokulturo, agrokulturaj maŝinoj, agrokultura ekonomio k. c., la esploradon pri la nuntempaj industriaj teknikoj de elektroniko, metalurgio, mekaniko, kemio, ŝpinteksado, civila konstruado k. c., kaj la diversajn fakojn de medicino, farmakologion, fiziologion, biokemion k. c. Multaj sciencistoj ankaŭ prezentis siajn valorajn opiniojn pri matematiko, fiziko, kemio, biologio, geologio, meteorologio k. a. Tiuj ĉi esploraj rezultatoj ne nur riĉigis la teorion de sciencoj, sed ankaŭ ludas gravan rolon por diversaj landoj en disvolvado de la industriaj kaj agrokulturaj produktoj kaj plibonigado de la vivo kaj sano de la popolo.

Ankaŭ filozofoj kaj socisciencistoj diskutis en la Simpozio multe da gravaj problemoj, kaj interalie estis elmetitaj diversaj disertaĵoj en la kampoj de



Supre maldekstre:

Lin Kiaŭĝi, ĉina medicinistino (la dua de maldekstre) interparolas kun Dr. Ruben Rodríguez Gavaldá (la unua de dekstre), sekretario de la Medicina Asocio de Kubo, kaj J. W. Kibukamusoke (la dua de dekstre), prezidanto de la Orient-Afrika Medicina Esplora Konsilantaro.

Foto de Ĝang Hesong

Sube maldekstre:

Ĝoŭ Pejĵuan (la unua de dekstre), ĉina sciencisto parolas kun sciencistoj el Sieraleono kaj Dahomeo.

Foto de Kian Sigi

Supre dekstre:

Sciencistoj el Afganio, Nigerio, Sirio, Vjetnamio, Indonezio, Jordano k. a. partoprenantaj la Simpozion rigardas al la de Ĉinio memfarita grandtipa Universala Cifera Elektronika Kalkulilo de la Ĉina Scienca Akademio, akompanate de Hua Luogeng, fama ĉina matematikisto (la tria de maldekstre).

Foto de Li Gilu

Sube dekstre:

Sciencistoj el Burundio, Ĉilio, Somalio, Ganao k. a. partoprenantaj la Simpozion vizitas la Pekinan Agronomian Universitaton. Ili rigardas al X-radiaparato de ĝia veterinara fakultato.

Foto de Tang Likuj

filozofio, historio, politiko, jurscienco, ekonomio, edukado, lingvistiko, literaturo k. c. Tiuj disertajoj montris ke multaj sciencistoj faris grandan kvanton da esploroj en serĉado de la vero por naciliberigo kaj progreso de la homa socio, kaj eksplikis la socian signifon de laboroj de la sciencistoj. Nombro da disertajoj malkaŝis la esencon de la ekonomia kaj kultura agresoj fare de la imperiistoj kaj la novaj kaj malnovaj koloniistoj, diskutis la vojon por konstrui per siaj propraj fortoj memstarajn naciajn ekonomion, sciencon kaj kulturon, kaj klare montris ke la sciencoj kaj kulturo de iu ajn nacio povas esti disvolvigitaj nur post kiam ĝi sin liberigis de la katenado de imperiismo kaj kiam la ekonomiaj ŝlosiloj,

nacidefenda forto kaj sciencoj kaj kulturo, estas en la manoj de la popolo.

TUTE NOVA STILO

La Simpozio pleniĝis je la spirito de egaleco, amikeco, kaj favora atmosfero por libera diskutado, interŝanĝo de spertoj kaj reciproka lernado kiuj sin prezentis ne nur en la prezidado de la kunvenoj sed ankaŭ en la tuta diskutado de la sciencaj problemoj. Ĉi tie ne troviĝis tiaj maljustaj kiaj en la internaciaj sciencaj kunvenoj okazintaj en la tiel nomataj landoj de civiliziteco kie oni kutimas senigi iujn sciencistojn je parolrajto, malpermesi al iuj aliaj fari disertadon, eĉ devigi tiujn kun malsama haŭta koloro

forlasi la t. n. "civilizitajn" landojn. La prezidantaro de la Pekina Simpozio konsistis el reprezentantoj senditaj po unu persono de la respektivaj delegacioj kaj ĝian plenuman prezidantecon de la kunvenoj prenis laŭvice la diverslandaj reprezentantoj.

La sciencistoj partoprenintaj en la Simpozio havis la liberecon paroli ĉion kion ili volas en la kunvenoj, kaj sin tenante je respektado al la sciencaj laboroj, sincera studo kaj serĉado de la vero, ili kondukis seriozajn diskutojn, kiuj ebligis ke multaj el la rezultatoj de scienca esplorado estas diversflanke kompletigitaj kaj disvolvitaj, multaj sciencaj pensoj estas riĉigitaj kaj plialtigitaj. Kun sia atmosfero de amikeco kaj libereco, demokratio en diskutado, kun siaj vere scienca spirito kaj sinceraj interrilatoj, la Simpozio donis bonan ekzemplon por internaciaj simpozioj de sciencoj.

Ĉiuj sciencistoj laŭdis unuanime la tute novan stilon de la Simpozio. Kularb Saipraditt, ĉefo de la Delegacio el Tajlando, emfaze laŭdis, en la nomo de sia Delegacio, "la Simpozion pro ĝia atmosfero de demokratio, egaleco kaj amikeco". Ankaŭ D-ro S. Bankole Akpata de la Nigerlanda Delegacio diris: "Unu el plej grandsignifaj karakterizoj de nia Scienca Simpozio estas ke ĉie regas la spirito de egaleco, reciproka estimo kaj kunlaboremo. Tio estas grava ĉapitro en la historio kaj evoluado de la sciencoj."

ARDAJ DEZIROJ

Por pliapeŝe firmigi la interrilatojn, interŝanĝi novajn rezultatojn de scienca esplorado, por akceli nacian liberigon kaj sendependiĝon, disvolvi la nacian ekonomion kaj kulturon, la sciencistoj el diversaj landoj unuvoĉe konsentis pri okazigo de alia scienca simpozio en 1968 en Pekino, kaj esperas ke dum la venontaj kvar jaroj de 1965 ĝis 1968, estu okazigataj en iuj landoj sciencaj simpozioj pri apartaj sciencaj fakoj aŭ temoj. Ĉiuj sciencistoj esprimis



Jagus (la unua de dekstre), indonezia sciencisto el kamparana origino vizitas rizkampon de la Ruĝstelo-popolkomunumo en akompano de nia kamparana agronomo Ĉen Jongkang (la dua de dekstre).

Foto de Tang Likuj

tian ardan deziron. J. A. Grant-Mackie, ĉefo de la Novzelanda Delegacio diris: "Ni arde atendas la okazigon de la Dua Pekina Scienca Simpozio." La ĉefo de la Japana Delegacio, specialisto en abstrakta fiziko, profesoro Ŝoiĉi Sakata diris: "Ni sincere bonvenigas alian simpozion de multfakaj sciencoj, kiu okazos en 1968 en Pekino."

La 1964-a Pekina Scienca Simpozio "fariĝos eterna monumento por firmigi pacon, fortigi kunlaboron kaj akceli plibonon interkomprenon de la homaro, kaj estos enskribita en la historio".

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

KOLOMB-KONKURSO DE 1,900 KM.

1,900-kilometra kolomb-konkurso estis aranĝita en julio. La flugado komencis de Hining, ĉefurbo de Ninghia-regiono en la Nord-okcidento kaj haltis ĉe Ŝanhajo en la orienta parto de Ĉinio. Partoprenis 121 kolomboj. La venkinta estis la kolombo "Nigra Pluvero" bredita de unu aŭtobusokonduktoro en Ŝanhajo. La kolombo traflugis la tutan longon per 240 horoj kaj 15 minutoj.

KOR-PULMA MAŜINO PRODUKTATA EN ĈINIO

Ŝanhaja II-tipa kor-pulma maŝino nun estas are produktata en Ĉinio. La unua estis produktita en 1957, kaj estas uzita por pli ol 50 malsanuloj en la Ŝanhaja Hospitalo de Brustomalsanoj. Ĝi anstataŭis la korfunkcion de unu ĝis du horoj.

Depost 1958, en Ĉinio estis desegnitaj kaj produktitaj pli ol cent specoj de novaj medicinaj aparatoj kaj maŝinoj. Kor-pulma

maŝino estas unu el la plej rimarkindaj.

ESPLOROJ PRI KORTBIRDOJ

Ĉinaj sciencistoj de la Esplora Instituto de Kortbirdoj komencis antaŭ kvin jaroj ĝeneralajn esplorojn pri ĉinaj kortbirdoj. Nun la esplorado estas finita.

Bazita sur la longa esplorado, 16 bonaj specoj kun alta ekonomia valoro estas rekomenditaj por vasta bredo en Ĉinio, kaj 30 aliaj bonaj specoj por taŭgaj regionoj.

La Unua Generacio de Novaj Kamparanoj de Ĉinio

EN la nova Ĉinio, estas pli kaj pli multe da intelektaj gejunuloj kiuj partoprenas agrokulturan konstruadon en la kamparo ek de la lastaj jaroj. Nun ilia nombro jam superis 40,000,000 personojn. Antaŭ kelkaj jaroj, la plejmulto el ili estis gradigitoj de superaj elementaj lernejoj, sed en la lastaj jaroj, sekve de la bezonoj en la agrokultura konstruado kaj la disvolviĝo de la kulturaj kaj edukaj aferoj, pli kaj pli multe da gejunuloj diplomitaj el mezgradaj lernejoj kaj universitatoj ankaŭ viciĝis inter la konstruantoj de agrokulturo.

Granda nombro da urbaj gejunuloj, subtenate de siaj gepatroj, jam iris sur montojn aŭ en kampojn por fariĝi agrokulturistoj. Ekzemple, Van Li, vicurbestro de Pekino, sendis sian filon Van Boaŭ al farmo por fariĝi kamparano. Ankaŭ multaj profesoroj, generaloj, veteranaĵ funkciuloj, inĝenieroj,

pentristoj, famaj verkistoj kaj aktoroj sendis siajn gefilojn al la kamparo por longe labori tie. Tiuj intelektaj junuloj hardiĝis kaj kreskis en la kamparo kaj jam fariĝis grandaj fortoj por la agrokultura modernigo.

INTELEKTAJ GEJUNULOJ BEZONATAJ EN LA KAMPARO

Post la agrara reformo kaj la kolektivigo de agrokulturo en la ĉina kamparo, la agrokultura produktado multe disvolviĝis. Dank' al sukcesa plenumiĝo de la du Kvinjaraj Planoj la kamparo jam estas provizita per granda nombro da agrokulturaj maŝinoj, ekipaĵoj de elektraj drenado kaj irigaciado, kemisterko kaj insektomortigiloj. Kaj la realiĝo de popolkomunismo kreis tre favorajn kondiĉojn por grandskala konstruado fundamenta kaj racia uzado de la tero.

Lang Juhui, profesorino de la Siĉuan-a Konservatorio kaj reprezentantino de la Tutlanda Popola Kongreso adiaŭas sian trian filon irontan al laboro en kamparo. Foto de Gin Hjuki



La ĉina agrokultura mastrumado alfrontas novan taskon — la taskon de agrokultura modernigo. Ĝuste pro tiu bezono intelektaj gejunuloj partoprenis la agrokulturan produktadon.

En la pasinteco, la malnova Ĉinio suferis de la feŭda regado dum pli ol du mil jaroj kaj de la subpremado fare de imperiismo dum pli ol cent jaroj; kaj pro tio la plejparto de ĝiaj kamparanoj estis analfabetaj, la kultura nivelo en la vilaĝoj estis terure malalta. Post la Liberiĝo, kvankam la edukaj aferoj multe disvolviĝis, tamen estas neeble ŝanĝi radikale en mallonga tempo la antaŭan fizionomion de post-resteco. Tial ne nur granda nombro da teknikaj laborantoj estas ege bezonataj en kultivado de plantoj, sterkoprodukto, grundoplibonigo, akvoutiligo, bestobredado, kulturado de fruktarboj, fiŝkaptado ktp., sed ankaŭ multegaj intelektaj gejunuloj estas bezonataj en universala klerigado, kaj disvastigo de sciencaj konoj, alie tute nerealigebla estas la modernigo de agrokulturo. La intelektaj gejunuloj pli kaj pli bone komprenas, el la disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj dank' al la edukado de la lernejoj kaj de la socio, ke la agrokulturo estas la bazo de la nacia ekonomio, se la agrokulturo ne estus modernigita, la problemoj pri manĝo, vesto kaj ĉiutagaj necesajoj por 650,000,000 popolanoj ne povas esti tute solvitaj, por ne paroli, kompreneble, pri konstruo de nova Ĉinio prospera, riĉa kaj potenca. Ili ankaŭ vidis ke la partopreno de intelektaj junuloj en la agrokulturaj laboroj kreas kondiĉojn por elimini la diferencojn inter cerbaj kaj korpaj laboroj, inter la urbo kaj kamparo kaj inter la laboristoj kaj la kamparanoj. Tial ili ĉiuj memkonscie iras en la kamparon.

LA FREŝFORTA TRUPO EN AGROKULTURA PRODUKTADO

Tiu ĉi armeo da intelektaj gejunuloj por agrokultura produktado, veninte en la kamparon, tuj

manifestis sian grandan forton. Ekde la jaro 1962 la ĉ. 300,000 gejunuloj partoprenantaj la konstruadon de ŝtataj farmoj sole jam nove konstruis aŭ pligrandigis 751 ŝtatajn farmojn de agrokulturo, forstigado, bestobredo kaj fiŝkaptado, konstruis laboristajn loĝdomojn kun plankareo de 900,000 kvadrataj metroj, kultivebligis pli ol 1,000,000 muojn* da virga tero, produktis por la ŝtato grandan kvanton da greno, kotono kaj oleo, kaj pligrandigis la forstoareon je pli ol 340,000 muoj kaj la kulturejon de markreskajoj je pli ol 550,000 muoj.

Multaj gejunuloj ankaŭ establis en la kamparo grupojn por scienca esplorado. Ili forte akcelis plialtigon de la agrokultura produktivo per kombinado de sciencaj kaj kulturaj scioj kun la tradicia sperto de la maljunulaj kamparanoj en la sferoj de selekto, elkulturo de novaj specioj, planto-kulturo, vegetaĵo-protekto, grundo-rebonigo, meteorologio, bestobredo, kulturado de fruktarboj, fiŝkaptado ktp. Ekzemple, en la produkta brigado de Fenghuo-komunumo en Likjuan-gubernio, Ŝenhi-provinco estas pli ol 60 gejunuloj revenintaj el lernejoj dum la lastaj jaroj, kiuj fervore sin okupis pri sciencaj eksperimentoj, elkulturis frumaturan specion de kotono kaj solvis la kernan problemon ebligi al la tieaj kampoj produkti kaj tritikon kaj kotonon en unu sama jaro. Per apliko de sciencaj metodoj ili kreis sur siaj eksperimentaj kampoj por riĉa rikolto la rekordon de alta grena produktado de pli ol 500 kg. po muo en 5 jaroj sinsekvaj, t. e. ĉ. unuoble pli multe ol la mezkvanta pomua produkto en la sama loko.

En la gubernio Jangi, Gilin-provinco estas pli ol 1,300 gejunuloj kiuj aliĝis al pli ol 200 grupoj por agronoma esplorado, krome aliaj pli ol 10,000 junuloj sin okupas ankaŭ pri simplaj sciencaj eksperimentoj, kaj iuj el ili jam atingis grandajn rezultatojn en

* muo = ses kaj du trionoj da aroj.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

4,500 TEKNIKAJ PLIBONIGOJ

En la plej granda industria urbo Ŝanhajo de orienta Ĉinio pli ol 4,500 teknikaj plibonigoj estis aplikataj en la unua duono de la jaro, laŭ nekompleta statistiko de 270 fabrikoj de la industrioj maŝinfabrika, kemia kaj malpeza. La plibonigoj inkluzivas tiujn de ekipaĵoj kaj laboriloj, mekanikigojn de manipuloj, plibonigojn de strukturoj de produktaĵoj, kaj novajn artojn kaj teknologion por multflanka utiligo de krudaj materialoj.

PLI DA TRAKTOROJ EN LA NORDOKCIDENTO

Pli ol 200 novaj traktoroj (laŭ la normo po 15 ĉeval-povoj) estas asignitaj al la ŝtataj farmoj kaj ŝtataj traktorstacioj en la Ninghia-a Huj-a Aŭtonoma Regiono en la Nordokcidento de Ĉinio, komence de tiu ĉi jaro.

La aŭtonoma regiono estas fondita por huj-nacio (islamanoj) en 1958. Nun ĝi havas pli ol 1,000 traktorojn, kaj traktorstacioj estis fonditaj en la plej parto de ĝiaj gubernioj.

EROZIO REDUKTITA

Erozio estas granda problemo en la nordokcidenta altebenejo de Ĉinio, inkluzive parton de Interna Mongolio. En areoj suferantaj de serioza erozio, preskaŭ unu centimetro de la supra tero estis forportita de akvo ĉiujare. Tiu procezo nun estas reduktita en Interna Mongolio dank' al laboroj de la popolaj komunumoj.

Dekmiloj da deklivaj kampoj en Interna Mongolio estas reformitaj en ŝtupajn depost 1958, kaj la rikolto de tiuj kampoj altiĝis je 50% ĝenerale ol antaŭe.



Supre:
*Junaj intelektuloj de la korea nacio en Gilin-provinco laboras super
 scienca eksperimentado pri rizo en popolkomunumo.*
 Foto de Liu Entaj

Sube:
*Fininte la lernon en gimnazio mongola knabino Tang Gujkin la-
 boras nun kiel bredistino de iu farmo ĉe Pekino.* Foto de Naji

kultivado de rizo, reproduktado de ŝafoj, konservado de akvo kaj grundo, kaj fariĝis avangardaj eminentuloj de la lando, 28 gejunuloj en Ŝandong-a Filio de la Akademio de Agronomio pro siaj elstaraj atingoj en la esplorado.

Ankaŭ en la agrokultura mekanikigo, ili estas unu el la grandaj fortoj. Ekzemple, Ŝandong-provinco tute ne havis, antaŭ la Liberiĝo, modernajn agrokulturajn maŝinojn, kiaj traktoro, kombajno, k. c., sed nun en ĝi jam funkcias pli ol 7,000 normaj traktoroj kaj pli ol 28,000 maŝinoj por drenado kaj irigaciado, el kies manipulantoj la plejparto, kaj el kies riparistoj nemalmultaj estas junaj intelektuloj. Nuntempe, junaj intelektuloj laborantaj en la traktoraj, drenirigaciaj, semaj kaj tekniko-disvastigaj stacioj tra la tuta lando okupas pli ol 80% de la tuta personaro.

**DISSEMANTOJ DE LA SCIENCAJ
 KAJ KULTURAJ SCIOJ**

La intelektaj gejunuloj estas ne nur aktivaj partoprenantoj en teknika reformado kaj sciencaj eksperimentoj en la kamparo, sed ankaŭ propagandistoj en ĝi pri la novaj pensoj kaj kulturo. Ili fervore diskonigas al la kamparanoj sciencajn kaj kulturajn sciojn, propagandas socialisman ideologion kaj helpas la vastan amason de kamparanoj, precipe la gejunulojn paŝon post paŝo suriri la vojon al klereco. En Baŭdi-gubernio, Hebej-

Post kultivado ili redaktas murgazeton por vigligi kulturajn kaj amuzajn aktivadojn. Foto de Deng Ziĉang



Junaj intelektuloj el urboj fiksloĝiĝis en la Farmo de Ĉangli, Hebej-provinco.

Foto de Vang Hjudong



provinco, aldoniĝis 15,000 intelektaj gejunuloj dum la lastaj jaroj, kaj ili fondis tie 698 ĵurnalolegajn grupojn kaj 378 popolajn lernejojn.

La intelektaj gejunuloj en la kamparo hejmen revenintaj aŭ venintaj el la urboj multe plivigligis la kulturalan vivon de la vilaĝoj. Ili establis multe da postlaboraj teatraj grupoj, kluboj, legejoj kaj bibliotekoj por disvolvi vaste kulturajn kaj amuzajn aktivecojn en sia libertempo, ke multaj junuloj eĉ verkis literaturaĵojn surbaze de sia sperto en la kampaj laboroj kaj iliaj verkoj ĝuas varmajn akceptojn ĉe la kamparana amaso.

Dum scienca esplorado en eksperimenta kamparo.

Foto de Vang Hjudong




LA GENERACIO DE NOVAJ HOMOJ

Tiuj junaj intelektuloj ĉiuj elkulturiĝis post la Liberiĝo. Ili ricevis jam en siaj elementaj lernejoj la edukon de "5 amoj", t. e. amo al la patrujo, amo al la popolo, amo al laboro, amo al scienco kaj amo al la publika havaĵo. Dum la periodo por studo de la elementa lernejo ĝis universitato, ili, krom ofta partopreno en fizikaj laboroj por la socia komuna bono en kaj ekster la lernejo, ĉiujare iras al fabrikoj aŭ vilaĝoj por korplabora hardiĝo en difinita periodo. "Laboro" estas konsiderata kiel formala objekto de lernado. "Edukon kombini kun la produkta laboro kaj kulturi la gejunulojn en klerajn laborulojn kun socialisma konscio" jam fariĝis la gvida principo de edukado por ĉiuj lernejoj en nova Ĉinio.

Ankaŭ en la socio nuntempa oni faris vastan propagandon kaj edukadon por forlavi la ideologiajn malpurajojn restigitajn de la malnova socio, kiaj mal-laboremo kaj malestimo al laboro kaj laborulo, kaj multe klopodis por starigi la novan moron rigardi la laboron glora afero.

Ĝuste pro ĉio ĉi tio, la vasta amaso de intelektaj gejunuloj rigardas partoprenon en agrokultura laboro kiel gloran, heroan aferon kaj la kamparon kiel vastan terenon por disvolvi sian kapablon en servo al la socialisma konstruado de la patrolando.

La unua generacio de ĉinaj novaj kleraj kamparanoj kun socialisma konscio nun rapide kreskas. Kvankam ilia nombro estas malmulta kompare kun la tuta nombro de 500,000,000 kamparanoj en Ĉinio, tamen tia ŝanĝiĝo havas signifon netakseble grandan kiu fariĝos ĉiam pli klara en la estonteco.



Huang Genpin, juna intelektulo nun fariĝis vicedstro de la Forsta Centro en Jan-an.

Foto de Lancaŭ

Ni Estas Jan-an-anoj

LIU JE

EN Jan-an, la sankta urbo de revolucio, kie mi renkontiĝis kun multaj gejunuloj parolantaj diversajn dialektojn. Kiam mi demandis de kie ili venis, preskaŭ ĉiu el ili respondis kun fiero: "Mi estas Jan-an-ano."

Tiuj junuloj, en efektiveco, estas alvenintaj al Jan-an nur en la lastaj jaroj el ĉiuj partoj de la lando por partopreni la konstruajn laborojn.

AL JAN-AN

En la somera libertempo de 1962, Ĉen Gigang, jusdiplomito el Akvoutiliga Fakultato de la Ŝenhi-a Politeknika Universitato, alvenis al Jan-an kun ĝojo, ĉar lia dumlonga revo nun realiĝis.

En 1958, li venis en Jan-an por produkta praktikado. Vidinte ke la vasta loesa altebenajo de norda Ŝenhi-provinco, suferas de terura grunderozio, li decidis transformi la naturan kondiĉon de tiu regiono per sia lernita scio. Post kvar jaroj, li efektive alvenis al Jan-an. Multe da tie-loĝantoj lin invitis kun varma sento al siaj hejmoj, intime interbabilis kun li kaj lin kuraĝigis dirante: "Bona junulo, nia loko ja bezonas tiajn junulojn kia vi!"

VASTA TERENO

La konstruaj laboroj en Jan-an prezentis vastan terenon por la trupo da junaj intelektuloj ke ili disvolvu siajn kapablojn.

Apud Janhuj-kanalo, mi renkontis diplomiton el la Fakultato de Akvoutiliga Konstruado de la Nordokcidenta Agrokultura Instituto, nomatan Hu Gjutian. Jam en 1953, li venis al Jan-an kaj partoprenis la projektadon, esploradon kaj konstruadon de ok mezgrandaj kanaloj. En la printempo de 1958, li fariĝis la unua teknikisto por la konstruado de Janhuj-kanalo kiu longas 50 km., kaj preterpasas 20 ŝtonkrutajojn 1000 m. longajn kaj 15 m. altajn, kaj ĝi havas pli ol tri cent konstruajojn kaj tunelojn. Aplikante sian lernitan teorion de akvoutiliga konstruado kaj akceptinte utilajn proponojn de la amaso, Hu Gjutian faris projekton por la konstruado kaj finfine ĝin efektivigis. Tio ebligis irigacion al kampoj de dekmil muoj*. Sed ambaŭflanke de tiu kanalo estas tuta areo de molaj ŝtonoj kiuj tre facile elfloreskas, forlaviĝas kaj kaŭzas ellason de akvo. Kiel ripari kaj flegi la kanalon sin metis antaŭ Hu Gjutian kiel novan taskon por konsidero. Li faris studojn pri la teorio koncernanta la problemon, samtempe vizitis maljunajn kamparanojn por informiĝo kaj fine sukcesis trovi la unuapaŝan rimedon protekti la bordojn kaj solidigi la digojn por malebligi absorbon kaj ellason de akvo.

HEREDO DE LA REVOLUCIA STILO

En kontakto kun tiuj junaj intelektuloj, mi havis profundan impreson: Ili jam komencis laboristiĝi aŭ

kampaniĝi, kun karaktero de sincereco kaj realismo kaj inklino al mallukso kaj penlaborado. La bona tradicio de la popolo en Jan-an, la malnova bazloko de revolucio iom post iom eniĝis ankaŭ en tiuj junaj intelektuloj.

Iun tagon, en aŭtuna pluvo, mi renkontis junulon vestitan laŭ la stilo de Jan-anaĵ kampanoj kun blanka viŝtuko sur la kapo, kaj pantalonotuboj supren falditaj ĝis la femuroj. En la komenco mi prenis lin por membro de iu produkta brigado, sed poste mi trovis ke li estas Guo Ĝengje, teknikisto en la Eksperimenta Centro de Akva kaj Grunda Konservado en Jan-an. Jam plurajn jarojn li laboris en Jan-an post sia diplomiĝo el la Nordokcidenta Agrokultura Instituto. Li diris al mi ke dum sia esplorado en la sovaĝejoj pri grund-erozio ili ofte iras laŭ la piedsignoj postlasitaj de la iamaj ruĝarmeanoj kaj ruĝgvardianoj. Ili ankaŭ ofte vizitis la historiajn lokojn de revolucio por rememori la malfacilajn tagojn kiujn travivis la revoluciaj gvidantoj. Ĉio ĉi ilin pensigadas pri la serioza demando. Kiel oni heredu la revolucian stilon de Jan-an?

Li ankaŭ diris al mi, ke ili ofte ricevis instruojn el la heroaĵoj faritaj de la popolo de Jan-an. Foje, li faris esploradon surmonte kun la gerila veterano Baj Jude, kiu partoprenis la defendon de Jan-an en 1947. Tiu grandaĝulo kun blankaj haroj ĉiutage suriris la monton tretante la matenajn rosojn por marki liniojn kaj starigi signotabuletojn por konstrui ŝtuparkampojn kaj forstojn. Guo Ĝengje admonis al la maljunulo ke li ripozu, sed tiu ĉi ne volis kaj penegis laboris plu. Li diris al Guo montrante la zigzagan montvalon: "Tie, en 1947, ekstermiĝis tuta brigado de Ĉiang Kajŝek-banditaro. Tiutempe ni venkis ilin per nura provizo de fusiloj kaj milio!" La vortoj de la maljunulo fariĝis movforto por Guo venki malfacilojn.

KUN PROFUNDA RADIKO KAJ ABUNDAJ FOLIOJ


Grupoj post grupoj da intelektaj gejunuloj venis seninterrompe al Jan-an por partopreni la laborojn de konstruado, kaj Jan-an ŝanĝis sian fizionomion jaron post jaro. Hodiaŭ, alveninte al Jan-an, ni tuj estas okulfrapitaj de la verdaj arbaroj plenkovrantaj la montodeklivojn. La bela pejzaĝo memorigas nin pri Huang Genpin, membro de la Komunisma Junulara Ligo.

En la jaro 1956, en Jan-an okazis Kunveno de Gejunuloj el Kvin Provincoj por Forstigado, en kiu Huang Genpin, reprezentanto el Hangĝou, Ĝegiang-provinco esprimis sian volon resti por verdigi Jan-an, kaj ĝin beligi laŭ la fizionomio de Hangĝou, fama pro sia ĉarmo. De tiam en Jan-an vivas tiu nova loĝanto.

Kiam Huang travivis la unuan vintron en Jan-an, li trovis ke la vintro tie daŭras longe, oni devas planti multe da pinoj kaj cipresoj, por fari la sanktan lokon de revolucio verda tra la tuta jaro. Sed tiaj arboj tute ne troviĝis en Jan-an. Por serĉi arbidojn, li iris al la monto "Flava Drako" 200 km. fore, kie li elekte kolektis el granda pinarbaro sur frostita tero pinarbidojn, kune kun aliaj kolegoj. La arbidojn ili

Janhuj-kanalo finkonstruiĝis.


Foto de Lancaŭ



* unu muo = ses kaj du trionoj da aroj.

*La Pagodo-monto verdi-
gita per arboj.*


Foto de Lancaŭ



portis al Jan-an kaj plantis sur la Pagodo-monto.

En la lastaj jaroj, Jan-an havigis al si pli ol 40,000 pinglofoliajn arbojn tiel transplantitajn. Ili bone kreskas kaj impresas per viveco. Huang Genpin alportis ankaŭ abiojn kaj ginkojn el sia hejmloko Hanggōu kaj ĝia Okcidenta Lago. Nun ili vivas forte

kaj prospere. La abio kaj la pino jam akomodigis al la klimato de Jan-an. Kaj Huang jam edzigis al knabino de Jan-an kaj fondis tie sian hejmon. En la printempo de 1962, dum novaj ĝermoj aperis sur la pinarboj de la Pagodo-monto, la geedzoj de Huang jam rievigis sian unuan infanon en Jan-an.



*Nannivan fariĝis bela kaj
fekunda loko en norda
Ŝenhi-provinco.*

Foto de Lancaŭ



*Gejunuloj el fiŝida grupo ekzamenas fiŝidojn por scii kiel ili fartas kaj kreskas.
Foto de Liu Ŝijin*

Nova Kontribuo al Fiŝbredado en Lagoj

JU BO

PROVIZADO kaj transportado de fiŝidoj ĉiam estis grava problemo en laga fiŝbredado. Ĉar laŭ onidiro la plej ofte troveblaj lagaj fiŝoj ellasas ovojn nur en rivero, tial la fiŝidoj bezonataj de laga fiŝbredado povas esti liverataj nur de malmultaj difinitaj lokoj. En Ĉinio troviĝas multe da lagoj, kaj dum lastaj jaroj konstruiĝis multe da grandaj kaj malgrandaj akvorezervejoj, kaj komencis prospere disvolviĝi laga fiŝbredado, tial la problemo de provizado de fiŝidoj fariĝas ĉiam pli grava.

Antaŭ nelonge ĉi tiun problemon jam solvis la Akvoprodukta Esplorinstituto de Ĉangŝou-laga Fiŝbredejo en Siĉuan-provinco. Kun granda intereso mi vizitis tiun esplorinstituton.

DE UNIVERSITATO AL FIŜBREDEJO

La estro de la instituto, k-do Hie Daging, estas pli ol tridek-jara, altkreska kaj humura. Li rakontis al mi la historion de lia studado pri la problemo de fiŝidoj.

En la printempo de 1958, li forlasis sian instruistan postenon en la Agronomia Instituto de la Sudokcidento, kaj alvenis la Ĉangŝou-lagan Fiŝbredejon. Post kiam li estis diplomita el la biologia fakultato de la Siĉuan-a Universitato kaj sendita al la Agronomia Instituto de la Sudokcidento por instrui zoologion, li ĉiam interesiĝas pri la afero de akvaj produktaĵoj. Post lia alveno al la fiŝbredejo, la kompartia komitato aranĝis por li taŭgan horaron por fizika laboro kaj sciencaj esploroj, kaj atentigis al li, ke li faru sciencajn esplorojn por ĉiuflanke dis-



Gejunuloj el fiŝspecio-grupo retkaptas fiŝidojn.

Foto de Liu Ŝijin

volvi la produktadon, klopodu koni la objektivajn leĝojn tra solida esplorado, kaj modeste lernu de la popolamaso.

Li aktive partoprenis en la fiŝbredejo la laborojn de fiŝbredado, fiŝkaptado k. c. El la praktikado li eksciis: kiom da fiŝoj brede taŭgas por la areo de unu muo, kiom profunda la akvo devas esti, kiel teni la akvokvaliton bona, kiaj allogaĵoj plej plaĉas al la fiŝoj, kiel preventi kaj kuraci malsanojn de fiŝoj, kaj multajn aliajn sciojn. Tio fariĝis bona bazo por lia posta scienca esplorado.

NOVA TASKO

La fiŝbredejo havas multe da fiŝlagetoj, sed mankis al ĝi sufiĉe da fiŝidoj por brede. Se oni aĉetus tion de aliaj provincoj, oni devus elspezi multe, kaj krome granda estus la mortoprocento de la fiŝidoj. Tiam oni eksciis de fiŝkaptisto ke en la lago troviĝas ĉinaj tinkoj (*Ctenopharyngodon idellus*) grandaj kaj malgrandaj. Sekve la gvidantoj donis al Hie Daging novan taskon: esplori kaj studi sur la lago pri la ĉinaj tinkoj kaj arĝentaj karpoj (*Hypophthalmichthys mor-trix*), kolekti iliajn frajojn, elovigi fiŝidojn, kaj ilin kulturi kaj brede tie.

Hie Daging akceptis la taskon kun plezuro.

Eĉ kiam li ankoraŭ lernis en universitato, li jam deziris fari esploron pri la bredado de ĉinaj tinkoj kaj arĝentaj karpoj en lagetoj de Siĉuan-provinco, kaj verki disertacion utilan al fiŝproduktado. Jen efektive prezentiĝis al li bona ŝanco, kiel do li povus ne ĝoji?!

INSPIRO

Malgranda esplorgrupo konsistanta el tri boatoj kaj kelkaj personoj, ekveturis sur la lago gvidate de Hie Daging. Remante ili kolektadis specimenojn kaj observadis fiŝgrupojn dum la tago, kaj faras analizadon vespere. Ili vivis kaj laboradis sur la lago dum du monatoj, tamen ankoraŭ trovis neniun fiŝidon de ĉina tinko aŭ arĝenta karmo. Versajne la fiŝoj ilin primokas pro ilia manko de sperto. Iun tagon, post longa klopodo ili sukcesis kapti unu fiŝidon. Ĉiuj opiniis ke ĝi estas tinkido. Sed ĝin vidinte iu maljuna fiŝkaptisto diris: "Kamaradoj, vi eraras, tio ĉi ne estas tinkido!" Ili ĉiuj malesperiĝis. Hie Daging pensis: Eble ankaŭ la fiŝkaptisto, kiu antaŭe diris ke en la lago troviĝas tinkoj, prenis tian fiŝidon por tinkido? Li refoje tralegis referen-

cajn librojn. El la libroj iuj asertas ke "la genera glando de tinko kaj arĝenta karmo ne povas maturiĝi en lago aŭ fiŝlago", kaj tial ili "ne povas ellasi ovojn en lago"; iuj eĉ asertas ke "tinko kaj arĝenta karmo ellasas ovojn nur en grandaj riveroj". Li malfermis sian lernolibron, kiun li studis en la universitato, kaj legis en ĝi, ke en Siĉuan-provinco la tinkoj kaj arĝentaj karmoj ne ellasas ovojn. Hie Daging dronis en duboj kaj ĉagreno.

Ĉion ĉi tion li diris al k-do Vang Lej, la sekretario de la kompartia komitato. Sed k-do Vang havis alian opinion. Li diris: "Se tiu ĉi maljuna fiŝkaptisto povas distingi tinkidon de aliaj fiŝidoj, kial do vi dubas ke tian kapablon havas ankaŭ la alia fiŝkaptisto, kiu asertis pri ekzisto de tinkoj en la lago? Librojn oni devas legi, sed ne kredis ĉion senkondiĉe. Oni devas kredi la 'vivan libron' de popolamaso. Nun ankoraŭ estas tro frue por fari konkludon." Hie Daging ricevis inspiron el la vortoj de la sekretario.

LERNADO KAJ SUKCESO

Hie Daging ofte surbordiĝis kaj transiris montojn spitante ventojn aŭ pluvojn por viziti veteranajn kamparanojn kaj fiŝkaptistojn de la popolkomunumoj ĉirkaŭ la lago. De pli ol dek fiŝkaptistoj 50-60-jaraj, li lernis multe da vivaj scioj ne troveblaj en libroj. Ĉiuj tiuj asertis, ke en la lago troviĝas tinkidoj kaj arĝentaj karpidoj, ĉar ili mem iam kaptis tion. Hie Daging pli vigliĝis, kaj plifortiĝis ankaŭ la fido de la kamaradoj el lia grupo. Ili ĉie petis instruon. La institucioj kaj fiŝkaptistoj ĉe la lago entuziasme subtenis ilian esploradon kaj liveris al ili multe da materialo. Post klopodado dum pli ol unu jaro, ili akiris pli ol 400 tinkidojn kaj arĝentajn karpidojn, kaj pli ol dek grandajn tinkojn. Fine, post analizado

kaj studado oni eksciis, ke la tinkoj kaj arĝentaj karmoj efektive povas ellasi ovojn en Ĉangŝou-lago, kaj elovigi multe da fiŝidoj. Sekve, aperis disertacio verkita de Hie Daging post kunaj studado kaj diskutado kun la intelektaj junuloj. Ĝi mirigis la laborantojn kaj sciencistojn de akvoproduktaĵoj, kaj estis aplikita de iuj akvoproduktaĵaj institutoj kaj lernejoj kiel nova instrua materialo.

NOVA PAĜO

En 1960 kaj 1961, Hie Daging, gvidante la intelektajn junulojn, daŭre kaptis fiŝidojn, kaj maturajn fiŝojn por generado kaj faris eksperimentojn pri akcelo de ovoellasado. En 1962, ili enpaŝis en la plej gravan etapon de la esplorado—trovi la ovoellasejon de tinkoj kaj arĝentaj karmoj, por ke oni povu kolekti frajojn, elovigi kaj kulturi fiŝidojn. Helpate de la Centra Esplorgrupo de Akvaj Vivaĵoj, ili trovis la naturan ovoellasejon. En tiu jaro, oni kolektis pli ol 6,000,000 fekundigitajn ovojn de tinko, arĝenta karmo kaj dikkapa fiŝo (*Aristichthys nobilis*). Post plurfojaj eksperimentoj ili verkis la disertacion *Esploro pri la Kreska Regulo de Ĉina Tinko, Arĝenta Karmo kaj Dikkapa Fiŝo en Ĉangŝou-lago kaj Ĝia Utiligo*, kiu ricevis pli altan takson de sciencaj laborantoj pri akvoproduktaĵoj.

Dum lastaj jaroj, por solvi la problemojn pri bredado, kaptado kaj enkonduko de novaj specoj de fiŝoj, pri preventado kaj kuracado de fiŝmalsanoj, Hie Daging kaj liaj kamaradoj faris sciencajn studadon kaj verkis ĉ. 30 valorajn disertaciojn, kiuj forte akcelis la produktadon. En 1963, ili arte elovigis pli ol 9,000,000 tinkidojn kaj arĝentajn karpidojn, kaj ili liveris ĝustatempe al sia kaj aliaj provincoj. Ili malfermis novan paĝon en la historio de fiŝbredado en sensala akvo de Ĉinio.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

RIĈA RIKOLTO DE TRITIKO

Ĉi-jare la vintra tritiko en multaj regionoj de Ĉinio havis riĉan rikolton.

Multaj lokoj de la ĉefaj tritikoproduktaĵaj provincoj laŭlonge de la malsupra parto de la Flava Rivero samkiel tiuj de Jangzi-rivero havis konsiderinde pli altan produkton de tritiko ol en la lasta jaro.

En la areoj kun sala tero ekz-e en partoj de la provincoj Henan, Ŝandong, k. a. La tritika produkto ege superis tiujn de lastaj kelkaj jaroj. Tio estas la rezultato de starigo de drenadaj sistemoj fare de la popolaj komu-

numoj kaj sufiĉaj pluvoj, kiuj malaltigis la salon de la agroj.

CENTRO DE TROPIKAJ KRESKAĴOJ

Hajnan, la dua plej granda insulo de Ĉinio, nun fariĝas centro de tropikaj kreskaĵoj.

Pli ol cent ŝtataj farmoj estas fonditaj en la dezertaj kaj izolaj montregionoj de la insulo depost 1951.

En tiuj farmoj estas produktitaj olepalmoj, kokosoj, kafo, kakao, agava fibro kaj aliaj. Ankaŭ la lokaj popolaj komunumoj establis 300 malgrandajn farmojn de tropikaj kreskaĵoj.

SABLO-ŜTORMO BRIDITA

1,400 kilometroj de dezerta sabla marbordo de suda Ĉinio nun estas protektata de verdaj arbaraj zonoj. Ili estis plantitaj en la lastaj ok jaroj.

Tiuj arbaraj zonoj protektas 66,000 hektarojn da agroj de la piej suda parto de Guangdong-provinco kontraŭ sablo de la marbordo. Krome 4,000 hektaroj da tero antaŭe dezerta pro sablo estas nun elkulturitaj.

Ankaŭ sur la marbordo de Fugian-provinco oni kulturis tiajn arbarajn zonojn komence de la kuranto jaro.



Ilustritaj de He Junlan

Sur la Monta Ŝoseo

SAN ŜIHJUAN

I

SUR la ŝoseo al la petrolminejo ventrapide kuras ŝarĝaŭtoj, sur kies postajoj vidiĝas tra la nuboj de polvo senescepte grandaj ruĝaj vortoj: **BATALU FOR OLEO!**

Kune kun majstro Ĝang mi kondukis ŝarĝaŭton kun cilindropleno da nafto por ĝin transporti al la tenejo de la ŝtonolea rafinejo. Kiom ĝoja estis mi kiu unufoje spertis la batalon por oleo!

Sed, neatendite, post nur 50 km. da kurado paneis nia ŝarĝaŭto. Kia domaĝo ke ĝi senmoviĝis sur la senhoma dezerta monto ĝuste tiam kiam oni devis ŝpari eĉ minuton kaj sekondon!

Interkonsiliĝinte ni decidis, ke mi piediru al la administrejo peti aŭton por tiri nian ŝarĝaŭton.

Post pli ol du horoj da piediro, mi atingis vojforkon, kie estis ankoraŭ pli ol 20 km. for de la Ŝtonolea Administra Buroo, kaj mi decidis ke mi tie momenton atendu por veturigi min al la oficejo per preterpasanta aŭto. Jen, post nur kvaronhoro proksimume, alkuris el la kontraŭa direkto tute nova ŝarĝaŭto, laŭ kies aspekto oni povis certiĝi je la unua ekrigardo, ke ĝi apartenas al nia buroo. Starante meze de la vojo mi mansignis al la ŝarĝaŭto. Sed ĝi simple ignoris mian mansignon daŭrigante la antaŭenkuradon kaj laŭte sonigante la trumpeton. Mi pensis malĝoje en mi: "Lasu do, se ĝi ne volas halti," kaj malbonhumore lasis al ĝi la vojon. Kiam la ŝarĝaŭto atingis min, iu elŝovis sian kapon el ĝia fenestro kaj laŭte riproĉis min: "Kia maldecaĵo! Ĉu

vi ne konas la regularon de komuniko? Gardu vin. . ."

Mi estis kvazaŭ pikita de io kaj ruĝiĝis. La parolinto estis ŝoforino, kiun mi renkontis antaŭ semajno en la oficejo.

Mi gape rigardis al ŝia ŝarĝaŭto. Subite, ĝi ekhaltis ĉe la vojrande proksimume 5-6 metrojn for de mi. Ŝi malfermis la pordon de la ŝarĝaŭto, elŝovis sian buston kaj kriis al mi "Venu!" Mi iris al la ŝarĝaŭto. Antaŭ ol mi povis diri ion, ŝi ree ordonis: "Enaŭtiĝu, tuj!"

La ŝarĝaŭto ekkuris sur la ŝoseo montgrimpanta. Ĝi antaŭenrapidis fluge, kaj iom balanciĝante dum la plirapidiĝo. Ŝiaj brilaj grandaj okuloj sur la bruna rondvizaĝo fikse rigardis al la fronto.

Ĉirkaŭirinte unu monteton, la ŝarĝaŭto venis al la Petrola Rivero. La fluo brue torentis. Laŭaspekte ĝi estis ne tre profunda, kaj versajne ni povis ĝin transveturi per plivigliĝo de la motoro. Kiam ni atingis la riverbordon, la ŝoforino subite haltigis la ŝarĝaŭton kaj diris al sia helpantino: "Malfirmiĝis ŝraŭbo sur la dekstra rado, elaŭtiĝu por ĝin firmigi."

La helpantino saltis el la ŝarĝaŭto kun ŝraŭbturnilo. Mi estis tre mirigita: kiel ŝi povas ekscii pri malfirmiĝo de ŝraŭbo dum la veturado? Kaj ankaŭ mi elsaltis kune kun la helpantino por kontroli ĉu ŝi pravis. La helpantino trovis la firmigendan ŝraŭbon. Palpinte ĝin propramane mi sentis ke la ŝraŭbo estas vere iom malfirmiĝinta. Mi helpis al la helpantino firmigi la ŝraŭbon kaj diris kun admiro:

“Via majstrino estas vere kapabla kiel Ĝuge Liang*; alie, kiel ŝi povus ekscii dum la veturo ke la ŝraŭbo malfirmiĝis?”

Senhaste firmigante la ŝraŭbon, la helpantino diris: “Ĉu pri mia majstrino? Ho, estas ne troige aserti, ke ŝi kapablas eĉ pli ol Ĝuge Liang! Dum veturado ŝi kutimas multe aŭskulti, palpi, kontroli, kaj konstati. De la elasteco de la aertuboj ŝi povas scii, ĉu ili estas en ordo. Mi sciigu al vi senfanfarone, ke nia aŭto jam tenis al si la honoran titolon de Modelo de Sengravripareco dum tri jaroj!”

“Kio? Sen grava riparo dum tri jaro? Do via ŝarĝaŭto certe estas avangarda en veturado sen akcidento!”

“Jes ja! Vi pravas! Jen ĝuste la ŝarĝaŭto de Ĝang Jan, la ŝoforino famkonata tra la tuta buroo.” La helpantino faris grimacon al la ŝarĝaŭto kaj ree daŭrigis sian laboron kapkliniĝinte.

La nomo Ĝang Jan estis bone konata de mi. Ŝi estis la estrino de la Virina Transporta Brigado en nia buroo. Kaj inter la nomoj de la avangardaj gelaboristoj de ĉiu sezono neniam mankis ŝia nomo. Nur pro tio ke ŝi ofte veturis al Hingiang pro tasko, mi neniam vidis ŝin. Sed, neatendite, hodiaŭ mi hazarde renkontis ŝin sur tiu ĉi ŝoseo montgrimpanta.

La ŝraŭbo estis firmigita. Ĝang Jan funkciigis la motoron kaj muĝante la aŭto surkuris la transan bordon de la rivero.

II

Atinginte la transan bordon, Ĝang Jan rehaltigis la ŝarĝaŭton por ĝin purigi. Vidante ŝian trozorgemon, mi senpacienciĝis: “Ba, kia trozorgemo! Kiel multjara ŝoforo, mi neniam vidis ke oni purigas la ŝarĝaŭton survoje!”

“Jen vi eksperta parolas tamen laike!” forviŝante la koton algluiĝintan sur la ŝarĝaŭto Ĝang Jan ĵetis al mi malaprobant rigardon. “La slogano ‘Amu la aŭton kiel vian vivon; protektu ĝin kiel vian pupilon’ ja estas ĉiutage ripetata de la ŝoforoj de nia buroo. Kial vi eĉ tion ne komprenas? Kial vi ankoraŭ ne hontas vin titoli kiel multjaran ŝoforon?”

“Vi estas prava,” mi respondis kun iom da honto.

“Ne temas pri praveco, sed pri la minimuma devo de ĉiu ŝoforo.”

Mi prenis de la ilarujo manplenon da ŝpinajo por helpi ŝin purigi la ŝarĝaŭton ke ankaŭ mi povu pli frue veni al la oficejo por peti ŝarĝaŭton.

“Tro multe! Ŝparu kiel eble, ne estu malŝparema.”

* Ĝuge Liang (181-234 p.K.) estis eminenta politikisto en la Periodo de la Tri Regnoj (220-265 p.K.). En la populara “Romano pri la Tri Regnoj” li estis priskribita kiel homo kun superhoma kapablo kaj li estis rigardata de la ĉina popolo kiel simbolo de ŝaĝeco.

Mi konsciis pri mia malpravco kaj obeeme remetis duonon de la prenita ŝpinajo kaj ekpurigis la kovrilon de la motoro.

La vetero en la nordokcidenta Ĉinio estas ŝanĝiĝema. Apenaŭ ni finis la repurigon, ekventegis kaj baldaŭ kolektiĝis densaj nuboj, ekaŭdiĝis tondregoj kaj torentis jam pluvego. Mi maltrankvilis kiel formiko sur varmega kaldrono, povante nek sidiĝi nek stari kaj deziregis havigi al mi flugilojn por ke mi povu tuj atingi la administrejon kaj venigi ŝarĝaŭton.

III

Tio estis la unua pluvego en la petrola urbo dum la kuranta jaro. La ĉielo tro frue malheliĝis kaj fariĝis malvarme, sed mia koro brulis. En la administrejo mi plurfoje urĝigis k-don Maljuna Vang ke li tuj sendu ŝarĝaŭton. Kiu atendis, ke k-do Maljuna Vang eĉ pli ĉagreniĝis ol mi: kiu ja restigus sian ŝarĝaŭton en garaĝo je la monاتفino?

Subite malfermiĝis la pordo kaj enŝvebis ies voĉo: “Mi alveturu!” Turninte la kapon, mi trovis ke denove estis Ĝang Jan kaj ekkriis pretervole. Kiam





ni revenis al la buroo, ŝi tuj iris kun portistoj al la oletenejo por malsarĝi sian aŭton. Ĉe disiĝo mi rakontis al ŝi pri mia panea ŝarĝaŭto. Aŭdinte mian rakonton ŝi kritikis mian malzorgemon pri la ŝarĝaŭto, kaj samtempe helpeme promesis: "Se nun mankas ŝarĝaŭto en la administrejo, vin helpu la mia post la malsarĝo." Jen ŝi venas sin anonci! Sed ĉu decas laborigi ŝin jam sufiĉe lacan?

Per grandaj paŝoj ŝi marŝis al maljuna Vang petante: "Sendu min, kamarado, mia ŝarĝaŭto estas preta."

Maljuna Vang ŝanceliĝeme kapskuis: "Ne, dum tia malbeninda vetero. . . ."

"Ne timinde!" antaŭ ol Maljuna Vang finis, Ĝang Jan decideme diris. "Grave estas ke ni plenumu la taskon!"

"La proverbo diras. . . ."

"Mi garantias!" interrompis Ĝang Jan.

"Se timas vi putoron, vi ne bredu kokojn! Ne litaniu per 'la proverbo diras'. Por nuna afero ni juĝu kaj agu laŭ la nuna maniero!"

"Vi?. . . ."

"Mi!"

Maljuna Vang estis senvortigita de la obstina junulino. Profitante la favoran situacion Ĝang Jan 'marŝis antaŭen paŝon post paŝo': "Konsentu jam, kamarado sekciestro. Mi garantias ke mi plenumos la taskon, revenigos la ŝarĝaŭton sekure kaj sendos la petrolon al la oletenejo."

Ankaŭ mi petis kune kun ŝi. Finfine maljuna Vang diris: "Nu, ŝi iru do. Sed vi devas multe zorgi pri ŝi. Nun estas mallume kaj la vojo estas plej-

parte sur montoj. Estus malbone se okazus eventuale akcidento!"

"Estu trankvila!" Mi preskaŭ ekkriis pro ĝojo.

IV

La ĉielo estis fulge nigra; la ventopluvo faris la vojon kota kaj malfacile irebla. Dum veturo la radoj de la ŝarĝaŭto ofte glitadis en la kotajo kaj kelkiam la aŭto nur zumis sed neniom antaŭenpuŝiĝis. Tio devigis nin laboregi: ni devis jen elaŭtiĝi por aldoni teron al la vojo, jen plenigi kavojn per ŝtonetoj. Verdire, la irado estis eĉ pli malfacila ol se la ŝarĝaŭton ni antaŭenpuŝus

"Ne maltrankviliĝu! Ni havos pli bonan vojon trapasinte tiun ĉi parton," tute senĝene Ĝang Jan nin kuraĝigis. "La radoj ne glitos kiam la aŭto estos ŝarĝita."

Transvadinte la Petrolan Riveron, la ŝarĝaŭto malrapide trapasis la ŝoseon montgrimpantan. Tiam ĉesis la ventblovo kaj ankaŭ la pluvo iom malfortiĝis. La aŭto kuris pli kaj pli rapide. Mi rigardis returnen tra la fenestro de la ŝarĝaŭto. Pere de la lamplumo de la proksimaj oleoputoj, mi trovis, ke la montdeklivo, kiun ni ĵus transpasis, estas tute vualita de nuboj. Ho, ni traveturis nubojn!

La ŝarĝaŭto kuris en kulmina rapideco. Ni atingis la panean ŝarĝaŭton. Dum mi kaj majstro Ĝang ĝin ligis al la ŝarĝaŭto de Ĝang Jan, tiu ĉi kontrolis ĉiun ĝian parton kaj diris poste: "Ni rapidu, ke ni transiru la Petrolan Riveron antaŭ ĝia ŝveliĝo."

Nova Ardo en la Pekinaj Teatroj

LA moderna Pekina Opero sin prezentis al la teatroj de Pekino en 1964 kiel brila floro de revolucio por la Pekina Opero. Ĝi sukcese kreis, sur la scenejo de la Pekina Opero kun malnova tradicio, tipajn heroajn figurojn de la mastroj de la nova socio—la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, levis novan standardon por la socialisma kultura revolucio, kaj alportis altan tajdon de pasia ardo pro la nova Pekina Opero en la riĉa kaj bunta kultura vivo de la pekina popolo.

Kiam la repertuaro de la moderna opero estis anoncita, tuj aperis antaŭ la biletejoj de la teatroj longaj vicoj de mendantoj kiuj atendadas tie ekde tre frua mateno. Rimarkinde estas, ke la rigardantaro plivastiĝis senprecedence. La malnovaj manuloj por la Pekina Opero ripetfoje spektis kun ĉiam pli granda intereso, kaj ankaŭ multaj junaj laboristoj, kamparanoj, armeanoj, studentoj, oficistoj kaj eĉ junpioniroj kun ruĝa koltuko, kiuj ne vizitis antaŭe teatron de pekina opero, nun fariĝis amantoj de la modernaj revoluciaj pekinaj operoj, kaj iuj el ili eĉ enamiĝis al ili tuj ĉe la unua rigardo.

ANTAŬ LA TEATROJ

Kiam noktiĝas, antaŭ famaj teatroj brile iluminitaj en Pekino, kolektiĝas vicoj de aŭtoj kaj svarmas homoj rapidintaj de fabrikoj, oficejoj, lernejoj kaj la ĉirkaŭurbaj popolkomunumoj, kiuj ĝoje enpaŝas la teatrojn. Samtempe multaj kiuj ne sukcesis aĉeti biletojn atendas ekstere kun maltrankvilo por ŝance gajni bileton kiun oni devas cedi. Tia bonŝanco tamen maloftas.

Krom tiuj grandaj teatroj plenaj de rigardantoj, estas ankaŭ multaj "teatretoj", t. e. radioriceviloj kaj televidiloj en hejmoj kaj oficejoj ktp. kiuj altiras milojn kaj dekmilojn da aŭskultantoj kaj rigardantoj. Tia ardo kaj kortuŝiĝo de la spektantoj estis tre malofta antaŭe ĉe prezentado de la malnova tradicia Pekina Opero.

HOMOJ AMANTAJ LA MALNOVAN PEKINAN OPERON

Ĉu io nova sukcesas aŭ ne dependas de tio ĉu ĝi povas venki aŭ ne la reziston de la rutina forto.

La ŝarĝaŭto fulmrapide kuris returnen. Denove versiĝis la malbenita pluvego kaj ankaŭ la vento refuriozis.

Kiam ni proksimiĝis al la Petrola Rivero, dank' al la frontaj lumigiloj de la ŝarĝaŭto ni klare vidis ke la torenta fluo bolas en la rivero. Ĝang Jan diris kun bedaŭro: "Ve, ni malfruiĝis."

"Vi kaj majstro Ĝang refoje kontrolu la ŝarĝaŭton," dirinte Ĝang Jan supren refaldis siajn pantalon-tubojn kaj ekvadis al la rivermezo por trovi vadeblejon."

"Ni transvadu kiel eble plej rapide, alie, la akvo leviĝos pli kaj pli alten!" Surbordiĝinte, ŝi diris montrante al la fluo: "Ĉi tie estas relative malpli profunde, se ni plivigliĝos la motoron, mi pensas, ni povos transvadi."

La ŝarĝaŭto sin ĵetis al la rivermezo. Ĝi preskaŭ atingis la transan bordon, kiam subite komencis glitadi la postaj radoj ne povante antaŭen puŝi la aŭton. Ĝang Jan turnis la stirilon, kaj vigligis la motoron je ĝia maksimuma funkcikapablo plej larĝe malferminte la olevalvon. Sed la aŭto ankoraŭ nur zumadis sed neniom moviĝis.

Mi kaj majstro Ĝang ŝvitegis de akra maltrankvilo. Ni elĉerpis nian tutan forton puŝi ĝin,

sed ankaŭ vane. Ĝang Jan rapide saltis el la ŝarĝaŭto, kliniĝinte ŝi palpis permane la radon kaj trovis ke ĝia triono jam droniĝis en ŝlimo. Do estis klare ke ne efikos puŝo kaj plivigliĝo de la motoro.

"Kion fari?" mi diris, "Simple mi tuj reiru por peti alian aŭton por ĝin eltiri!"

Kuntiriĝis la brovoj de Ĝang Jan. Momenton pensinte ŝi diris: "Reiri? Ĉu ni raportu al la estro ke ni ne plenumis la taskon? Ne! Kiel ni povus lasi la ŝarĝaŭton en la rivero?" Ŝi promeniĝis sian rigardon de la aŭtokorpo al la rado, kaj de la rado al la river-fluo. Pli rapide ol mi rakontas, ŝi deprenis sian superveston kaj ŝovis ĝin sub la radon.

"K-dino Ĝang Jan, zorgu ke vi ne malvarmumu," mi diris. "Preferinde ni trovu ŝtonon por submeti al la rado."

"Rapidu, urĝas la tempo! Ni devas surbordigi la ŝarĝaŭton kiel eble plej rapide!"

Ankaŭ mi kaj majstro Ĝang rapide demetis niajn bluzojn kaj ilin ŝovis sub la radojn.

Ĝang Jan denove saltis en la aŭton. Ŝi pied-premis al la ŝaltilo de la olevalvo, kaj la ŝarĝaŭto muĝe ekkuris sur la bordon. Ni elakvigis la vestojn. Ŝi facilmove forviŝis la ŝviton desur sia vizaĝo, ekfunkciigis la motoron je la kulmina rapideco kaj la ŝarĝaŭto galopis flugrapide al la oleotenejo.



La Pekina Opero kun nuntempaj temoj estas varme akceptata de la vasta popolamaso. Jen rigardantoj malpaciencaj antaŭ la Teatro "Februaro-Sepa".

Foto de He Ĝongjaŭ

Do gravan signifon havas tio ĉu la moderna Pekina Opero povas interesi la rigardantojn de la tradicia Pekina Opero kaj gajni ilian aprobon.

Estas vero ke en la komenco la modernigo de la Pekina Opero renkontis dubemon kaj apation ĉe la malnovaj maniuloj de la Pekina Opero. Tamen ilia dubemo fine degelis, kiam ili vidis tian operon kun tute nova enhavo. Ekzemple, la maljuna laboristo Ĉaj Deguang de la Dua Pekina Ŝtata Koton-teksejo estas tia maniulo, kiu tute dubis pri la ĝuebleco de la nova opero. Sed post rigardo al la *Fajreroj en Fragmitejoj* kiu prezentas la saĝon kaj persistemon de subteraj kompartianoj dum la Rezistmilito kontraŭ la Japanaj Invadantoj, tute neatendite, li profunde interesiĝis kaj reveninte sian fabrikon eĉ fariĝis volontula propagandisto por la revoluciaj modernaj operoj. Al ĉiu li diris: "La moderna Pekina Opero prezentas belajn ludon kaj kanton kiuj estas facile kompreneblaj kaj instruaj por ĉiuj. Tian bonan teatraĵon mi ja preferas, kaj la malnovajn mi ne plu rigardos."

Estas ankaŭ malnovaj maniuloj de la Pekina Opero, kiuj enuiĝis pri la tro malnoviĝintaj tradiciaj programoj, refreŝigis sian intereson por la Pekina Opero, post kiam ili rigardis modernajn programerojn. Ekzemple, la kalkulisto de produktokostoj Juan Ginju de la laborejo en la Pekina Fabriko de Malvarmblovaj Maŝinoj, tre ŝatis Pekinan Operon pro ĝia bela kanto, sed poste li ŝanĝis sian guston kaj fariĝis amanto de filmoj. Li diris: "Aj! la Pekina Opero vere min tedis per sia gurdado." Iu tornisto en tiu sama fabriko Feng Ĉunhuj diris: "En la antaŭa Pekina Opero rolis aŭ altrangaj korteganoj en robo kun brodita drako kun jadzono, aŭ moŝtaj fraŭlinoj kun luksaj ornamoj, kiuj larmas pro sufero de amo, aŭ amindumas kun juna viro en ĝardeno post sia domo . . . sed kiel tio povas rilati al la socialisma konstruado de nia patrolando?" Iu kampulo memtitolita maniulo de la Pekina Opero, ankaŭ diris malgaje al aktoroj de la Pekina Opero kiuj venis en vilaĝon por sperti la kampanan vivon: "Dum multaj jaroj ni vidis sur la scenejo nur homojn kaj aferojn de la antikveco, sed neniun laborulon." Post kiam ili rigardis modernajn pekinajn operojn, freŝiĝis ilia amo al tiu operospeco.

LA NOVA RIGARDANTARO DE LA PEKINA OPERO

La sukceso de la moderna Pekina Opero sin manifestas ankaŭ en tio ke ĝi altiris al si vastan amason da novaj rigardantoj. Se la rigardantaro de operarto, kiu estas parto de la superstrukturo, estus limigita nur en rondo de homoj kiuj havas specialan guston kaj scipovon, tiu operarto perdus sian funkcion de superstrukturo kaj eĉ sian signifon de ekzisto. Sed la moderna Pekina Opero altiris vastan novan rigardantaron jam per siaj unuaj provoj.

Iu alia kadro, kiu neniam antaŭe vizitis teatron de la Pekina Opero, aŭskultinte ĉe la radioricevilo kelke da operoj, diris kun ĝojo: "En la moderna Pekina Opero oni prezentas nuntempajn aferojn kaj la personoj estas laboristoj, kampanoj kaj soldatoj; tio estas intima al mi en penso kaj sento, tial ju pli mi aŭskultas, des pli mi amas ĝin!" Iu modela armeano Jang Gujkin diris: "La modernaj operoj prezentas al mi heroajn figurojn de firmvolaj revoluciaj martiroj, kortuŝajn farojn de avangarduloj en la socialisma konstruado, kaj la klasbatalon tiom akran kaj kompleksan. Tiuj teatraĵoj estas ideologie profundaj kaj instruoplenaj por la rigardantoj kaj tial ni ilin ŝatas."

LA VETERANAJ ARTISTOJ DE LA PEKINA OPERO


Dediĉante sian tutan vivon al la Pekina Opero, la veteranaj artistoj faris eminentan kontribuon en la riĉigo kaj disvolvo de la pekin-opera arto, kaj akiris valoran sperton dum la longdaŭra praktikado sur la scenejo. Eble la modernaj pekin-operoj kun fortaj revoluciaj pulsoj estus malfacile akcepteblaj por ili? Sed fakte ne; pluraj el ili direktis provludojn kaj aliaj kiaj Ma Lianliang, Gaŭ Bajsuj, Liang Jiming eĉ persone partoprenis en prezentado.

Ankaŭ la veteranaj artistoj kiuj ne partoprenis la ludojn multe laŭdis la revoluciajn teatraĵojn. Ili diris: "Tiuĵ operoj estas novaj en enhavo, roloj kaj formo, kaj forte influas kaj impresas la rigardantaron. La ludantoj faris renovigojn surbaze de sia propra vivsperto kaj heredis la bonajn formojn kaj stilojn de la tradicia Pekina Opero.

La fama arlekeno de la Pekina Opero Hiaŭ Ĉanghua, jam 87 jara, rigardis plurajn ludojn de modernaj operoj kaj tre ĝojis pri ili. Rigardinte la operon *Heroaj Fratinoj sur la Stepo* en kiu rolis junulinoj kiuj por savi la ŝafaron de sia komunumo riskis vivdanĝeron, li suriris la scenejon por gratuli la ludintojn, kaj donis al ili kuraĝigajn vortojn ke ili bone klopodu por atingi pli grandajn sukcesojn.

La fama rolulo por juna viro, Giang Miaŭhiang havanta la aĝon de pli ol 70 jaroj, dum la festivalo de modernaj pekinaj operoj, ne nur rigardis ĉiun

Ili ĝojas pro la feliĉo de la herooj. Foto de Ĝu Jongking



Rigardantoj larmas pro la malfeliĉo de la herooj. Foto de Ĝu Jongking

teatraĵon, sed li rigardis kelkajn operojn eĉ du- aŭ tri-foje. Li diris ke li ludis kaj rigardis dum dekoj da jaroj la tradician Pekinan Operon, sed neniam antaŭe li estis tiom ĉarmita de ĝi kiom de la modernaj revoluciaj teatraĵoj de la Pekina Opero.

KIO SENTIĜAS EN LA TEATRO

En efektiveco, oni ne bezonas aŭskulti la dirojn de la rigardantoj kaj veteranaj artistoj, se li nur sidiĝas en teatro, li ankaŭ povas facile trovi ke la modernaj pekinaj operoj tre plaĉas al la rigardantaro laŭ ilia kortuŝiteco. Kiam ludiĝis *Surpriza Atako al la Blanktigrigra Regimento*, opero pri ĉinaj popolaj volontuloj kiuj ekstermis malamikojn en Koreio dum la batalo kontraŭ la usonaj agresantoj, la rigardantoj estis absorbitaj tuj ĉe la komenco. Sceno post sceno prezentiĝas la streĉa historio pri la taĉmento de viglegaj rekognoskantoj, kiu penetras en la neston de malamikoj. La spektantoj tiel maltrankviliĝas por ili ke eĉ la spiroj ĉe ili haltas kaj nenia sono aŭdiĝas. Nur kiam tiuj rekognoskantoj kaptas unu malamikon, kaj tiu ĉi timtrema per la tuta korpo kaj eldiras la signalvorton, la rigardantoj ekspiras facile, kaj eksplodas en ridego tra la tuta teatro. Multaj scenoj de la opero profunde kortuŝas la rigardantojn, ke ili plene kunsentas kun la personoj en la opero, dividante iliajn ĝojojn kaj malĝojojn, ili eĉ emociĝas ĝis larmoj pro ĝojo aŭ doloro.

La revolucia moderna Pekina Opero nun estas akceptita de la vasta amaso kaj enradikiĝinta ĉe la popolo. Ĝi ne nur spegulas la spiriton de la epoko, sed ankaŭ fariĝos senmorta arto de Ĉinio.

Geaktoroj de la Pekina Opero Parolas pri la Pekinaj Operoj kun Modernaj Temoj

Revolucio Necesas por la Pekina Opero

TONG ĜILING — AKTORINO DE LA
PEKIN-OPERA TRUPO DE ŜANHAJO

Ĉiam mi memoras ke en la malfrua aŭtuno de la lasta jaro, kiam ni iris al Anhuĵ, Gianghi kaj aliaj provincoj por operludo, ni kontraktis kun iuj novaj rigardantoj — niaj kamparaj gefratoj, kiuj sin okupas pri la socialisma konstruado de la nova kamparo. Iliaj opinioj pri nia prezentado profunde pensigis min pri la operoj de mi luditaj.

Tiutempe, ni faris prezentadon ĉe Mianĉuan-komunumo en Pengze-gubernio por regali ĝiajn membrojn. Aŭdinte nian alvenon, ili varme nin akceptis. Multaj venis de dekoj da kilometroj fore por rigardi la ludadon.

Mia programo por ili konsistis ĉefe el la jenaj pecoj: "Bastonado de la Amperfidulo" kiu temas pri amhistorio de almuzo-filino kaj malriĉa klerulo kaj "Jutangĉun" kiu temas pri amo inter publikulino kaj juna nobelo. Mi pensis ke la dua estas tradicia opero kun belaj kantoj, sufiĉe matura laŭ la vidpunkto de teatrarto, kaj ĝi nepre kontentigos la rigardantojn. Sed, la fakto montris ĝuste la malon, ke la amaso plendis pro nekomprenebleco de la kantado. Tio min tre maltrankviligis. Mi forte kortuŝigis precipe kiam mi laboris kune kun la komunumanoj, kaj vidis kiel energie ili laboras por akiri


abundan rikolton, kaj kiel klopodeme ili strebas por prosperiĝo de la lando. Mi pensis: Kiom bone estus se mi povus ludi iun alian operon kiu spegulas la klasbatalon en la reala vivo por firmigi ilian volon al batalo! Sed, kian rilaton havas tio, kiom mi ludis kun tiu ilia spirito sin apogi sur siaj propraj fortoj en klopodado por prosperiĝo kaj feliĉo? Tiuj miaj teatraĵoj en efektiveco, izoliĝis de la socialisma epoko plena je revoluciaj spiritoj, kaj kiom fore de la vasta amaso de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj! Ŝanĝiĝis la epoko kaj la rigardantoj, sed malnovaj restis niaj operoj. Se la Pekina Opero ne sin transformus per ĝisfunda revolucio, ĝi ne plu estus bezonata de la popolo kaj nepre estos fine eliminata.

Nun, la Partio elmetis la orientilon pri revoluciigo de la Pekina Opero kaj organizis la senprecedence grandiozan Festivalon de la Moderna Pekina Opero por intersanĝo de sperto. Estas honoro por mi, ke mi povis partopreni ĝin kiel ano en la vicoj por la revolucio de la Pekina Opero.

La repertuaro de la Festivalo spegulas la vere kortuŝajn heroajn batalojn de la revoluciaj pioniroj kaj farojn de avangarduloj el la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tiuj operoj estas ideologie fortaj, havas personojn sukcese figuritajn kaj elspiras realecon de la vivo. Ankaŭ la ludartoj de la tradicia Pekina Opero estas tiel bone aplikitaj en ĝi ke ĝi estas kaj revolucia moderna kaj laŭtradicie bona opero, kaj ĝuas varman akcepton de la vasta amaso de rigardantoj. Tio ebligis al mi kompreni ke bone ludi la Pekinan Operon kun nuntempaj temoj ja ludas aktivan rolon en la defendo de la socialisma konstruado en nia lando. Mi decidis dediĉi mian tutan vivon al ludado de modernaj operoj.



TONG ĜILING



ĜAŬ JANHIA



GUAN SUŜUANG

La Vivo Estas la Fonto de Literaturo kaj Arto

ĜAŬ JANHIA — VICESTRINO DE LA PEKIN-OPERA TRUPO DE PEKINO

Post la prezentado de la revolucia historia opero "La Fajreroj en Fragmaĵoj" de nia trupo, la rigardantoj el diversaj rondoj donis al ni varman subtenon kaj kuraĝigon, kiuj nin instigas kaj spronas.

En tiu opero mi ludis la rolon de Bofranjo Aking. Ŝi publike sin montras kiel mastrino de teotrinkejo sed fakte ŝi kaŝlaboras por nia Partio. Estis malofte por mi ludi tian rolon de revolucia heroino dum la dudek jaroj de mia sceneja vivo. Mi spertis kaj ĝojon kaj malĝojon en mia kreado de tiu ĉi rolulino, mi komprenis dume kio estas vera kreado en mia metio.

Mi memoras ke mi serioze kaj energie strebis en la unua provludo. Sed multaj el la rigardantoj skuis sian kapon dum la rigardado, dirante: La rolo estas ne ĝuste prezentita. Ĝi estis bone ludita kiel mastrino, tamen la pli grava aspekto de la rolo — la temperamento de revoluciulo, estis ne sufiĉe elmontrita. Kiel aktorino, mi vere ĉagreniĝis, aŭdinte tian recenzon de la rigardantoj.

"Kio estas la temperamento de revoluciulo?" mi meditis kaj meditis. Mi legis librojn, petis konsilojn de gekamaradoj . . . fine mi venis al la konkludo ke mi tion ne sukcesos, se mi ne metos min en la realan vivon por spertado.

Kiam miaj kolegoj kiuj rolis kiel soldatoj el la Nova Kvaravoja Armeo estis ironta en trupon por sperti la vivon de armeanoj, mi pensis, ke la armeo estas plej bona loko por sperti la temperamenton de la revoluciulo, do ankaŭ mi iris senhezite.

En la trupo mi havis kune kun la soldatoj streĉan, ĝojan kaj tute revolucian vivon. Kio precipe min kortuŝis estis la interhoma rilato, tiom sincera kaj malegoista kvazaŭ inter fratoj.

Iun tagon, unu el niaj kunirintaj aktoroj estis malsaneta, kaj soldatoj kaj oficiroj venis lin vidi. Mi trovis ke ili malmulte parolas ĝentilajn vortojn, sed el iliaj okuloj kaj sinteno elmontriĝis profunda sento de klasaj fratoj. Tio memorigis min pri la sceno en kiu mi ludis la rolon de Bofranjo Aking: tiam 18 vunditaj aŭ malsanaj soldatoj devas sin kaŝi inter fragmitoj sub danĝera minaco de atako de la malamikoj. Ŝi ege maltrankviliĝas kaj klopodas por savi ilin el la danĝero. En tiu sceno oni devas prezenti la noblan karakteron de Aking. Dum la provludo mi strebis energie, tamen sentis ke mian forton mi ne trafe uzas. Kio estas ne en ordo? Nur hodiaŭ mi rimarkis la kaŭzon ke mi ludis nur la rolon de helpanto kaj mankis en mi la klasa sento. Tiuj 18 homoj estas niaj karuloj kaj kamaradoj; se ili pereus, tio signifus ne nur perdon de la intimuloj sed ankaŭ perdon por la revolucio. La zorgoj de Bofranjo Aking pri ŝiaj kamaradoj estas el ŝia klasa sento; ŝia sagaco kaj kuraĝo devenas de la alta konscio pri la respondeco por la revolucia afero.


Tio ĉi komprenigis min plupaŝe pri la nobleco de Bofranjo Aking kaj ankaŭ pri tio ke neeble estas ludi tiun rolon sen penso kaj sento de la revolucio.

Reveninte de la trupo, mi sentis min multe pli kapabla kaj certoplena kaj plifortiĝis mia memfido por ludi la rolon de Bofranjo Aking. Mi klopodis trovi iom post iom la ĝustan manieron prezenti la revolucian temperamenton de Bofranjo Aking, kaj fine mi sukcesis reliefigi ŝian heroan figuron sur la scenejo kaj ebligis al la vasta amaso de rigardantoj ricevi revolucian edukon.

Mia soldatiĝo dum mallonga tempo en la trupo profunde min komprenigis pri la korekteco kaj graveco de la instruo de prezidanto Maŭ: la vivo estas la fonto de la literaturo kaj arto.



MA LIANLIANG



JUAN ŜIHAJ

De la Vivo al Teatra Rolado

GUAN SUŜUANG — VICESTRINO DE LA PEKIN-OPERA TEATRO DE JUNNAN-PROVINCO

Ĉifoje, nia Opera Trupo de Junnan-provinco prezentis la teatraĵon "Dajno" kiu ĉefe spegulas la realan vivon de la ĝingpooj de la nacimalplimulta regiono Dehong, en Junnan, kiuj detruis la feŭdan regadon, sin liberigis el malriĉeco kaj postiĝinteco kaj firme iras sur la vojon al socialismo. La heroino Dajno, kiun mi rolas, estas avangardulino hardita kaj elkreskinta el la fornego de la batalvivo.

Dajno estas knabino forte malcedema, havanta karakteron krudan kaj malkaŝeman. Antaŭ la malamikoj, ŝi estas fortika kiel tektono, sed milda kiel floro por siaj proksimuloj. Kiam ŝi ion malamas, ŝiaj okuloj rondiĝas pro kolero, kaj kiam ŝi estas ĝoja, infane vigla ŝi fariĝas. Ĉe la komenco de la opero, Dajno estas knabino vendebla, subpremata kaj malrespektata. Sed ĉe la fino de la opero, ŝi jam fariĝis estrino de Agrokultura Produkta Kooperativo, avangardulino de Ĝingpo-nacio marŝanta sur la vojo al socialismo.

El mia persona sperto en ludado de roloj de nacimalplimultaj popolanoj, mi venis al la kompreno ke por bone prezenti tian avangardulinon kia Dajno, mi devas, antaŭ ĉio, iri vivi en la regiono de la ĝingpooj.

En la printempo de la kuranta jaro, kune kun aliaj gekamaradoj mi iris al la Ĝingpoa Dehong-

regiono, kie mi vivis dum kelka tempo. Per kunsidoj, vizitoj, amuzokunvenoj kaj aliaj manieroj ni kontaktis kaj konatiĝis kun personoj el diversaj rondoj de la reala vivo de Ĝingpo-nacio, precipe kun multaj virinoj kiuj havis similan travivaĵon al tiu de Dajno, kun kiuj ni kunvivis kaj interparolis. El tio rezultis ke ni ne nur iom komprenis la pensojn, sentojn kaj karakterajn trajtojn de ĝia laboranta popolo, sed samtempe ankaŭ rimarkis iliajn manierojn

kaj formojn por esprimi siajn pensojn kaj sentojn kaj diversajn karakterajn trajtojn. Ĉio ĉi tio donis al mi fidindajn ekzemplojn por ludi la rolon de Dajno.

La opero komenciĝas per la forkuro de Dajno de sur la Ĝingpo-monto post rompo de la katenoj. Antaŭe mi pensis ke Dajno forkuras, persekutate de la Montreganto k.a., ŝi trapasis multajn praajn montojn kaj arbarojn, renkontis multajn sovaĝajn bestojn, tial ŝi devas esti timtremanta, kiam ŝi ekaperas sur la scenejo. Sed baldaŭ mi trovis ke tia prezento ne taŭgas. Sed kiel ludi? Tiutempe mia vivosperto el mia restado en la regiono de Ĝingpo-nacio bone min helpis. Mi rememoris la ĝingpoan knabinon, kiu forfuĝis de deviga edzinigo. Por sin savi de la persekutantoj, ŝi restadis en la montoarbaro tri tagnoktojn. Kial tiu knabino havis tiom grandan kuraĝon? Ĉar, se ŝi kuraĝis fuĝi de la perforta edzinigo, ŝi ja nenion timis en la praarbaro! Do mia antaŭa ludmaniero ne konvenis. Poste mi akcentis la kuraĝon de Dajno por kontraŭstari, kaj ĉe ekapero sur la scenejo, mi devas fari sur la rigardantaron fortan impreson pri ŝia braveco kaj firmvolo, kaj per la kantado kaj per la movoj.

Akirinte ĝustan komprenon pri la karaktero, pensoj kaj sentoj de la rolo, mi devis ankaŭ solvi la kontraŭdiron inter la tradicia arta formo kaj la vivo de la frata nacio. Ankaŭ en tio ĉi oni devas ĉiam teni en konsidero la vivon, la personon kaj la enhavon, kaj absolute ne devas detranĉi la enhavon pro la apliko de la tradiciaj ludformuloj. Aliflanke, oni devas ankaŭ konservi la proprajn stilon kaj trajtojn de la Pekina Opero. Tio postulas ke oni faru renovigon kaj kreadon surbaze de la tradicioj por plibone disvolvi la esprimovon de tiu teatra arto.

Antaŭen en la Revoluciigo de la Pekina Opero

MA LIANLIANG — ESTRO DE LA PEKIN-OPERA TRUPO DE PEKINO

De la tempo kiam ekestis teatraĵo en nia lando, ĝi estas uzata ĉefe por speguli la realan vivon. La multe citata "imita arto de Joŭmeng", ludis prateatraĵojn pri aktualajoj jam en la 6-a jarcento a. K. Ankaŭ la eminentaj verkoj de la diverstempaj dramverkistoj estas de aktualaj temoj. Tio montras ke la teatra arto povas longdaŭre vivi nur dank' al tio ke ĝi povas speguli la realon, ke ĝi intime rilatas al la reala vivo, alie, ĝi pereus neeviteble. Precipe en la nuna socialisma socio, estas necese por ĝi ne nur speguli la realon sed ankaŭ servi al la revolucio.

Ĉar en nia nova socialisma Ĉinio, nun oni kondukas grandiozan revolucion, la teatraĵarto, kiel unu el la konsistigaj partoj de la superstrukturo, nepre devas sin konformigi al la bezono de la vasta socialisma popolo kaj propagandi socialismajn ideojn, sed absolute ne devas daŭrigi la propagandon de feŭdaj kaj burĝaj ideoj.

Dum miaj 54 jaroj de pekin-opera ludado en la pasinteco, mi ludis nur rolojn de mortintaj imperiestroj aŭ generaloj, sed neniam tiujn de samepokaj vivantoj. La kialo kuŝas en tio ke mi ne korekte solvis la fundamentan problemon kiun servi.

Hodiaŭ la Komunista Partio de Ĉinio elmetis la grandan orientilon por la revoluciigo de la Pekina Opero, kiu donis al la Pekina Opero, tiu malnova speco de teatra arto, novan vivforton, kaj al ĝiaj laborantoj klaran direkton servi al la socialismo kaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Mi tre ĝojas pro tio! Tial mi partoprenis la prezentadon de la revolucia historia opero "Kukol-monto" en kiu mi ludis rolon de vivanta homo la unuan fojon dum mia operista vivo, mi sentas pro tio veran honoron.

Estante jam 64-jara, mi tamen ĵuras marŝi antaŭen senhalte en la direkto de la revoluciigo de la Pekina Opero.

Brila Estonto de la Pekina Opero

JUAN ŜIHAIJ — AKTORO DE LA PEKIN-OPERA TEATRO DE ĈINIO

La praktika sperto de la Festivalo de la Pekina Opero kun Modernaj Temoj montras ke tiu malnova speco de teatra arto kapablas servi pli bone, pli rekte al socialismo, al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj tiel havigi al si brilan kaj senliman estontecon kaj la brilon de la socialisma revolucio. Estante aktoro de la Pekina Opero kaj laboranto por ĝia revoluciigo, mi kore ĝojegas kaj ekscitiĝas.

La Festivalo de la Pekina Opero kun Modernaj Temoj por interŝanĝo de sperto plupase min komprenigis pri la revolucia signifo de la devizo "Kune floru cent floroj, disvolu novon el malnovo". Printempon ne povas krei sur la scenejo nura elmontrado de la floroj historiaj, estas necese larĝe speguli la realon de la revolucia batalo kaj la heroajn figurojn, nur tiamaniere povas aperi printempo ĉarmega kun buntaj floroj.

Dum la mondkua revolucio kaj la granda socialisma konstruado, aperis el la granda ĉina popolo sennombraj kaj prikantindaj avangarduloj kaj heroajoj. La subjektomaterialoj por speguli sur la opercenejo ilian spiriton kaj fizionomion per la tradicia artoformo estas oni ne scias kiom multoble

pli riĉaj kaj vastaj ol tiuj de la historiaj temoj. Se la Pekina Opero ne povus rompi la limon de la historiaj temoj, tro mallarĝa ja estus ĝia vojo por disvolviĝo.

La praktiko mem de la spertointerŝanĝa prezentado montris al ni ankaŭ ke estas tre malfacile por la Pekina Opero kortuŝi la rigardantaron per versimileco en prezentado de operoj kun nuntempaj temoj kaj heroaj figuroj en la reala vivo, se ĝi sin apogas nur sur, sed ne faras rompon de la tradiciaj ludartoj kaj esprimformuloj. Tial, la Pekina Opero, kaj precipe ĝiaj laborantoj devas sin revoluciigi. Tiu ĉi revoluciigo ja tiel favoras al la disvolviĝo de la Pekina Opero, kiel el la ideologia reformado kaj sana kreskado por ĝiaj ludantoj.

Mi ege ĝojas pro la sukcesoj en kreado de la personoj en la modernaj pekinaj operoj, kiuj ne nur estas valoraj en arto sed ankaŭ havas profundan revolucionan signifon.

Mi jubilas pro la brila estonto de la Pekina Opero kaj estos por ĉiam inter la revoluciuloj por efektivigo de tiu brila estonto.

Alia Floro en la Arto-bedo de Ĉinio

EN la somero de tiu ĉi jaro, en Pekino, oni atestis la sukcesan prezentadon de la Pekina Opero kun nuntempaj temoj, kiu estas nomita kiel “la epokfara revolucio en la teatra historio de Ĉinio” kaj “mirinda floro en la arto-bedo de Ĉinio”. La ekscitiĝon pri tio sekvas nova ĝojo kun kiu pekinanoj vizitis en amasoj sume de 160,000 personoj la Trian Ekspozicion de Belartajoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo okazintan en la Arta Halo.

“Soldatoj”, en la malnova Ĉinio, estis sinonimo de malklereco, sed nun la batalantoj de la Liberiga Armeo ne nur estas kleraj, sed ankaŭ fariĝis avangardo en kulturo kaj arto. La vizitintoj de la ekspozicio ĉiuj sentis miron pro la bona sukceso kiun la batalantoj atingis en la kreado de tiuj belartajoj. Famuloj el la artista rondo nomis la ekspozicion alia floro en la arto-bedo de Ĉinio.

Ankaŭ pli ol 200 eksterlandaj gastoj el pli ol 20 landoj inkluzive de Albanio, Kubo, Indonezio k. a. en Pekino unuj post aliaj rigardis la artverkojn.


REVOLUCIA ASPIRO KAJ BRAVA BATALSPIRITO

Ekspoziciigis en ĝi 652 verkoj pri diversaj temoj kaj kun intensa etoso de la reala vivo. En ili vaste

speguliĝis la vivo en la armeo, la rilato inter la armeo kaj la popolo, la nacia defendo kaj la armeanoj en produktaj kaj konstruaj laboroj, kaj konsiderinda parto de la verkoj, temas pri historiaj revoluciaj bataloj kaj internaciismo. Ĉiuj ili vidigis la revolucionan aspiron de la Popola Liberiga Armeo kaj la bravan batalspiriton de ĝiaj anoj.

El la verkoj pri la historiaj revoluciaj bataloj plej okulfrapaj estas kelkaj grandaj olepentraĵoj. La olepentraĵo “Antaŭ la Decida Batalo” de Gaŭ Hong temas pri la liberiga milito en la tagoj antaŭ la decida batalo, kiam prezidanto Maŭ tagnokte zorgeme faris por ĝi la strategian planon en sia simpla kaverna domo en norda Ŝenhi, kaj fine verdiktis pri la neevitebla pereco de la Ĉiang Kajŝek-a reĝimo. Tiu bildo fidele spegulas, ke prezidanto Maŭ estas kaj saĝa ĉefkomandanto kun antaŭvido kaj profunde-pripenemo kaj ordinara homo kiu ne sin tenas alte kun fieremo for de la aliaj.

Estas multaj verkoj kiuj montras la rilatojn inter la Liberiga Armeo kaj la popolo. Ekzemple, “Ĉe la Landlimo” temas pri helpado de armeanoj al kamparanoj en produktado, “Ĵusnaskito” temas pri arma kuracistino en flegado de akuŝintino kaj ŝia



RIBELO EN KANTONO (olepentraĵo)

De Guo Hongliu kaj He Kongde



ANTAŬ LA DECIDA Batalo
(olepentraĵo) De Gaŭ Hong

bebo, "Ruĝa Koro kontraŭ Ondegoj" temas pri batalantoj en savado de maljunuloj, infanoj, kripluloj kaj malfortuloj el superakvego kaj la bildo "Intimuloj" montras la rilaton inter la armeo kaj la laboranta amaso ĉiel intiman ke ili ne volas disiĝi kiel samfamilianoj.

La plej multenombraj kaj plej elstaraj estas la artverkoj pri la heroaj modelaj soldatoj. Ili spegulas la noblan karakteron de la armeanoj, kiuj sindonas por la nova socio, ĝojas helpi la aliajn, ilian ŝparemon kaj laboremon en konstruado de la armeo, malcedemon en pen-ekzercado de militaj teknikoj kaj malrimon de malfaciloj. Kaj ili ankaŭ montras ke la grandan forton la armeanoj ĉerpis el la verkoj de prezidanto Maŭ, kiujn ili studas.

La lignogravuraĵo "Oŭjang Haj Sin Oferas por Savi Trajnon" kiu kreiĝis surbaze de la heroajo de la nomita armeano, kiu oferis sian vivon pro savado de trajno kun centoj da pasaĝeroj. La bildo vive prezentis la okazaĵon. La "Fronta Posteno de Mardefendo" prezentas scenon pri la solidareco inter la armeo kaj la popolo kune defendantaj la maran teritorion.

La bildo "Post Marŝado sur Neĝkovrita Altebeno" de Mej Hiaŭking, pri du junaj soldatoj absorbite flikantaj siajn ŝuojn montras al ni la malfacilan lukton kaj modestan vivon de la Liberiga Armeo kiun povas bari nek montoj nek riveroj.

Tre interesa estas la temo de la pentraĵo "Fonto" de Han Jue, kiu bildigis armeanon kiu ĉerpas akvon surmonte kaj studas verkon de prezidanto Maŭ dum ripozo. Dum la pura fontakvo fluas en la sitelon, la revolucia ideo el la alia fonto fluas en la cerbon de la soldato.


Unuvorte, la aŭtoroj de tiuj artverkoj diversflanke reliefis la kortuŝajn figurojn de batalantoj

de la Popola Liberiga Armeo, kaj montris al ni la riĉecon de ilia interna mondo.

La olepentraĵo "K-do Norman Bethune, Granda Internaciisma Batalanto" estas bona verko temanta pri la proleta internaciismo. Doktoro Bethune (1889-1939) estis membro de la Kanada Komunista Partio. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito li alvenis al Ĉinio for de sia hejmlando por helpi la ĉinan popolon en ĝia justa batalo. Li travivis malfacilajn tagojn kune kun ni ĉinoj kaj fine oferis sian vivon al la granda afero de la ĉina popolo. La pentristo kun respekta sento reliefe prezentis la noblan spiritan fizionomion de kamarado Bethune.

K-DO NORMAN BETHUNE, GRANDA INTERNACIA
BATALANTO (olepentraĵo) De Ĉen Hing





ĈE LA LANDLIMO (lignogravuraĵo)

De Tan Bajhin

FORMA DIVERSECO KAJ STILA FREŜECO

Inter la ekspozitaj 652 artverkoj, krom olepentraĵoj, skulptaĵoj, propagandaj afiŝoj, troviĝis ankaŭ ĉinaj tradiciaj pentraĵoj, rakonto-bildaroj, lignogravuraĵoj, novjaraj bildoj kaj papertranĉaĵoj ĉiuj ĉinstilaj. Oni povas diri ke ili inkluzivis ĉiujn formojn de belartoj kaj havis sufiĉan altan artan nivelon.

Estis multaj verkoj dum kies kreado, oni heredis la tradician arton unuflanke kaj aliflanke faris kuraĝan reformon sin bazante sur la reala vivo kaj laŭ la postulo de la kreado. Ekzemple, en bildoj de pejzaĝoj, floroj kaj birdoj, oni malofte pentris homojn en la pasinteco, aŭ per homoj oni nur ornamis la pejzaĝon. Sed preskaŭ ĉiuj verkoj en la ekspozicio prenis la homon kiel centran temon kaj lerte kombinis la homofigurojn kun la pejzaĝo. Kaj eĉ se kelkaj pentraĵoj prenis kiel

POST MARŜADO SUR NEĜKOVRIĜITA
ALTEBENO (ĉinstila pentraĵo)

De Mej Hiaŭking



ĉeftemon la pejzaĝon, ili esprimas ian homan senton per la pejzaĝo, kie neniu monto aŭ ŝtono ne korpigas en si la senton de homo, ne spegulas la spiritajn trajtojn de la revoluciaj militistoj. Kaj multaj olepentraĵoj aplikis teknikojn kutime uzatajn en la ĉinstila pentrarto, tiel ke ili estas plenaj je naciaj gustoj.

Ĉiuj ĉi tiuj ekspozitaj manifestis la propran specialan artostilon de la liberigaj armeanoj. Ĝi estas la sama stilo de batalo, optimismo, freŝeco, simpleco kaj fortikeco, kia la revolucia spirito de la Liberiga Armeo.

MILITISTOJ KAPABLANTAJ BATALI KAJ VERKI

Preskaŭ du trionoj el la ekspozitaj artverkoj estas kreaĵoj de belartaj amatoroj. Tio ĉi la ekspozicio rimarkinde karakterizis. Inter ili troviĝis elitaj batalantoj, mirindaj pafistoj, kapabluloj en tekniko kaj bonegaj laborantoj. Ili plej bone konas la vivon kaj homojn en la trupo, tial iliaj verkoj povas fidele respeguli la trupan vivon kaj prezenti la pensojn kaj sentojn de la herooj.

Multaj profesiaj artistoj en la armeo, laŭplane iras vivi en la roto ĉiujare dum kelkaj monatoj por kune manĝi, loĝi kaj labori kaj sin amuzi kune kun la militistoj laŭ la direktivo de prezidanto Maŭ ke la "literaturo kaj arto servu la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn" kaj "la artistoj sin ligu kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj". Tiamaniere, ili plifortigis sian ideologian reformadon kaj riĉigis sian fonton de verkado, kaj sekve kreis multajn bonajn verkojn. Multe da vizitintoj al la ekspozicio ilin nomis "militistoj kun peniko" aŭ "batalantoj kapablantaj militi kaj verki".



親人 1964年6月 黃琬作





Fronta Posteno de Mardefendo.

Peng Bing

泉
一九二四年
夏
南京
徐悲鸿
画



La Pediatriaĵoj Aferoj en Ĉinio

ĈIUJ kiuj vivis en la malnova Ĉinio scias, ke tiutempe la nivelo de sano de la ĉinaj infanoj estis tre malalta, kaj ke multaj infektaj malsanoj vagis senbride. Ĉirkaŭ dudek milionoj da infanoj mortis pro malsanoj ĉiujare.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la situacio ŝanĝiĝis ĝisfunde.

PREVENTO DE INFEKTAJ MALSANOJ

Pro la malsterila manipulo de akuŝigo en la kamparo de la malnova Ĉinio, tetano de novnaskitaj infanoj estis tre ofta, kaj forrabis multajn junajn vivojn. Post la Liberiĝo, pli ol miliono da akuŝistinoj eltrejniĝis, kaj moderna akuŝiga metodo estas praktikata en la tuta lando, malpliigante rapide la tetanajn kazojn de novnaskitaj infanoj. Ni prenu Pekinon kiel ekzemplon: en 1949 la procento de novnaskitaj infanoj mortintaj pro tetano estis 0.72%, en 1958 ĝi malaltiĝis ĝis 0.04%, kaj nun proksimiĝas al nulo.

Ankaŭ variolo, ĥolero, kaj aliaj infektaj malsanoj, kiuj minacis la sanon de la infanoj, estis eliminataj.

Antaŭ la Liberiĝo, tre furiozis ankaŭ tuberkulozo. Post la Liberiĝo, preventa laboro kontraŭ tuberkulozo disvolviĝis en la tuta lando. Grandskala kampanjo de vakcino de B.C.G. (serumo kontraŭ tuberkulozo) por infanoj efektiviĝis. Ankaŭ establiĝis preventivejoj kaj malsanulejoj por enhospitaligi tuberkulozajn pacientojn. Kontraŭtuberkulozaj medikamentoj, kiuj devis esti importitaj en la pasinteco, estas nun grandskale produktataj enlande. Tio multe plifortikigis la kuracadon de tuberkulozo.

REGADO DE PARAZITAJ MALSANOJ

En la pasinteco en la vasta kamparo de Ĉinio, la sano de la infanoj estis subfosita de endemiaj parazitaj malsanoj. Ekzemple, laŭ la esplorado farita frue post la Liberiĝo, troviĝis ĉirkaŭ sesdek mil pacientoj de nigra febro (tropika lien-grandiĝo) en la tuta lando, de kiuj la plejmulto estis infanoj, kun mortoprocento alta ĝis kvin procentoj. La popola registaro organizis grandnombrajn medicinajn trupojn por fari preventan kaj kuracan laboron en la kamparo, kaj



Propagando de sanigaj scioj por infanoj al loĝantaro.



Supre:
*Oksimetra determinado de arteria oksigen-
 satureco — por informiĝo pri oksigenmanko ĉe pulmitaj infanoj.*

Sube:
Determinado de vejna premo — diagnozado de pneŭmonio kun kora malfunkcio ĉe infanoj.

ankaŭ produktis efikan medikamenton. En la epidemaj regionoj, oni ŝprucis insektomortigan fluidon ĉiujare por elimini la perantojn kiuj disvastigis tiun ĉi malsanon. Post la klopodo de multaj jaroj, finfine la nigra febro en la tuta lando estas preskaŭ eliminata.

Skistosomiaso estas endemia parazita malsano en la baseno de Jangzi-rivero. En la pasinteco milionoj da infanoj suferis de tiu ĉi malsano. Dum la lastaj jaroj, multnombraj kuracistoj kaj flegistinoj iris al la kamparo, faris grandskalan preventan laboron, kaj ege malpliigis tiun epidemion.

La rezultoj de preventado de aliaj infektaj malsanoj, kiel malario, intestaj parazitaj malsanoj, ktp. ankaŭ estas tre rimarkindaj.

ESPLORA LABORO EN PEDIATRIO

Multe da scienca esplorado estis farita de la ĉinaj pediatroj en la lastaj jaroj. En la pasinteco la mortoprocento de infanoj suferantaj de disenterio bakteria estis alta ĝis 30 procentoj. Nun ĉinaj pediatroj trovis novan kuracmetodon, kiu ebligas malaltigi la mortoprocenton ĝis sub unu procento.

Pneŭmonio estas ofta kaj ofte mortiga malsano de infanoj en vintroj. En la lastaj jaroj en studo de la klinika simptomologio, diagnostiko, kaj terapio k.a. de la adenovirusa pneŭmonio, la ĉinaj pediatroj utiligis la altvaloran sperton de la maljunaj kuracistoj de tradicia medicino, kaj tiun malsanon kuracas kombinate la tradician kaj okcidentan medicinon, altigante multoble la kuracefikon.

La Instituto de Pediatrio de la Ĉina Akademio de Medicinaj Sciencoj akiris bonajn rezultojn ankaŭ en la studo pri diagnozo kaj kuracado de toksa dispepsio, kiu endanĝerigas la sanon de infanoj, malaltigante la mortoprocenton de tiu ĉi malsano de 20% en la estinteco ĝis la nuna ĉ. 1%.

Por malpliigi doloron al la malsanaj infanoj, la ĉinaj pediatroj en la lastaj jaroj ankaŭ serĉis metodon por kuraci ĥirurgiajn malsanojn sen operacio. Ekzemple, en la pasinteco, operacio estis konsiderata neevitebla por kuraci askaridon en gala dukto kaj intest-entiriĝon (*intussusception*). Nun nova kuracrimedo estas trovita por kuraci tiujn ĉi malsanojn sen operacio. Eĉ akuta apendicito de infanoj povas esti kuracata per akupunkturo sen operacio.

Depost la jaro 1960, ĉinaj medicinaj laborantoj faris energian esploron de vakcinsero kontraŭ poliomyelito kaj viva malfortigita morbila vakcinaĵo, kiuj donis evidentan preventan efikon en la aplikado ĉe infanoj.

SANAJ ORGANIZAĴOJ KAJ PEDIATRIAJ LABORANTOJ

Antaŭ la Liberiĝo en la tuta lando estis nur tri infanaj hospitaloj kun iom pli ol cent sepdek litoj.


Veterana ĉina medicinisto Pu Fuĝoŭ diskutas kun okcidentometodaj medicinistoj pri malsano en dubo.



Post la Liberiĝo, la situacio ege ŝanĝiĝis. Reto de sanprotekto por virinoj kaj infanoj establiĝis en la urboj kaj la vasta kamparo. Ĝeneralaj hospitaloj en ĉiuj lokoj aŭ aldonis aŭ etendis siajn pediatria klinikojn kaj nombron de litoj, dum la nombro de specialaj pediatria hospitaloj pliiĝis okoble, kaj la nombro de litoj pli ol dudekoble, kompare kun tiuj antaŭ la Liberiĝo. Samtempe, en medicinaj kolegioj specialaj fakoj de pediatrio establiĝis por kulture pediatriajn specialistojn. En Pekino establiĝis Instituto de Pediatrio por sistema studo de klinika praktikado, sanprotekto, kaj fundamenta teorio de

pediatrio. Nelonge post la Liberiĝo, establiĝis Pediatra Societo sub la gvido de la Ĉina Medicina Asocio, por disvolvi akademian agadon, kaj kunvoki diversajn kunsidojn pri pediatrio. Krome, ĝi eldonas sian periodaĵon *La Ĉina Pediatria Gazeto* por vaste interŝanĝi spertojn.

Sub la gvida principo de preventado kiel ĉefa rimedo, kombino de la tradicia kaj okcidenta medicinoj, disvolvo de amasa higiena movado, la ĉinaj pediatria laborantoj estas akirantaj pli kaj pli multe da sukcesoj en sia laboro de protektado de infana sano.



Elektro-encefalografia determinado pri normalaj infanoj.

En la Familio de Unu Laboristo

MIA najbaro estas majstro Ĉeng, maljuna laboristo en nia fabriko. Lia familio konsistas el 4 membroj, kies temperamentoj estas kaj similaj kaj malsimilaj.

MAJSTRO ĈENG

Se vi volas scii kioma horo estas, ne iru al maljuna majstro Ĉeng — ilia horloĝo estas neakurata.

Fakte, la horloĝo iras akurate. Sed ĉiun matenon antaŭ ol batas la kutima horo por foriro al la laboro, la biciklo de majstro Ĉeng flugas al sia fabriko kun tintaj sonoj kiel fajrobrigada aŭto.

Li ofte ŝtele retromovas la montrilojn de la horloĝo je duonhoro antaŭ la ĝusta tempo. Kial "ofte"? Ĉar onklino Ĉeng ofte kaŝe reĝustigas la montrilon pro amema zorgo pri sia edzo. Tiamaniere iras "silenta lukto pro tempo" inter la maljunaj geedzoj.

Iufoje onklino Ĉeng forgesis ĝustigi la montrilon. Majstro Ĉeng antaŭen turnis ĝin timante malfruiĝon, ĉar estis malhele. Kaj poste li denove iom movis ĝin antaŭen. Sekve de tio li atingis la fabrikon pli ol unu horon antaŭ la labortempo. La nokta vendisto de huntuno (pasteĉo kuirita en supo) estis jam hejmenironta kaj vidinte lin ŝerce diris! "Miaj bon-gustajoj ĵus elĉerpiĝis, venu la venontan nokton. . . ."

ONKLINO ĈENG

Dum la plejparto de sia vivo ŝi vektportis riverakvon. La sufero kaj mizero kurbigis ŝian talion.

En la pasinteco, multaj laboristaj familioj kiuj ne povis uzi la multekostan akvokondukan sistemon devis trinki riverakvon, kaj la eksterlandaj kapitalistoj dubis la purecon de la akvo de la

akvokonduka sistemo kaj mem starigis instalaĵojn por sin provizi per filtrita akvo. Ŝi portadis riverakvon por ili.

Foje iu eksterlanda kapitalisto koleriĝis senkaŭze kaj pugnobatis ŝin tiel ke ŝi falis dorsosupren, ŝia klaviklo rompiĝis kontraŭ la sojlo. Sed la malriĉa vivo devigis ŝin daŭrigi la pezan laboron! Kun kunpremitaj dentoj kaj larmoj en la okuloj ŝi vektportis akvon per la alia ŝultro.

. . . . Hodiaŭ, neniu laboristo trinkas plu la riverakvon. Ĉie estas kranoj de la akvokonduka sistemo por provizi puran kaj malkaran akvon. Onklino Ĉeng fariĝis fervora volontula propagandistino kaj kontrolistino por ŝpari akvon. Se iu malŝparas akvon, ŝi nepre solide lin kritikis.

Ŝi ofte diras: "La hodiaŭa akvo estas miksitita kun mielo, ĝin ne malŝparu!"

LA FILO

Ŝajne li ne havas oficialan nomon, eĉ en la familio ĉiuj lin nomas Stultuleto.

Ĉu li estas vere stulta? Juĝu mem per la faktoj. Iutage preterpasante la pordon de la administracio, majstro Ĉeng subite aŭdis akran voĉon. Certe li! Majstro Ĉeng pensis, ke eble lia filo faras malpravon. Li proksimiĝis al la fenestro kaj atente aŭskultis.

"... Kial vi pagis al mi superflue 8 juanojn?" laŭtis la voĉo de lia filo.

"Do vi protestas eĉ kontraŭ superpago!"

"Por min superpagi oni devus subpagi aliajn!"

"Sed la sumo ja estas via premio!"

"Mia premio ne devas inkluzivi la 8 juanojn!"

"Kial ne? Vi kolektis 35 kilogramojn da eluzita oleo."



Ilustritaj de He Junlan

“Tia oleo ne devas esti konsiderata kiel eluzita! Kiu ajn ĝin vidas, ne povas ne ĝin kolekti. Mi tion faris nur pli frue ol la aliaj. . .” Li ŝajne sentis sian argumenton ankoraŭ ne sufiĉa kaj aldonis: “Ne pensu, ke nia politika konscio estas tiel malalta!”

Aŭdinte tion, ekridis la maljuna majstro Ĉeng.

LA FILINETO

Reveninte de la lernejo, la knabino iris viziti la Ekspozicion de la Historio de la Fabriko, sed ŝi vidis nur la fermitan pordon. La tempo por vizito jam pasis.

“Bedaŭrinde!” la filineto piedfrapis.

“Iru morgaŭ! La ekspozicio ankoraŭ daŭros,” panjo ŝin konsolis.

“Atendi mi ne povas! Morgaŭ ni ludos dramon, en kiu mi ludos la rolon de mizera serv-knabino, sed pri tia vivo mi nenion scias. . .” Ŝi gape rigardis eksteren tra la fenestro.

Iom pripensinte, onklino Ĉeng petis sian filineton transporti kestojn. Ili movis unu post alia kaj fine el la tria kesto prenis amason da ĉifonaĵo.

“Rigardu, fratineto, kio estas tio ĉi?” diris la patrino.

“Ĉifonoj!” senzorge respondis la filino, pensanta pri sia morgaŭa dramludo.



“Ne, redivenu!”

“Ĉifonoj por viŝi tablon aŭ plankon, aŭ fari plandumojn!”

“Tute ne!” diris la patrino kun ruĝiĝintaj okuloj. “Ĝi estis miaj vestoj, kiam mi estis serv-knabino!”

“Kion?” surprizite kriis la filino.

“Antaŭ pli ol 30 jaroj, kiam mi altis kiel vi, mi laboris kelkajn jarojn kiel serv-knabino ĉe iu bienulo. Mi portis ilin kaj printempe kaj vintre, ili eĉ ne povis kovri mian korpon. . .” Kun larmoj la knabino aŭdis la travivaĵon de sia patrino. Ŝi sidis senmove kvazaŭ pensanta pri la problemo, kiel prezenti la patrinon morgaŭ?

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

UNUJAJ DIPLOMITOJ POR DEZERT-KONKERO

Ĉijare grupo da kolegiaj studentoj pri dezert-konkero finis sian studon en la Intern-mongolia Arbar-kultura Kolegio. Ili laboros ĉe la dezertoj de Interna Mongolio kaj Hingiang.

ELEKTRAJ LAMPOJ EN TIBETO

Sekve de la establiĝo de elektraĵoj stacioj en Tibeto, la malhelaj bovbuteraj lampoj en multaj urboj, vilaĝoj kaj novaj loĝkvartaloj de Tibeto estas anstataŭitaj de elektraĵoj lampoj.

Depost la nuligo de servutula sistemo en 1959, estas konstruitaj en Tibeto pli ol tridek mezaj kaj malgrandaj hidro- kaj termoelektraj stacioj. Antaŭ la Liberiĝo en 1951, en la tuta tibeta regiono troviĝis nur unu malgranda elektra stacio.

KONFERENCO DE BLINDULOJ KAJ SURD-MUTULOJ

En julio ĉijare okazis en Pekino la Dua Tutlanda Konferenco de Blinduloj kaj Surd-mutuloj. Ĝi estis patronata de la Ĉina Asocio de Surd-mutuloj kaj Blinduloj.

Ĉeestis 253 delegitoj el diversaj partoj de la lando. Multaj el ili estas elstaraj laboristoj, popol-

komunumanoj, registaraj funkciuloj, instruistoj kaj artistoj.

La bonstatoj de iliaj samsortuloj estis revuitaj en la konferenco. Por ili estas fonditaj en multaj urboj specialaj fabrikoj aŭ laborejoj; laboroj taŭgaj por surdmutuloj estas troveblaj en diversaj ordinaraj fabrikoj kaj institucioj; la blinduloj povas labori en sanitaraj stacioj; kelkcentoj da specialaj lernejoj por ili estas fonditaj; troviĝas ankaŭ specialaj presejoj kaj paper-fabrikoj por blinduloj.

Ĉe la fino de la konferenco estis elektita 74-membra konsilo por la Ĉina Asocio de Surd-mutuloj kaj Blinduloj.



En Montvilaĝeto

VEN LIPENG

NIA kultura labortrupo alvenis la vilaĝon Ŝang-hjucun en Vendeng-gubernio, Ŝandong-provinco. Ĝi estas negranda montvilaĝo. La komunumanoj de la vilaĝo invitis nin partopreni ilian semajnfinan vesperkunvenon, kiu regule okazadas tie. En la vesperkunveno la junaj komunumanoj petis ke ankaŭ ni kantu kelkajn kantojn. En nia labortrupo sin trovis famaj kantistoj, komponistoj kaj violonistoj, tial ni estis kun plena memfido, ke estas facile por ni ilin kontentigi. Sed kiu atendis ke sekvante niajn kantojn la junaj komunumanoj ĉiam tuj kantis siajn kantojn kaj poste denove petis nin kanti. Post kelkfoja ripeto de tia laŭvica kantado ni eksentis ke tio iom similas al kantkonkurso. Ju pli longe kantis la junaj komunumanoj, des pli fervoraj ili fariĝis kaj des pli vigla kaj amuza fariĝis la atmosfero en la kunvenejo. Ĉie en kaj ekster la ĉambro svarmis homoj. Kaj dum iras la kantado eĉ ankaŭ maljunuloj volonte ĝin partoprenis unu post alia kun granda entuziasmo por ne paroli pri la infanoj. Nia labortrupo kompreneble koncentrigis nian tutan menson kaj forton por la aktivado. Sed iom post iom ni sentis nian malfortecon, ĉar ne multe da kantoj estis komune konataj de ni ĉiuj. Iuj el ni nur povis zumi la melodiojn. Kaj tiamaniere ni kantis ankoraŭ kelkajn kantojn kaj poste la situacio fariĝis des pli malfavora. La komunumanoj scipovis kanti

ne nur kantojn ĝenerale konatajn, sed ankaŭ multajn novajn. Ni devis prezenti solojn responde al iliaj ĥoroj. Tamen eĉ tiamaniere ni ne povis egali kun ili. Pli poste ni estis devigataj nin helpi per muzikiloj: unu ario kontraŭ unu kanto. Sed la komunumanoj finfine nin venkis. Ni tamen estis tre ĝojaj perdi la konkurson, trovante ke en tiel malgranda montvilaĝo kia ĝi, la junuloj scipovas kanti pli ol sepdek kantojn. Ĉu ni, laborantoj por disvastigi la revolucion kulturon en kamparo, povus ne ĝojplene aplaŭdi la novan socialisman kamparon!

Poste en la kunvenejo komencis ludo Ĉirkuligo de Floro dum Tamburado. La principa regulo estas ke kiam ĉesas la tamburado, tiu, kiun ĝustatempe

trafas la cirkulata floro, rajtas postuli al iu ajn prezenti programeron aŭ respondi al lia demando. La demanditaj junuloj ĉiuj senĝene ekstaris kaj donis rapidajn kaj precizajn respondojn al la diversaj demandoj kiel ekzemple la jenaj: "Kiel preventi la nigramakulan malsanon de batato?" "Kun kiuj landoj nia ŝtato jam starigis diplomatajn interrilatojn?" "Kie sin trovas Panama?" Aŭskultante iliajn senĝenajn respondojn, ni tute forgesis ke ni sin trovas en ordinara kampara klubejo.

Vivinte iom da tempo en la vilaĝo, ni rimarkis des pli multajn novaĵojn.

Iun tagon, post pluvego, la tervojo en la vilaĝo fariĝis kotplena. Vespere ĉesis la pluvo kaj je trumpetado la junuloj tuj kolektiĝis por partopreni volontan transportadon de sablo por bonigi la vojon. Dank' al vigla laboro de pli ol sepdek gejunuloj baldaŭ la vojo fariĝis facila kovrite de sablo alportita de sur monto. Ni rimarkis ke la gejunuloj partoprenis tian laboron tute nature sentante nenian fieron pro sia kontribuo.

Iufoje, komunumanoj iris al la marbordo por alporti ŝlimon el la maro por sterki la kampojn. La junuloj estis tiel aktivaj, ke ĉiu el ili transportis kelkcent ĝinojn ĉiufoje. La montvilaĝo situas iom malproksime de la marbordo. Pli ol cent ĉaretoj ekruĝis en ampleksa vico, —

jen kia parado! La patrinoj plej bone konas siajn filojn. Iu patrino kredis ke ŝia filo nepre transportos tre grandan ŝarĝon, tial ŝi iris el la vilaĝo kun ŝnuro en la mano por lin renkonti kaj helpi. Sed la filo ne volis la helpon de sia patrino, ĉar apud li sin trovis alia junulo kiu penegis rulis pli pezan ĉareton. La patrino volonte helpis al la lasta per tirado de lia ĉareto kaj ili kune revenis en la vilaĝon.

Pretervole mi ekmemoris pri la vilaĝoj en la malnova tempo. Ĉu tiam povis okazi io tia? Ne! El la komparo mi ekvidis la profundan ŝanĝiĝon en la kamparo dum la lastaj dekelk jaroj, la profundan ŝanĝiĝon en la sfero de ekonomio, kaj la ankoraŭ pli profundan en la spirito.




Ilustritaj de Ĝou Ĝianfu



Glacipendaĵoj en la profundejo de la glacia kaverno.



Glacilago ĉirkaŭata de glaciaj krestoj havas nur unu mallarĝan enirejon.



*Glacikolono.
Fotoj de Ma Gingki*

SPEKTAKLOJ DE ŜIŜA PANGMA

HUANG VANHUJ (grimpisto)

KIAM la ĉinaj montgrimpistoj venis al Ŝiŝa Pangma, la tero estis jam kovrita de neĝo kaj muĝis ventego. Estis malvarme eĉ en leda surtuto. Vere netolerebla estis la frosto sur la altaĵo.

La montĉeno en kiu sin trovas la montpinto de Ŝiŝa Pangma iras de la okcidento orienten kaj brilante serpentumas kvazaŭ arĝenta drako. Kio plej forte tiras al si la atenton de homoj estis la glacipagodoj, kiuj havas diversajn formojn: iuj similas al koraloj, aliaj al akraj glavoj, triaj staras kvazaŭ blankbarbaj maljunuloj kaj ankoraŭ aliaj aspektas kvazaŭ jadaĵ kolonoj . . . En la arbaro de glaciaj pagodoj estas multaj glacikavernoj, kiuj belas kvazaŭ kristalaj palacoj! Sur la arkaj muroj de kavernoj estis

videblaj ĉielarkaj lumringoj kvazaŭ en kalejdoskopoj. Sur la supro de la kaverno pendas "stalaktitoj" de glacio, kaj sur la tero oni vidas multajn glaciajn "stalagmitojn". Unu el la kavernoj havas du etaĝojn, vi povas supreniri en la supran kaverton laŭ la helica glaciŝtuparo. Vi trovos tiam, ke ĉio brilas en la kaverno, eĉ ankaŭ viaj kamaradoj kaj kostumoj.

Marsante laŭlonge de la glaci-rivero, oni vidas disfalon de glacio. En la alteco de 6,300 metroj ni vidis kelkajn glacidisfalojn. Ili bruegis kvazaŭ obtuzaj tondroj, kaj post la bruoj leviĝis belega fungoforma fumo kun diversaj koloroj. Kiam la fumo leviĝis, ventego ekblovigis tiel forte ke oni

apenaŭ povis stari kaj foje ĝi eĉ faligis la tendon.

Sur Ŝiŝa Pangma, ni spertis raran fenomenon de statikoelektra malŝarĝo. Estis malluma senluna nokto. Tiam la fenomeno okazis. Ni levis niajn pioĉetojn super niaj kapoj—la pintoj de ili ekbriletis! Ni etendis niajn gantitajn manojn—la pintoj de la fingroj ankaŭ ekbriletis!



Eĉ estas bestoj sur la altaj montoj! Post nia kampadejo 5,800 metrojn super la marnivelo estas montpinto 6,100 metrojn alta, kie oni trovis lupkavon. Ni trovis ĝin per la piedsignoj de la lupoj kaj renkontis du grizajn lupojn eĉ la enirejo. Ni forpelis ilin kaj akiris paron da lupidoj en la kavono.

Ne malproksime de la lupkavo, ni vidis grupojn de grizaj neĝkokoj (*Tepiaogallus*). Ili vivas nur sur altaj montoj. Ili estas grasaj kaj ne povas bone flugi, sed ili povas kuri tre rapide, precipe kiam ili kuras supren.

Antaŭ nia baza kampadejo estis rivereto nomita Nakodora. Ĉiutage ni trinkis de ĝi kaj lavis nin kaj niajn kostumojn per ĝia akvo. Ĝi estas la fonto de la tibeta Pengkju-rivero, kiu elfluas el breĉo de iu glacilago de Jabukangala-glacirivero.

Suprengrimpinte ĝis pli altaj punktoj, ni vidis du lagojn mal-supre, brilajn kiel du speguloj. Ili estas kvazaŭ la okuloj de Ŝiŝa Pangma. Ilia akvo estas blublua kaj sentigas al ni kvietecon.

Unu tagon, ni transveturis en aŭtomobilo stepon apud Ŝiŝa Pangma. Subite, kelkaj sovaĝazenoj ekvetkuris kun nia aŭtomobilo. Ili kuris rapidege. Ne longe poste, aro da sovaĝkaproj, proksimume du aŭ tri cent, alkuris en rekta linio kaj ankaŭ vetkuris kun ni. La ŝoforo eksonigis la trumpeton kaj ni kriegis "rapidu! rapidu!", sed ili tute ignoris nin. Poste, la sovaĝazenoj transpasis antaŭ ni kaj la kaproj malaperis antaŭ ni kiel linio de fumo. Ĝis hodiaŭ ni ankoraŭ ofte parolas kun intereso pri tiu vetkurado de aŭtomobilo, sovaĝazenoj kaj sovaĝkaproj.



Supre:
Aro da glacipagodoj.

Foto de Vang Gingde

Meze:
Danĝera glaciponto.

Foto de Ma Gingkiu

Sube:
Glacia kaverno 10 metrojn profunda, sur la monto Ŝiŝa Pangma.

Foto de Ma Gingkiu



LA FONTO DE LA VERKOJ

VU JINGGJU

ANTAŬ nelonge mi babilis kun hongkong-a komponisto por filmoj. Li diris, ke la plejparto de la kinofilmoj produktitaj en Hongkong estas akompanata de fondiska muziko pro monŝparo. Se oni devas fari arion al iu parteto de filmo, tiam la komponisto povas nur sin enfermi dome por ĝin verki, sed tute ne povas profundigi en la socian vivon por akiri inspirojn kaj malfacile povas akiri alies helpon. Li serioze elmetis al mi la demandon: "Kiel vi entreprenas vian verkadon en la patrolando?" Tio rememorigis min pri multaj okazintaĵoj.

Kiam mi ricevis la taskon komponi muzikon por la marioneta filmo "Oraj Orelringoj kaj Fera Ŝpato", mi falis en maltrankvilon. En la pasinteco mi vivis en eksterlando kaj reveninte al la patrolando post la Liberiĝo, mi neniam vizitis iun ajn nacimalplimultan regionon. Kiel mi povus krei per muziko la brilan figuron de la jaŭ-nacia junulo Keli en la filmo laborema, kuraĝa, helpema kaj spitema en medio dornoplana?

Dank' al aranĝo de la filmofarejo, mi venis al Longŝeng, distrikto loĝata de jaŭ-nacio en Guanghi-regiono.

Longŝeng estas en montregiono kun malfacila komunikado. Kvankam tie jam konstruiĝis ŝoseo post la Liberiĝo, tamen ĝuste antaŭ mia alveno ĝi estis detruita de pluvego. Mi devis piediri al la celita loko kunportante miajn pakajojn. Enirinte la montaron kovritan de aĝaj arbaroj, mi ĉirkaŭiradis unu post alia krutajn deklivojn, kaj mi devis longe iradi antaŭ ol ekvidi unu vilaĝon. Tiutage pluvis kaj la vojo estis glitiga. En la komenco la irado estis ne tre malfacila, sed ju pli supreniris la monton mi des pli malpacientiĝis, kaj la pakajoj fariĝis ĉiam pli pezaj. Vidinte min tute lacigita la voĵgvidanto kamarado Liang, kiu estis tiea jaŭ-nacia funkciulo, deprenis la plejparton de miaj pakajoj kaj vektportis ilin kune kun sia pakajo. Mia irado tuj faciliĝis. Sed rimarkinte la vesperiĝon mi denove maltrankviliĝis ke ni ankoraŭ ne atingis la celitan vilaĝon. Min obsedis la demando: Kiel mi pasigos ĉi tie la venontajn tagojn por profundigi en la jaŭ-nacian vivon? Ĝuste kiam la aflikto turmentis min, kamarado Liang, kiu iris antaŭ mi vektportante la pakajojn, ekkantis gaje en sia nacia lingvo. Mi ne komprenis ĝian enhavon, sed la melodio kaj ritmo montris ke ĝi estas versaĵne ario

laŭdanta lian hejmlokon. Mi pensis en mi, kial li laŭdas tiun lokon? Mi do demandis al li pri la enhavo.

Jen ĝia teksto:

*De Longŝeng, nia loko bela,
La montoj riĉas je trezoro;
La viv' fariĝos pli prospera,
Per kolektiva pen-laboro.*

.....

Kamarado Liang diris al mi ke antaŭ la Liberiĝo la jaŭ-oj vivis tre mizere. Kuomintango ilin pelis sur la montojn, sed ili ankoraŭ devis labori por la bienuloj kaj suferi de ilia ekspluatado. La Liberiĝo alportis al ilia vivo tute novan aspekton. Kvankam la loko preskaŭ enfermis sin for de la ekstera mondo, ĝi tamen estas vera trezorejo. Nun la jaŭ-oj energie laboras, ili interligos la montareojn per ŝoseoj kaj ekspluatos

La aŭtoro en verkado.



UNUA PAŜO

I

LA unuan fojon Hjue Huj spertis kiel veturi en ĉaro. Kia ĉaro ĝi estis!

Ŝi estis urba knabino en ĝia propra senco. Antaŭ ol ŝi finis la studadon en agronomia kolegio, ŝi neniam forlasis la urbon (eĉ dum la produkta praktikado ŝi estis nur en farmo en la antaŭurbo), kaj kompreneble neniam veturis en ĉaro.

Hodiaŭ ŝi ekiris de malgranda gubernia urbo ĉe la limo de Hunan- kaj Guanghi-provincoj al la Kulturejo por Bonaj Semoj de Mopan-monto. La veturilo en kiu ŝi veturis estis plata ŝarĝveturilo tirata de du malgrandaj ĉevaloj el Siĉuan-provinco, tipa en sudokcidenta Hunan-provinco. La veturilo

estis ŝarĝita per sakoj sur sakoj da superfosfata sterko. Pro manko de sidlokoj oni povis nur oblikve sidi sur la sakoj.

Ĵus ĉesis la seninterrompa aŭtuna pluvo. La rapide konstruita ŝoseo apud la monto zigzage serpentumis supren. Tie kaj tie troviĝis kavetoj plenaj je koto. La ĉaro skuiĝis tiel forte ke ŝi timis, ke ŝi povos glitfali de la amaso de sterko. Pensinte ke estas preferinde ne veturi en la ĉaro, ŝi rapide kriis al la maljuna laboristo kiu kondukis la ĉaron: "Maljuna kamarado, bonvolu haltigi la ĉaron. Mi volas malsupreniĝi."

La maljuna laboristo de la farmo, kiu kondukis la ĉaron, havis aĝon de pli ol sesdek jaroj. Kaj liaj haroj kaj liaj brovoj jam griziĝis, sed li havis paron

la subterajn riĉaĵojn por subteni la konstruadon de la patrolando. Liaj vortoj forte min kortuŝis. Mi ekkomprenis kial lia kanto sonis tiel sonora, fieraj kaj gaja, kaj kial en tia medio li estis tiel optimisma. Ĉar li staris alte kaj vidis malproksimen. Tiam en mia cerbo formiĝis la heroa figuro de Keli kun siaj karakterizaj trajtoj.

Mi loĝis en vilaĝo de jaŭ-oj, kaj vivis kaj laboris kune kun ili. En tiuj tagoj la vivo estis enhavoplena. Post la tagaj laboroj, vespere la diligentaj jaŭ-oj sidiĝis ĉirkaŭ fajrujo kaj babilis kun ekscitiĝo pri sia produktado kaj reformo de sia montregiono. Iliaj pensoj kaj sentimentoj min edifis forte. Intertempe la tiea distrikta partia komitato organizis aparte por mi prezentadon de jaŭ-naciaj kantoj kaj dancoj. En profunda nokto de la alta monto eksonis kantoj, *sona-oj**, tamtamoj kaj tamburoj, kaj el tiu prezento mi kolektis multajn materialojn pri jaŭ-nacia muziko.

En la tago, kiam mi devis foriri kaj la jaŭ-oj, ne volante la disiĝon, akompanis min el la vilaĝo, venis al mi arĝenthara maljunulo, kiu aparte deziris restigi min iom da tempo. Kiam mi sidiĝis laŭ lia peto li ekkantis por mi. Kvankam mi ne komprenis la vortojn, tamen vidinte lian sinceran mtenon kaj aŭdinte la intiman tonon, mia koro tre emociiĝis. Poste kamarado Liang sciigis al mi, ke la kanto estis improvizita de la maljunulo. Libere tradukite ĝia teksto legiĝas jene: "Vi venis al ni de la malproksima Ŝanhajo por ke nia antikva legendo aperu en filmo. Mia koro plenas de dankemo. Dankon al Prezidanto Maŭ, dankon al li pro lia zorgado pri ni. Vi foriros, sed ne forgesu nin. Revenu baldaŭ kaj gastu ĉe ni denove." Kun ilia sincera varma sento mi revenis laŭ la irita vojo. Mi malsupreniris sola de la montoj

ŝultre portante la pakajojn. La vojo restis same kruta kiel antaŭe, sed nun mia koro plenis de ĝojaj sentoj. La montoj vidiĝis tiel belaj kaj la arboj kvazaŭ riverencis al mi.

Post la reveno al Ŝanhajo, kiam mi ekokupiĝis pri la verkado, la figuroj de la jaŭ-oj en Longŝeng kun siaj sinceraj sentimentoj, laboramo, optimismo, zorgemo al kamaradoj kaj malamo al la malamiko, svarme venis en mian cerbon. Mi transformis ilin en muzikajn notojn kiuj sonas tra la tuta filmo, kaj kreis la muzikan figuron de Keli. La preludo de la filmo "Oraj Orelringoj kaj Fera Ŝpato" elkantis ilian foren-vidan animstaton per jaŭ-nacia popolkanto "Montoj post montoj kaj la senlima firmamento . . ." La lasta sceno de la filmo prezentis dikajn maizojn elkulturitajn de Keli per la fera ŝpato kaj la ĝojan festadon de la jaŭ-oj por la riĉa rikolto. Ĉe tiu kazo mi pensis pri la ĝojo de la jaŭ-oj post la Liberiĝo suririntaj sur la kolektivan vojon kaj pri ilia granda idealo, kaj verkis ĝojan dancmuzikon kun la jaŭ-nacia stilo por la fino de la filmo.

Ekde tiam, pro la muzika verkado mi faris vizitojn al la regionoj loĝataj de tibetanoj, al Hiŝuanbanna kun altaj montoj kaj densaj arbaroj, al kamparoj de multaj provincoj, kaj ankaŭ al fabrikoj de Ŝanhajo. Ĉiufoje, kiam mi iris por profunde sperti la socian vivon, mi ricevis varmajn prizorgojn kaj helpojn el diversaj flankoj, kaj la spertita spirito de nia epoko inspiradas al mi kaj min instigas al verkado.

Jen kiel mi faras mian muzikan verkadon en la patrolando!

* *sona-o* estas speco de blova muzikilo iom simila al hobbo.

da brilaj kaj mildaj okuloj. Anstataŭ sidi sur la ĉaro, li piediris apud la du malgrandaj siĉuanaj ĉevaloj. Kiam li aŭdis la krimon de Hjue Huj sur la ĉaro, li mallaŭte krihaltigis la ĉevalojn kaj la ĉaro ekhaltis.

Hjue Huj saltis de sur la ĉaro kaj ĝin sekvante paŝadis senĝene sur la kota vojo. Ŝi trovis, ke la irado estas pli facila.

Ordinare ŝi estis neparolema, sed hodiaŭ kontraŭe ŝi forte volis interparoli kun aliuloj. Kiel ŝi deziris ke la ĉarkondukanta maljunulo diru al ŝi ĉion pri Mopan-monto. Kiel iras tie la mekanikigo, elektrigo, kemiigo kaj akvoutiligo? Ĉu tie sin trovas laboratorio? Kia estas la direktoro de la farmo? Ĉu estas sufiĉe multaj junuloj? Ŝi eĉ volis scii la novaĵojn tieajn. Sed bedaŭrinde la maljunulo estis ĝuste tia silentemulo kia ŝi mem.

Post turniĝo de la vojo ĉirkaŭ montpinto la ĉaro alvenis al akvodisiga monto kaj estis baldaŭ suprenironta krutan deklivon. Arkiginte sian dorson kaj nazbruante, la malgrandaj siĉuanaj ĉevaloj paŝis antaŭen kun malfacileco. La maljunulo rapide retiriĝis malantaŭ la ĉaron kaj puŝis ĝin per sia tuta forto, tiel helpante la ĉevalojn. Ŝvelruĝiĝis lia kolo kaj vaporis lia griza verto. Vidinte tion, ankaŭ Hjue Huj sekvis lian ekzemplon kaj donis helpon apude. Dank' al la klopodo de la du homoj kaj du ĉevaloj la ĉaro malrapide supreniris la monton.

Tutforte puŝante la ĉaron Hjue Huj ne rimarkis, ke ĝi jam atingis ebenajon. La radoj ektorniĝis pli rapide, sed ŝia korpo ne antaŭeniĝis konforme, kio


rezultigis ke ŝi falis en la koton. Ektimigite la maljunulo haste demandis: "Ĉu vi kontuziĝis ie? Ĉu grave?" Parolante li kliniĝis por ŝin levi.

Hjue Huj stariĝis kaj honteme ridis: "Neniom, efektive neniom. . . ." Tiam ŝi ekrimarkis trueton en unu el la sakoj sur la ĉaro. Sekve ŝi rapide elprenis bulon de papero el la valizo kaj ĝin ŝtopis. La maljunulo ŝin rigardis per siaj brilaj kaj bonkoraj okuloj, en kiuj montriĝis kareso kaj admiro. Ŝi sentis varmecon en la koro.

Kiam ili transpasis la akvodisigan monton, sterniĝis antaŭ ili malvasta baseno ĉirkaŭita de montoj: En la bonordaj kampoj la malfrua rizo estas jam finrikoltita. Pelante dekojn da bubaloj laboristoj entreprenas aŭtunan plugadon. Kelkaj lignaj domoj staras senlukse kaj elegante sub la montpiedo. Ju pli rigardis Hjue Huj, des pli ŝi ĝojis. Ŝi pensis en si mem: Jen estas la loko kie mi enradikiĝos, kreskigos foliojn, floros kaj donos fruktojn.

II

Post kiam Hjue Huj helpis la maljunulon deĉarigi la superfosfatan sterkon, la suno jam subiris. Sendinte la du malgrandajn ĉevalojn al la ĉevalejo, la maljunulo revenis por porti la ledan kofron kaj litaj-pakon de Hjue Huj. Ŝi rapidis haltigi lin dirante: "Mi mem ilin portu! Mi mem ilin portu!" Sed la maljunulo estis tiel rapidmova, ke li jam prenis ambaŭ, unu pomane, kaj foriris. Hjue Huj povis nur porti la plastikan valizon kaj lin sekvis. Ŝi tre ĝeniĝis de hontemo kaj ruĝiĝis ŝia vizaĝo: Kiel



Ilustritaj de Li Fu

maldece estas ke la pakajojn de junulino devas porti avo grizhara!

Sed antaŭ ol ŝi povis multe pensi, ili jam alvenis al la pordo de la oficejo de la farmo. La maljunulo demetis ŝiajn pakajojn ekster la pordo kaj kondukis ŝin en la oficejon. En la oficejo plene sidis viroj kun nudaj piedoj. La nazon ekscitis miksitaj odoro de tabako, ŝvito kaj tero. Apud la skribtablo sub la fenestro sidis junulo kiu telefonis kun flanken klinita trunko. De tempo al tempo li blovis sur la parolilon, kriante: "Haloo! Haloo!" Kiam la nudpieduloj vidis ilin, ili kapklinis al la maljunulo. Iuj cedis siajn sidlokojn al ili, dum aliaj demandis mallaŭte: "Avo Haj, ĉu vi fariĝis hodiaŭ 'kondukisto de ĉaro?'" "Avo Haj, ĉu vi estas certa pri la traktoj?" La maljunulo nur senĉese kapjesis senvorte. Ĉar oni estis telefonanta, neniu devis paroli laŭte.

Hjue Huj rimarkis, ke ĉiuj nudpieduloj rigardas ŝin scivoleme. Ŝi iom konfuziĝis, sed ŝajnigante sin nenion rimarkinta sidiĝis apud la maljunulo senĝene, kun la okuloj fikserigardantaj la fenestron. La maljunulo ĵetis rigardon al la telefonanta junulo kaj flustris al Hjue Huj: "Li estas nomata Zoŭ, la direktoro de ĉi tiu farmo."

Hjue Huj tion memorigis al la koro. Tiam la juna direktoro ankoraŭ kriadis al la telefon-parolilo. Evidente la interligo de telefon-komuniko estis malfacila. Estis la unua fojo, ke ŝi vidis tian oficejon kaj ankaŭ la unua fojo, ke ŝi vidis tiel malfacile interligeblan telefon-komunikon. Sekrete ŝi observis la junan direktoron Zoŭ. Kvankam ŝi vidis nur lian profilon, ŝajnis al ŝi ke li estas iom konata. Kun aĝo de dudek-kvin-ses jaroj, li portis ruĝan trikotveston, aspektante verŝajne gimnastika sportisto. Ankaŭ li estis nudpieda, sed li havis plaĉan aspekton. Senorde pendis inter la brovoj tufo da mallongaj haroj en junula stilo. Ĉu li ja estas la direktoro? La direktoro laŭ ŝia supozo ne povas esti tia. Li estas tro juna por povi direkti farmon! Tia homo estus tre taŭga por sportoj.

Hjue Huj meditis silente. Finfine la juna direktoro sukcesis interparoli kun la alia fino de la telefon-linio. Ŝi aŭdis lian urĝan kaj laŭtan voĉon: ". . . Kio? Teknikistino? Ne, ne, neeble, kamarado! Ni ne akceptas! Nek diplomiton el regula universitato! Bonvolu ne esti tiel korfavora al ni! Aj, ni multe suferis de tia aranĝo. Neniu teknikistino povas trankvile labori en nia Mopan-monto. . . . Malnova kamarado, tio ne estas empiriismo. Ĉu vi ankoraŭ rememoras tiun Ĝaŭ Manping? Ŝi ĉagreniĝis ekvidinte monton, asertante ke oni mortus pro melankolio en la montaro. Kio? Jam surmontiĝis? Avo Haj konsentis, ke ŝi venu? Ne, ŝercu. Avo Haj ne povas konsenti. Ne, eĉ se ŝi surmontiĝos, ni petos ŝin reiri."

Finparolinte la direktoro demetis la aŭskultilon.

Ĉiun vorton Hjue Huj aŭdis klare. Evidente li parolis pri ŝi mem. Ŝi sentis la tutan korpon pikita.

Rapide stariĝinte kaj ruĝiĝinte, laŭte ŝi diris: "Kamarado direktoro, via sinteno estas erara. Mi decideme venas en la montaron. Mi ne foriros, eĉ se vi min pelos!"

Surpriziĝis la juna direktoro, turnis la kapon kaj trovis la koleregan Hjue Huj, kies korpo estis kovrita de polvo. Li ne sciis kion diri. Ankaŭ la nudpiedaj viroj en la ĉambro miroplene rigardis la urban knabinon, sed neniu eldiris ion.

La atmosfero fariĝis tre streĉita. Kuntirinte la brovojn, la juna direktoro rektigis la korpon kaj demandis la maljunulon: "Ĉu vi akompanis tiun ĉi kamaradinon sur la monton, Avo Haj?"

La maljunulo respondis malrapide: "La decido de kamaradino Hjue estas tre firma. Ankaŭ la superaj instancoj aprobis ŝian venon. Ŝajnas al mi, ke estas ankaŭ bone!"

Aŭdinte tion, la direktoro kun kuntiritaj brovoj kiel antaŭe sin turnis kaj diris al iu junulo: "Eta Liu, unue ripozigu k-dinon Hjue. Donu al ŝi sufiĉe multe da varma akvo."

Malĝojo plenigis Hjue Huj, sed ĉar oni ankoraŭ daŭrigos la kunvenon, ŝi ne devis kvereli. Tial sekvante Etan Liu, ŝi eliris el la oficejo.

III

Post kiam Hjue Huj vespermanĝis en la manĝejo de la laborantoj, ŝi revenis en la "gastoĉambro" kaj trovis ke en la mezo de la ĉambro staras du grandaj siteloj da varma akvo. Tio simple miregigis ŝin. Ĉu unu persono bezonas tiom da varma akvo!

Ŝi iom sin lavis kaj ŝanĝis la vestojn. Iom post iom mallumiĝis. En la malpleneca gastoĉambro fariĝis malvarmete. Ŝi pensis en si mem: Kiel bone se estus nun fajrujo de lignokarbo. Sed la kadroj kaj laboristoj de la farmo ankoraŭ kunvenas kun piedoj nudaj!

Trans la tabulmuro ŝi aŭdis laŭtan diskutadon en la oficejo. Ju pli brue estis tie, des pli neelporteblian solecon ŝi sentis en la gastoĉambro.

Post nelonge aŭdiĝis de la oficejo movoj de seĝoj kaj tuj poste bruaj voĉoj de viroj. Hjue Huj pensis ke la kunveno estas finita. Ŝi rapide eliris el la gastoĉambro kaj haltis en la koridoro por renkonti la junan direktoron. La estroj de la produktaj grupoj pasis preter ŝi unu post alia, sed ŝi ne vidis direktoron Zoŭ. Nur post tre longa tempo ŝi vidis lin venanta el la oficejo kun Avo Haj. Ili iris ŝultron ĉe ŝultro, kvazaŭ pridiskutante ion. Hjue Huj rapide haltigis la direktoron kaj demandis: "Kamarado direktoro, ĉu vi povas asigni al mi laboron ĉivespere?"

Iomete kuntirinte la buŝangulojn, direktoro Zoŭ diris: "Vi ripozu unue. Hodiaŭ vespere ni fosos la grundon por tritiko."

"Ĉu morgaŭ matene?" demandis Hjue Huj persiste.

Embarasiĝis la direktoro, kies kapablohava teniĝo malaperis neniŭ sciis kien. Li respondis balbutante: “Nu, bone, ripozu kaj ni interparolu morgaŭ.”

Avo Haj staris apude sen ajna vizaĝesprimio. Hjue Huj iom ĉagreniĝis kaj ne parolis plu. Post kiam ŝi okule akompanis la junulon kaj la maljunulon en la manĝejon de la laborantoj, ŝi malgaje revenis en sian gasteĉambro.

Sidante antaŭ la malhela petrola lampo, Hjue Huj pli kaj pli maltrankviliĝis. Ŝi pensis: Jen studentino, kiu decidis kun plena entuziasmo oferi sian junecon al la grandioza konstrulaboro de mont-regiono, eĉ fariĝis persono nebonvena. Kia strangaĝo! Ho, ŝi ne volis pensi plu, kaj rekte blovestinginte la lampon, ŝi kuŝiĝis por dormi, atendante la interparolon morgaŭan. Sed Hjue Huj ankoraŭ ne povis endormiĝi. Pli kaj pli ŝi koleriĝis pro direktoro Zoŭ. Tiel juna kaj subjektiva, li neniom taŭgas por esti direktoro!

Atakite de diversaj konfuzaj pensoj, la necedema Hjue Huj turmentiĝis dum pli ol duonnocto.

IV

Ne havinte bonan dormon dum la nokto, Hjue leviĝis por lavi al si la vizaĝon tuj kiam heliĝis la sekvintan matenon. Neatendite, ŝi ree renkontis la junan direktoron Zoŭ. Ŝi demandis iom malafable: “Kamarado direktoro Zoŭ, parolu kun mi hodiaŭ pri laborasigno al mi!”

Aspektante ĝenita, la direktoro sin ekskuzis dirante: “Prefere vi ankoraŭ iom ripozu! Hodiaŭ mi ne povas tion fari, ĉar estas multe da laboroj.”

Hjue Huj ekkoleris. Kun hasto ŝi kontraŭdemandis iom sencere monie: “Kiam vi do povas esti libera? Ĉu interparolo kun mi pri laborasigno ne estas via devo?”

Embarasiĝis la direktoro. Li nur povis diri: “Pli bone vi ankoraŭ iom ripozu!”

Hjue Huj ekstremis pro kolero. Ŝi laŭte kriis: “Mi venas por labori, sed ne por ripozi!”

Anstataŭ koleri, la direktoro diris indifere: “Nu, mi komprenas tion. Sed por diri la veron, ni ankoraŭ interparolas kun la sekcio pri personaraj aferoj, esperante ke vi reiros al la Oficejo de Agrikulturo. Labori en urbo estas pli konvene por vi, ĉu ne?”

Tiuj vortoj pli kolorigis Hjue Huj. Ŝi kriegis: “Mi volonte venas al Mopan-monto, kaj krom ĉi tie mi laboros nenie!”

Ĵetinte ekrigardon al la teknikistino, la direktoro diris ankoraŭ afable: “Bone, sed vi unue ripozu!” Post tio li ĉirkaŭiris for.

Melankolie Hjue Huj staris tie longan tempon kunpremante la lipojn, kun larmoj en la okuloj.

Ŝi revenis al la gasteĉambro kaj sentis sin pli soleca. Kiam ŝi ekpensis, ke ŝi ankoraŭ loĝas en “gasteĉambro”, ŝia vizaĝo iom ekflamiĝis. Subite iu penso venis en ŝian kapon: “Ili rigardas min kiel gaston. Kial mi ne klopodu fariĝi mastro?”

Farinte decidon, ŝi iris el la gasteĉambro kaj fluge kuris al la kampoj.

Ŝi kuregis sur la kampovojoj. De malproksime aŭdiĝis laborkrioj. Ŝi daŭre kuris antaŭen kaj trovis murmurantan riveron ŝin baranta. Dekoj da laboristoj estis tie, iuj staris en la akvo, aliaj transportis grandajn trabojn kaj ankoraŭ aliaj svingis martelojn por enbati palisojn. Apud la rivero estis starigita ligna tabulo, sur kiu skribiĝis linio da grandaj ruĝaj ideografiaĵoj: “Konstruu grandan lignan ponton por bonvenigi la traktorojn!” Ekvidinte tion, Hjue Huj tuj komprenis ĉion. Ŝi rapide demetis siajn ledŝuojn kaj returninte supren la pantalon-tubojn eniris en la fluon. Ŝi penetris en la homamason portantan trabegon kaj alproksimigis sian ŝultron al la granda trabo portata de aliaj homoj. Kiam ŝi estis baldaŭ ekironta samtakte kun la paŝoj de la laboristoj, subite eksonis voĉo de la juna direktoro ĉe ŝia orelo: “Kamaradino Hjue, pro kio vi venis ĉi tien? Tuj reiru!”

Aŭdinte la flegmajn vortojn, Hjue Huj ilin tute ignoris kaj daŭre iris paŝon post paŝo. Kiam ŝi



demetis la trabon kaj revenis al la bordo, iu granda mano ekpemis ŝian ŝultron. Ŝi returnis la kapon kaj vidis ke li estas neniu alia ol direktoro Zoŭ. Ŝi skue sin liberigis, dirante: "Lasu min!" Tamen direktoro Zoŭ volis neniom cedi. Sekvante Hjue Huj, li severe diris: "K-dino Hjue, tuj reiru!"

Des pli koleris Hjue Huj. Ŝi levis per ambaŭ manoj ŝtipon pezan je dekoj da ĝinoj kaj plaŭdante vadis trans la riveron disjetante akverojn.

Kiam ŝi returniĝis, ŝi vidis ke Eta Liu kiu antaŭe pretigis varman akvon por ŝi estas ĝuste mangestanta al Avo Haj kaj aŭdis de malproksime la voĉon de la lasta: "Verŝajne ŝi decidis enradikiĝi en Mopan-monto. Lasu ŝin!"

Silentis direktoro Zoŭ. Hjue Huj ne zorgis pri ilia diskutado kaj daŭrigis la portadon de ŝtipoj.

Laborinte tutan tagon sur la konstruejo de la ponto, ŝi tute ne sentis sin malvarma. Tio eĉ mirigis la laboristojn.

V

Kiam la suno malsupreniris, la laboristoj konstruantaj la ponton ĉesis labori.

Hjue Huj revenis kun la homamaso al la oficejo de la farmo. Ŝi sentis, ke ŝi pasigis tagon riĉenhavan kaj la soleco sentita hieraŭ nokte jam formalaperis.

Post la vespermanĝo kaj finlavinte al si la vizaĝon, ŝi revenis al la gastoĉambro.

Kiam ŝi puŝmalfermis la pordon, varma aerfluo alblovis kontraŭ ŝin kvazaŭ printempa zefiro. La petrola lampo estis jam lumigita kaj sur la tero kuŝis fajrujo kun brulanta lignokarbo, sur kies rando estis

du grandaj bakitaj batatoj bonodorantaj. Sur tableto troviĝis lian-telero, kiu estis plenplenigita per sunfloraj semoj, bakitaj arakidoj kaj dolĉaj sekigitaj persimonoj.

Hjue Huj multe miris. Kiu faris tion? Kaj pro kio?

Ĝuste kiam ŝi estis konfuzita, subite envenis ridante la juna direktoro. Hjue Huj rimarkis, ke li ne plu havas tian rigidan instruan mienon kiel antaŭe, sed aspektas kvazaŭ veterana atleto. Tia ŝanĝo tamen igis ŝin ĝenata kaj hontema. Ŝi ne salutis, sed nur stulte staris. Direktoro Zoŭ ekparolis la unua: "K-dino Hjue, ni pridiskutu ĉivespere por fari decidon pri via laboro."

Hjue Huj simple ne sciis kien meti la manojn kaj piedojn kaj respondis tro simple: "Bone."

"Kial vi staras? Sidiĝu, sidiĝu!" Direktoro Zoŭ sidiĝis unue. "Ni atendu la partisekretarion. Li ankoraŭ estas okupata de io. Ni preparolu post kiam li venos."

Hjue Huj silentis plue, kaj nur sidiĝis senvorte.

Ŝi malklare sentis: "Mi nepre vidis la direktoron ie antaŭe."

Direktoro Zoŭ fariĝis pli kaj pli gaja. Li diris: "Malgraŭ ke nia farmo estas malgranda, tamen ĝiaj taskoj estas ne malpezaj. En nia gubernio sin trovas multaj montoj kaj la tero estas alta, pli ol mil metrojn super la marnivelo. Ĉiuj akvokampoj estas malvarmaj. Niaj naturaj kondiĉoj estas malsamaj ol tiuj de la ebenaĵoj. Nia farmo devas elkulturi bonajn speciojn konvenajn al la klimato de tiu ĉi gubernio kaj ilin disvastigi en la tuta gubernio. Ĉijare ni sukcesis kreskigi durikoltan rizon. La provinca registaro donos al ni du akvokampajn traktorojn. La elektro-stacio ĉe Nianju-rivero komencos funkcii en unu monato. Ni studis malmulte kaj ne estas teknike kompetentaj. Ĉu vi pensas, ke ni ne bezonas universitatajn studentojn? Ni bezonas ilin tro urĝe. Sed ne taŭgas tiuj, kiuj ne havas la decidemon labori en montregiono dum sia tuta vivo."

Iu konata voĉo skuekis Hjue Huj el ŝia profunda meditado. Kiel bone konataj estas la vortoj "ne taŭgas tiuj kiuj ne havas la decidemon labori en la montregiono dum sia tuta vivo"! Neforgesebla impresio pliklariĝis en la cerbo de Hjue Huj.

En 1959, kiam Hjue Huj estis ankoraŭ unuajara studentino en la agronomia kolegio, iu dudek-unuajara labormodelo agrikultura venis al ilia kolegio por doni raporton pri la temo kiel plialtigi la produktokvanton de rizo en montregiono. La raporto forte ŝin impresis, kaj pli neforgesebla estis tio ke la raportinto nur





La Pereo de la Simio

Ilustritaj de Li Juhong

IAM antaŭe vivis maljuna azeno en profunda montaro. Tie dense kreskis herboj, tial li povis laŭplaĉe manĝi je malsatiĝo kaj iri al proksima fonto por trinki kiam li soifis. Kvankam kalduka, tamen li vivis senzorge kaj senĝene.

Iun tagon, satmanĝinte kaj sufiĉe trinkinte la maljuna azeno kuŝis sur la mola tapiŝo de verdaj herboj. Subite aŭdiĝis muĝego de sur la kontraŭa montsupro. Li ekrigardis kaj vidis, ke striita tigo sin jetas malsupren de sur la monto. Tion vidinte la maljuna azeno ekstarigis timtremante. Li pensis: jam ne eblas por li forkuri; se li restos, li certe ne povos savi sian vivon. Ĝuste en tiu danĝera momento la azeno subite elpensis artifikon. Kun la okuloj rondigitaj, la oreloj alte levitaj kaj la vosto rigide starigita li fikse rigardis la al li sinjetantan tigron.

Alproksimiĝante al la azeno la malsata tigo vidis, ke la azeno staras senmove. Li surpriziĝis. “Mi for-

manĝis milojn da azenoj en la montaro,” pensis la tigo, “kaj min ekvidinte neniu el ili ne timegis ĝis ekurino. Sed kial tiu ĉi maljuna azeno male tiel arogantas?” Ĉe tiu ĉi penso la tigo stultiĝis.

Vidinte la stultiĝon de la tigo, la azeno sciis, ke li jam estas superruzita kaj profitante la okazon tuj diris senprokraste:

*Pintaj oreloj, longa makzelo,
Nomiĝas mi la Besta Reĝo,
Hierau mi du tigrojn manĝis
kaj unu lupon mi ĵus frandis!*

Tion aŭdinte la tigo terure timiĝis kaj sinturninte kuregis for. Transkurinte du montojn je unu spiro la tigo ekmalrapidigis la paŝojn kaj murmuris al si bruspiregante: “Aj! Feliĉe mi ne estas malsingarde-ma, alie mia vivo estus forrabita de la Besta Reĝo!”

finis sian lernadon en supera popollernejo, sed dank’ al sia energia studo dum kelkaj jaroj li jam povis klarigi ĉion klare kaj bonorde, kombinante teorion kun praktiko. Tiam la junulino Hjue Huj kiu decidis studi agronomion estis multe kuraĝigita. Dum la pasintaj kelkaj jaroj ŝi aŭdis la profesorojn menciigi pli ol unu fojon, ke en la sudo de nia lando la montregionoj okupas du trionojn de la tiea areo kaj sekve estas gravege plialtigi la produktokvanton de la rizkampoj en la montregionoj. Tial ŝi ĉiam pensis pri la montregionoj, kaj eĉ songis pri ili.

Ŝi bone memoris, ke la raportinta junulo havis ĝuste la saman tonon, la saman mienon kaj la saman parolmanieron. . . . Ju pli ŝi pensis, des pli ŝi certigis ke ŝi estas prava. Post momento ŝi mallaŭte diris: “Mi havas ion por vin demandi, direktoro.”

“Kion do?” demandis la direktoro senkomprene.

“Ĉu vi vizitis nian lernejon antaŭ tri jaroj?” demandis Hjue Huj kun pli da kuraĝo. Aŭdinte tion, direktoro Zoŭ diris kapjesante: “Mi lernis multe ĉe via lernejo.” Anstataŭ daŭrigi la temon, li tiutempe prenis el la lian-telero manplenon da sunfloraj semoj kaj ilin manĝante diris: “K-dino Hjue, manĝu, prenu. La partisekretario preparis ilin por vi. Manĝu!”

Iom ruĝiĝante Hjue Huj facilmove prenis kelkajn sunflorajn semojn.

“Tro kruda mi estas por agi dece. Estu pardonema al mi,” diris direktoro Zoŭ malkaŝeme. “La vera mastrumanto ĉi tie estas la partisekretario, kiu estas efektive bona mastrumanto. Vi ankoraŭ ne

komprenas lin, ĉar vi nur malmulte kontaktis kun li.” “Mi ankoraŭ ne vidis la partisekretaron!” diris Hjue Huj.

“Fakte jam! Lin vi jam vidis plurajn fojojn,” diris direktoro Zoŭ, “sed vi ankoraŭ ne komprenas lin. Li estas efektive homo kun granda ambicio. Kiam mi aliĝis al la Junulara Ligo, li jam estis la sekretario de nia Distrikta Komitato. Poste la superaj instancoj decidis transpostenigi lin kiel estron de juĝejo, sed li prezentis kelkajn petskribojn kaj ne iris enoficiĝi. Delonge li celis Mopan-monton kaj firme volis ĝin ekspluati. Li jam laboris ĉi tie dum dek jaroj. Kamaradino, sur ĉiu colo da tero en Mopan-monto troviĝas lia ŝvito!”

“Li nepre devas esti tre severa, ĉu ne?” Hjue Huj estis ne plu tiel ĝenata kiel antaŭe. “Ne, tute ne,” respondis la direktoro laŭte. “Li parolas malmulte, sed estas plej afabla al la popolamaso. Tamen, liaj postuloj al la gejunuloj estas precipe rigoraj. Li ne diras al vi dolĉaĵon. Tiujn, kiuj nur parolas senage, li plej malŝatas. Li ne flegas nin gejunulojn kiel kanariojn, nek nin dorlotas. . . .”

Subite malfermiĝis la pordo de la ĉambro kaj iu envenis—ĝuste la grizhara maljunulo Avo Haj, la ĉarkondukinto.

“Avo Haj! Kamarado sekretario!” stariĝis Hjue Huj, salutante per tremanta voĉo.

Ŝajnis, ke troviĝas fajrujo en ŝia koro, kiu flamiĝas sian tutan korpon.

Ĝuste en tiu momento renkonte venis al li lia intima amiko—la simio, kiu portis en la maldekstra mano korbon da persikoj kaj sovaĝaj beroj kaj tenas longan ŝnuron en la alia. Ekvidinte la tigron li diris ridante: “Ho, fratego mia! Hodiaŭ mi speciale kolektis korbon da persikoj kaj sovaĝaj beroj por esprimi mian respekton al vi. Mi trakuris kelkajn montegojn por vin trovi sed vane, tute ne atendite, jen mi renkontiĝas kun vi.”

La tigro iom trankviliĝis kaj manĝegante la fruktojn diris ĝemspirege: “Mia frateto! Mi estus jam formanĝita de la Besta Reĝo, se mi ne havus prudenton!” Aŭdinte tion la simio palpebrumigis siajn ruĝajn okulojn kaj demandis surprizite: “Kio okazis al vi? Diru al via frateto.” Do la tigro detale rakontis al li pri sia renkontiĝo kun la maljuna azeno. Ne finaŭskultinte la rakonton, la simio ekridegis nereteneble: “Aj! Fratego, vi estas tro kredema. Ekde antikveco ĝis nun kiu ne scias ke vi estas la reĝo de bestoj? Evidente, vi estis trompita de la maljuna azeno. Iru, mi iros kune kun vi por formanĝi la abomenulon.”

La tigro bone scias de longe, ke la simio estas tre saĝa. Informite ke li estis trompita, la tigro ekmuĝegis kolere. Survoje la simio diris: “Fratego! Vi iras rapide, sed mi—malrapide. Jen troviĝas ŝnuro ŝtelita de mi for de brulligno-hakisto. Ni ligu vian voston per unu el ĝiaj ekstremoj kaj mian kolon per la alia. Se okazos io eventuala, tiam vi forkuros kuntenante min, kaj tiamaniere ni povos forkuri pli rapide, ĉu ne?” La tigro konsideris lian diron tute prava kaj faris laŭ lia propono. Poste ili furioze kuris malsupren.

Tiutempe la azeno estis trinkanta ĉe la fonto. Aŭdinte la koleran muĝon de la tigro li levis la kapon kaj vidis, ke la tigro estas furioze sin ĵetanta sur lin posttenante la simion. La azeno tuj komprenis, ke certe la simio malkaŝis al la tigro lian mensogon kaj instigis la tigron por murdi lin. Li cerbumis kaj de-



nove kaptis ruzan ideon. Kun pli forte rondigitaj okuloj, pli alte levitaj oreloj kaj pli rekte starigita vosto ol lastfoje li pozis tre digne kaj najlis sian rigardon sur la tigron kaj simion.

Rimarkante ke la azeno estas des pli trankvila ol antaŭe, la tigro denove stultiĝis. Kaj la simio, pro trorapida kurego sur la vojo, tiam nur spiregis senĉese sed ne povis ellasi eĉ unu vorton. La azeno tuj kaptis la bonŝancon kaj laŭte diris malrapide kaj trankvile:

*Vidiĝas pin' en foro, kaj en proksim' soforo.
De kie venas vi, simio sen valoro?
Hieraŭ vi promesis du tigrojn al mi doni,
sed kial nun per unu volas vi friponi?*

Aŭdinte tion la tigro tuj turnis sian kapon al la simio kaj vidis ke tiu ĉi kun larĝe malfermita buŝo ne povas eldiri eĉ unu vorton. La tigro opiniis, ke li estas trompita de la simio, li tuj sin turnis kaj kuregis for. Nur post transkuro de kelkaj montoj li ekhaltis kaj vidis, ke la simio jam mortis kun korppleno da vundoj kaj disrompita kapo. Sed eĉ la pereado de la simio ne sufiĉis por estingi la koleregon de la tigro, tial tiu ĉi dispecigis la simion per siaj ungegoj kaj ĝin formanĝis.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ

NOVA VIVO DE GOLAŬ-OJ

Golaŭ-nacio estas unu el la plej malgrandaj nacimalplimulto en la Sudokcidento de Ĉinio. La golaŭ-oj loĝas en mont-regionoj de Gujĝoŭ-provinco. Antaŭ la Liberiĝo en 1949, tiu ĉi nacio alproksimiĝis al pereado pro kruelaj subpremado kaj nacia maljusto.

Sed post la Liberiĝo ili ricevis teron kaj monhelpojn de la registaro. Ili sin organizis en kolektiva agromastrumado kaj disvolvis agrikulturan produktadon. Multaj golaŭ-aj familioj transloĝiĝis de siaj ter-domoj al nove konstruitaj

domoj kun tegolaj tegmentoj.

Lernejoj estas fonditaj en la golaŭ-areoj, kaj parto de la junaj golaŭ-oj fariĝis eĉ kuracistoj, instruistoj, traktoristoj kaj agrikulturaj teknikistoj.

LONGDISTANCA NAĜADO

Long-distancaj konkursoj de naĝado trans riveroj kaj lagoj estis okazigitaj en lasta julio en multaj urboj de Ĉinio.

1,800 studentoj de pekinaj altaj lernejoj faris naĝkonkursojn de 1,200 m. (por viro) kaj 600 m. (por virino). Sam-nombraj lernantoj de

la mezlernejoj faris 600-metran translagan naĝadon en Kunming-lago de la Somera Palaco.

Kaj en Vuhan de Hubej-provinco la naŭa ĉiujara naĝ-konkurso trans Jangzi-rivero kun larĝo de 5,000 metroj okazis en julio kiel kutime. Partoprenis preskaŭ 700 naĝemuloj. El ili la plej junaj estis du dek-jaraj geknaboj, kaj la plej maljuna estis 60-jaraĝulo.

En la nordorienta urbo Harbino pli ol 200 naĝantoj transnaĝis Sungari-riveron malgraŭ la iom malvarma vetero.




V E J Ĉ I O

II. ELEMENTAJ TAKTIKOJ (Daŭrigo)

9. Allimiĝo

ALLIMIĜO estas ŝtonmeto etendiĝanta al la limo. Ĝi estas sufiĉe efika rimedo por sindefendo kaj atako en la vejĉi-ludo.

Diag. 41



En Fig. 1 de Diag. 41 la tri nigraj ŝtonoj Ĉ3, Ĉ2, Ĉ1 ŝajnas esti fortranĉitaj de la blanka ŝtono D2. Se la nigra flanko volas ilin ligi kun la dekstraj nigraj ŝtonoj per 1 D1, tiam la blanka respondos per oferludo 2 E1, kaj la ludo progresos jene: 3 F1+, 4 D3 (minacanta je E1 la 4 ŝtonojn Ĉ3, Ĉ2, Ĉ1 kaj D1), 5 E1, 6 Ĝ2, kaj la tuta nigra grupo estos pereigita.

Sed se la nigra flanko faros ŝtonmeton allimiĝan ĉe E1, kiel la fig. montras, tiam la 3 maldekstraj nigraj ŝtonoj estos savitaj. Ĉar tiam se la blanka volos ilin fortranĉi per 2 D1, la nigra tuj respondos per 3 D3+2; se la blanka volos ligi D2 per 2 D3, la nigra interligos siajn du grupojn per 3 D1.

Fig. 2 de la sama Diag. montras ke allimiĝo estas tre utila por vivi iun grupon. 1 K1 estas ŝtonmeto de allimiĝo. Per ĝi la enfermita blanka grupo estas sekurigita. Ĉar tiam se la nigra volos detrui per 2 M1 la okulolokojn de la blanka, la lasta povos fari alian allimiĝon 3 J1, kaj forkapti la 3 nigrajn ŝtonojn Ĵ3, K3 kaj Ĵ2; se la nigra ludos unue 2 J1+2, tiam la blanka jam povos kompletigi siajn du okulojn per 3 M1.

Diag. 42




Fig. 1 de Diag. 42 montras atakan forton de allimiĝo. La enfermita nigra grupo ŝajnas esti jam sekurigita. Ĉar ĝi havas unu veran okulon maldekstre, kaj ĉe la limo ĝi havas sufiĉe grandan lokon por fari alian. La sola blanka ŝtono D2 interne de ĝi, ŝajnas esti nur morta ŝtono. Sed se la blanka faros allimiĝon 1 D1, la tuta nigra grupo estos detruiita. Ĉar ĉe neniu flanko de la du blankaj ŝtonoj la nigra povos ilin minaci. Kontraŭe tiuj du blankaj ŝtonoj povos minaci la 4 dekstrajn ŝtonojn je E1 kaj tial pereigos la tutan nigran grupon.

10. Rekonkero


REKONKERO estas metodo konkeri post cedo. Ĝi povas turni krizan situacion en favoran.

Vidu Fig. 2 de Diag. 42. La enfermita blanka grupo havas nur unu okulon. Estas malfacile por ĝi fari alian, kvankam nun estas la vico ĝia. Tion helpus neniu el la jenaj ludoj: 1 M2, 2 L2, 3 L1, 4 L3, aŭ 1 L2, 2 M2. Tiuokaze la taktiko rekonkero multe utilas. Jene estas la tuta procezo: 1 M2, 2 L2 (minacanta la 4 blankajn ŝtonojn), 3 L3, 4 L1+4, 5 M2, kaj fine la blanka rekonkeros parton de la perdita teritorio kaj kreos tie la alian okulon.

Taktikoj de la vejĉiludo estas tre variaj. Tamen se oni bone komprenas la elementajn, la ceteraj povos esti analogie komprenataj. Pro limiĝo de la spaco, ni do finu tiun ĉi ĉapitron ĉi tie.



Maldekstre:
Fu Daging rompis la landan rekordon de centmetra liberstila naĝkonkurso per la rezultato de 55.4 sekundoj.
Foto de Lin Ĉengguo



Supre:
Tian Ĝaŭgong, sportisto de tripaŝa longsalto rompis la landan rekordon per sia rezultato de 16.58 metroj.
Foto de Huang Johan



KELKAJ NOVAJ REKORDOJ

de la Ĉina Sporto
en 1964

(Ĝis Komenco de Sept.)



Maldekstre:
21-jara sportistino Wu Fuŝan kreis la landan rekordon de virina altsalto kun rezultato de alteco de 1.79 metroj.
Foto de Zeng Jing

Ĉen Gingkaj, ĉampiono de pezlevo, la 9-an fojon rompis la mondan rekordon en plumpeza eklevo kun rezultato de 151.5 kilogramoj.

Foto de Lu Ming



Han Ĉangĵuj kreis la rekordon de la landa konkurso pri "pafado al kuranta cervo" per 50 unuopaj pafoj kun la rezultato de 229 poentoj.

Foto de Hia Daŭling





Vortj signitaj per “*” estas klarigitaj en “Nia Vortareto”

NOFHAN

Letero al Malproksimaj Amikoj (IV)

Pri la t. n. “Incidento de Tonkin-golfo”

Karaj geamikoj,

Lastatempe mi renkontis en viaj leteroj ofte la demandon “Kio vere estas la ‘incidento* de Tonkin-golfo*’”.

Jes, Tonkin-golfo nun estas mond-konata. Estas inde koni ĝin iom pli bone kaj kompreni la esencon de la t. n. “incidento de Tonkin-golfo”.

Eble unue mi devas atentigi al Vi, miaj geamikoj, ke tiu ĉi golfo nun estas nomata Bacbo-golfo de post la sen-de-pend-iĝo de Vjetnamio, sed ne Tonkin-golfo kiel antaŭe kiam Vjetnamio estis ankoraŭ regata de Francio.

Kie estas tiu golfo? Ĝi estas ĉirkaŭata okcidente, norde kaj oriente de teritorioj de Vjetnamio kaj Ĉinio, kaj sude de ĝi estas la Suda Ĉina Maro.

La larĝo de la golfo, t. e. de la vjetnama mar-bordo* ĝis la mar-bordo de Hajnan-insulo de Ĉinio, estas nur ĉ. 287 kilometroj kaj ĝi estas 14,610 kilometrojn de Usono. Tamen la usonaj milit-ŝipoj batalprete rond-iras tie. Ĉu ne estas klare kion intencas la Usona Registaro?

Rilate la “incidenton”, mi povas diri al Vi, ke ĝi estas pura fabrikajo de la Usona Registaro. Tion oni povas klare vidi en la “informo pri la incidento de Tonkin-golfo” publik-ig-ita de Auther Sylvester, la helpa defenda sekretario de Usono, kaj la “kronologio* de la dua atako” publik-ig-ita de Rober McNamara, la defenda sekretario de Usono.

La du oficialaj informoj estas plenaj de kontraŭ-diroj. Ekzemple ili asertis unu kontraŭ la alia kaj jen tiel jen aliel pri la nombroj de atakitaj torpedaj* boatoj, kaj de la torpedoj* uzitaj kontraŭ la usonaj milit-ŝipoj. Ili eĉ ne povis cert-igi kiom da iliaj propraj aeroplanoj partoprenis la batalon, nek kiom da iliaj propraj ŝipoj estis atakitaj, nek la tempo-daŭro de la batalo.

Ĉiuj ja scias, ke la torpedaj boatoj havas altan rapidecon sed ne kapablon longe veturi kaj batali sur la maro. Tamen, laŭ aserto de la Usona Registaro ĝuste tiaj vjetnamaj torpedaj boatoj batalis kontraŭ usonaj milit-ŝipoj tri ĝis ses horojn sur maro pli ol sesdek mar-mejlojn* (ĉ. 110 kilometrojn) for de la marbordo! Ĉu tio ne estas granda mir-ind-ajo en la nuna epoko?

La fabrika odoro estas ĉie montrita en la tuta fabelo. Ĝuste pro tio ĵurnaloj en diversaj landoj kiel ekzemple *Le Monde* en Francio, *Yorkshire Post* en Anglio kaj la ĵurnalo-servo *Deutsche Presse-Agentur* de Okcidenta Germanio kaj multaj aliaj esprimis dubon pri tiu incidento.

Por popoloj en la mondo, precipe en Azio kaj Afriko, la fabrikiteco de tiu “incidento” estas pli klara. Neniu forgesas la ripetatajn vortojn de la Usona Registaro pri planoj puŝi la militon al Vjetnamio kaj eĉ al Ĉinio. La incidento fabrikita de la Usona Registaro mem ja servas ĝuste al tiu ĝia celo.

La usonaj agresantoj intencas kovri ĉies okulojn en la mondo per sia mano. Sed la fakto pravas, ke vane ili klopodas. Ĉu ne?

Kie Estas la Kato?

Foje Afanti alportis hejmen 1.5 kilogramojn da viando kaj diris al sia edzino: “Ni faru pasteĉojn* el ĝi por la vespermanĝo!”

Sed la virino kuiris la viandon kaj mem ĝin formanĝis. Por la vespermanĝo ŝi prezentis al Afanti nur farunajon.

“Kial ne pasteĉojn?” mire demandis Afanti.

“Ĉar la viando estis for-manĝita de la kato.”

Afanti kaptis la katon kaj metis ĝin sur la pez-mezurilon. Ĝi pezis 1.5 kilogramojn nek pli nek malpli.

Li demandis al la edzino denove: “Se ĝi estas la kato, kie do estas la viando? Kaj se ĝi estas la viando, kie do estas la kato?”



Ilustrita de Li Juhong

Nia Vortareto

Bordo — Tero laŭ-longe de la akvo de riveroj, lagoj aŭ maroj.

Golfo — Eta parto de maro ĉirkaŭata tri-flanke de la tero.

Incidento — okaz-ajo ne-kutima.

Kronologio — Laŭ-tempe aranĝita tabelo pri okaz-int-ajoj.

Mar-mejlo — Mezur-unuo por longeco sur maro.

Pasteĉo — Manĝajo kun viando interne kaj farun-ajo ekstere.

Torpedo — Sub-mara eksplod-ilo kontraŭ ŝipoj.



E-INSTRUADO EN 11 ALTAJ LERNEJOJ

Post 6-monata lernado en la Ŝtata Seminario por E-instruistoj, la lernintoj nun reiris al siaj universitatoj aŭ institutoj kaj tie instruas Esperanton.

Ĝis nun ekfunkciis aŭ daŭras E-katedroj en 11 altaj lernejoj en ses grandaj urboj de Ĉinio, nome: Pekino, Ŝanhajo, Vuhan, Ĉengdu, Hi-an kaj Hiamen. Oni povas diri, ke en multaj el la kulturaj centroj de Ĉinio nun Esperanto estas enkondukita en altaj lernejoj.

Por fondiĝo de tiuj E-katedroj la 11 altaj lernejoj faris multflankajn preparojn. Ili elektis instruistojn por la instruista E-seminario, aranĝita de la Eduka Ministerio, elektis ankaŭ lernemajn studentojn el aliaj fakultatoj por la E-kursoj. Esperantan literaturon antaŭe tute mankintan sed nun urĝe bezonatan, ili komencas kolekti.

Tio estas tute nova kaj senprecedenca en la historio de la ĉina E-movado. Ja la pli kaj pli vasta aplikado de Esp-o en Ĉinio, kaj en internacia sfero donis fundamenton por tia stato.

JAPANAJ ESPERANTISTOJ EN PEKINO

S-ano Ito Kenici, japana esperantisto, venis al Pekino en la pasinta aŭgusto kiel membro de la japana sciencista reprezentantaro por partopreni la Sciencon Simpozion de Pekino. Li estis invitita al tagmanĝo aranĝita de la Ĉina Esperanto-Ligo, kiun ĉeestis k-do Je Laiŝi, vic-prezidanto de la Ligo kaj aliaj estraranoj kaj laborantoj. Ili ĝoje interbabilis pri la Esp-movado de ambaŭ landoj kaj aliaj interesaj

temoj. S-ano J. Hokusima, alia japana esperantisto kaj vic-estro de la supredirita reprezentantaro, bedaŭrinde ne povis veni al la tagmanĝo pro okupateco.

LA VI-A BALTA E-TENDARO

Kiel kutime, ankaŭ ĉijare sovetianoj ĝuis Esperantujon. En Vejsejaj, urbo kie en 1885 loĝis kaj laboris D-ro Zamenhof, okazis la VI-a Balta E-tendaro, destinita por aktivuloj de E-movado. Partoprenis en ĝi 200 geesperantistoj el 54 sovetiaj urboj.

La programo estis riĉa: komuna matena gimnastiko, tribuno de Esperanta laboro, kunsidoj de fakuloj, somera universitato (12 prelegoj, ekz. "La nuntempa genetiko", "scienca metodo de porpaca laboro de prof. S. Ĉaĥotin", "Romidaj elementoj en la Internacia Lingvo" ktp), sporta olimpiado.

Eksterordinara evento en la vivo de la tendaranoj estis inaŭ-

guro de du Esperanto-stratoj, kie loĝis D-ro Zamenhof. Inaŭgurajn paroladojn faris Prezidanto de la urba plenumkomitato I. Petraŭskas kaj la sekretario de la tendara partia grupo M. Robinzonas.

La tendaro vekis grandan interesiĝon pri Esperanto en la loĝantaro.

E-LERNOLIBRO EN MONGOLIO

En Mongolio eldoniĝis 3000 ekzempleroj da aŭtodidakta lernolibro de Esperanto kompilita de prof. d-ro Rinĉen, membro de Scienca Akademio en Ulanbator.

ESPERANTISTINA SENATANO EN AFRIKO

S-ino Elizabeth Collins estas instruistino de muziko en la Universitato de Monrovia de Liberio. Ŝi eklernis Esperanton en 1963 kaj nun estis elektita senatano de Liberio por reprezenti graflandon. Laŭinforme ŝi komencas klopodi fondi grupon en tiu lando.

E-MOVADO EN IZRAELO

Laŭ informo de Nia Ligilo, revuo de Esperanto-Ligo en Izraelo, en Tel Aviv la Esperantista Klubo estas sufiĉe vigla. Preskaŭ ĉiudimanĉe okazas en la klubejo interesaj prelegoj kun diskutado de aŭskultantoj.



Pollanda junula esperantistaro en la unuamaja demonstracio en Jelenia Gora.

En UEA fondiĝis Fondajo de Azio-Afriko por akceli la disvastiĝon de Esperanto en tiuj kontinentoj. Per ĝi UEA volas unue eldoni vortarojn kaj lernolibrojn kun klarigoj en naciaj lingvoj de Azio kaj Afriko. Esperanto-Sinhala Vortareto estas la unua tia speco.

Por memori la 150-jaran datrevenon de la naskiĝo de la fama rusa verkisto eldoniĝis en Nederlando ĉijare la unua esperanta eldono de liaj noveloj "Bela" kaj "Tamenj". Ili estas tradukitaj de D. Staritzky.

Medicina Revuo konata de la medicinaj esperantistoj nun ŝanĝis sian titolon je Medicina Internacia Revuo kaj fariĝis oficiala organo de la Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). Ĝi aperas kiel antaŭe dufoje jare, kaj la redaktoro restas prof. D-ro Masao Suzuki en Japanio.



SUR NIA LIBRORETO

LA MORTO DE JANKIO — Novelaro de kvin vjetnamaj verkistoj, eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964, kun formato 13 × 19 cm. kaj p. 128.

En la novelaro estis kolektitaj sep noveloj, nome la Talismano, Tetfestoj en Familio, La Juĝdecido, La Morto de Jankio, La Bofilino, Konfidencoj de Instruistino kaj Antaŭvespere de la Tetfestoj en Drinkejo.

"La Morto de Jankio" priskribas kiel unu usona soldato de la aera forto venis al Sud-vjetnamio kun sento de supera raso kaj mastro, kaj volas laŭordone "balai" la teron de sud-vjetnama popolo. Li ĝuis la paf-potencon de la usona armeo sed nur momente. Tuj poste li jam fariĝis karb-ardaĵo kune kun sia helikoptero.

Tiu ĉi novelo ne estas la plej bona el la kolekto. Tamen la historieto de simpla usonano, kiu fariĝis instrumento de la usona imperiismo, kaj lin trafis la natura fino, montras la esencon de la nuna situacio de Sud-vjetnamio. Eble ĝuste pro tio la eldoninto titolis per ĝi la novelaron.

La aliaj noveloj rakontas aŭ la sorton de oficiro de la Diem-reĝimo, aŭ la kruelan subpremadon de tiu reĝimo al la sudvjetnama popolo, la solidarecon de la persekutataj popolanoj, la malamon

kaj la decidemon kontraŭ tiu reĝimo en la korfundo de etuloj, la malkontenton kaj la konsciigon de la subuloj de tiu reĝimo. Per la skiza bildo donita de ĝi oni panorame vidas la nunan Sudvjetnamion ankoraŭ sub la rego de la usonaj lakeoj.

"La Juĝdecido" verŝajne estas unu el la plej legindaj el la novelaro. Jen estas ĝia rakonto:

Bai, kiu partoprenis la rezistadon kontraŭ la Franca Ekspedicia Korpuso, fariĝis post la paciĝo sekreta policano de la Diem-reĝimo. Li estis ordonita gvati kaj kapti la personojn, kiuj ĉiutage purigis la tombejon de la falintaj gerilanoj kaj soldatoj en la rezistado kaj meti sur la tombojn freŝajn florojn. Por tio li eĉ trovis per pake-to da usona cigaredo kaj kelkaj moneroj mizeran knabeton Luoi kiel sian inform-donanton.

Iu-vespere Luoi informis ke oni purigos la tombejon je la deka vespere. Tamen li vane atendis en tiu vespero la "krimulojn". Ili faris siajn laborojn plifruo.

La sekvantan matenon, gvatsekvante paron de geamantoj ĉe la proksima marbordo li eniris sovaĝan densejon kaj tie li trovis mirigan scenon.

Luoi, la denunciisteto estis juĝata de aliaj kvin knabetoj. La juĝantoj pridemandis liajn sendisciplinajn agojn kaj de kie li akiris

la monon kaj la usonajn cigaredojn. Fine ili kondamnis tiun knabeton perfidulo kaj eksigis lin el sia grupo je la nomo de "la soldatoj de Onklo Ho".

Pli miriga estis tio, ke la ĉefjuĝanto estis neniu alia ol lia propra fileto Hok.

La sekreta policano ne plenumis sian devon. En tiu punkto li longe ne povis endormiĝi. Li rememoris sian kunbatalanton en la rezistado kontraŭ la Franca Ekspedicia Korpuso kaj la verdikton de lia filo kontraŭ la mizera knabeto Luoi: "Vi estas perfidulo".

Tiu rakonteto bone montris la ne-sklavigeblecon de la sud-vjetnama popolo kaj la neeviteblan ŝanceliĝon de la fundamento de la regado de usonaj lakeoj.

La novelaro estas leginda kaj legenda por ĉiuj. Pere de ĝi oni ne nur ĝuas la vjetnaman literaturon, sed ankaŭ komprenas la veran situacion de tiu mondparto.

Honfan

POLLANDO (1944-1964) — Informa libro pri Pollando, eldonita de pola ŝtata eldonejo "Polonia". Pli malgranda laŭ formato sed pli ampleksa laŭ enhavo ol la samtitola libro eldonita en 1959. Ĝi estas riĉe ilustrita kaj kun necesaj mapoj.

ESPERANTO? (eldiroj de eminentaj polaj intelektuloj) — En ĝi estas kolektitaj opinioj pri Esp-o de 18 sciencistoj kaj 18 verkistoj kaj artistoj de Pollando. Redaktita kun biografiaj notoj de la parolintoj kaj presita en Esperanto kaj la pola lingvo paralele.



Granda Lando, Laborema Popolo

Mi ŝatas artikolojn pri la vivo kaj verkoj de la grandaj ĉinaj saĝuloj kiel Ki Bajŝi, Caŭ Hjuekin de la "Songo de Buduaro", Ĝang Heng de la fama unua ter-trema montrilo, Li Daĝaŭ, Taŭ Juanming, k.a.

Mi ŝatas multege la mallongajn kaj legeblajn sciigojn de la rubrikoj "kurantaj aferoj", "ĉinaj humorajoj" kaj "Esperanto marŝas".

Kiel mi, tiel ankaŭ miaj amikoj ŝatas multe la multkolorajn bildojn, enmetitajn je la centraj paĝoj de la gazeto.

Mi ne povas montri artikolojn kiujn mi ne ŝatas, ĉar ĉiuj, kelkaj plie kelkaj malplie, parolas pri tiel granda lando kiel estas senlime interesa Ĉinio, pri tiel laborema popolo kiel estas la respektinda ĉina popolo.

V. Pistoli, Albanio

Tri Novaj Aferoj

Se temas pri la tria ĵus ricevita numero mi ankoraŭ ne tralegis ĝin entute, sed post atenta trarigardo mi rimarkis, ke estas en ĝi tri novaj aferoj ne nur atentindaj, sed ankaŭ tre laŭindaj, nome:

1) Ĉinaj proverboj (ankaŭ de Nacimalplimulto)

2) Kanto kun muziknotoj (Nia Bela Hingiang)

3) Nova rubriko: "Post la kurso" kun malgranda vortareto

Miaopinie tiuj tri aferoj estas tre taŭgaj kaj oni devas daŭrigi ilin kiel konstantajn rubrikojn.

Koncerne bildojn en EPĈ ĉefe kolorajn, mi konstatas nur, ke ili ĉiuj estas belegaj, pensigaj—precipe tiuj, kiuj estas lokigitaj sur la kovriloj. Ili altiras la okulojn ankaŭ de neesperantistoj.

S. Plachta, Pollando

Ankoraŭ dum Multaj Jaroj

Dank' al tiuj belaj gravuraĵoj oni povas uzi la ĵurnalon kiel propagandilon por neesperantistoj. Ilin alogas la bildoj. Plezure ili rigardas ilin kaj poste ili komencas provi la legadon kaj komprenas la facilecon kaj oportunecon de Esperanto.

Kompreneble ankaŭ la artikoloj plaĉas al mi, ĉefe tiuj kiuj havas sciencajn temojn. Mi pli ŝatas la ne tro longajn artikolojn.

Mi ĝojas trovi en la lasta ĵurnalo la rubrikon "Post la Kurso" kiun mi uzas por miaj lernantoj. Eble kelkaj abonos.

Finante mi tre gratulas vin kaj esperas, ke mi legos vian ĵurnalon ankoraŭ dum multaj jaroj.

J. Perra, Francio

Daŭrigu Kiel Ĝisnun

Laŭ mia opinio la revuo kontentige solvis sian taskon laŭ sia titolo: El Popola Ĉinio. Artikoloj kaj bildoj kondukas la leganton tra la multmiljara historio de Ĉinio kaj tiel lasas lin partopreni al antikva, mezepoka kaj nuntempa Ĉinio. Tiamaniere la leganto eksciis, ke Ĉinio naskigis eminentajn personojn, kiuj per siaj verkoj fekundigis la ĉinan kulturtrezoron. Literaturistoj kaj poetoj vivantaj en pasintaj kulturepokoj en siaj verkoj firmitenis la morojn, kutimojn, sed ankaŭ la suferojn kaj sopirojn de ĉinaj gentoj. Kun la venkinta revolucio komenciĝis nova paĝo de la ĉina historio. Artikoloj subtenataj de bildoj klarigas al la leganto la sukcesojn de la giganta luktado de la ĉina popolo. Idiliaj epizodoj el la vivo de ĉinoj estas en la artikoloj reproduktataj tiel vivece kvazaŭ la leganto mem ilin travivus.

Entute, la revuo estas bona, nenio riproĉinda estas en ĝi, do

daŭrigu la kompiladon tiel kiel ĝisnun.

H. Jepsen, DFR

Senriproĉaj kaj Mankoj

La koloraj bildoj en ĉiuj kajeroj estas tute senriproĉaj, eĉ ekstreme belaj kaj perfektaj! Ne la samon oni povas diri pri la bildoj blanke-nigraj. En iuj miaj kajeroj kelkaj estas nur malfacile kompreneblaj, ĉar la objektoj kaj personoj sur ili preskaŭ nedistingeblaj. Ties kaŭzo estas la ne tre taŭga papero por bildo-reproduktado. Se EPĈ estus presata sur tia papero, kia estas tiu de "Nuntempa Bulgario", nuna "Bulgario" aŭ almenaŭ sur tia, kiel "Hungara Vivo", la aspekto de la bildoreproduktadoj estus multe pli bela, pli perfekta.

La artikoloj, laŭ-ehave, estas ankaŭ senriproĉaj, por la okcidentaj legantoj ankaŭ tre instruaj, precipe por tiuj, kiuj vivas en landoj nesocialismaj. Sed ankaŭ ĉi-kampe ne la samon oni povas diri pri la lingva flanko de la artikoloj. En ili oftaj estas ĉinismoj, kiujn rimarki povas nur ni, legantoj neĉinaj. Almenaŭ mi ne povas klarigi al mi la senkialan saltadon el prezenco: as-tempo al preterito: is-tempo kaj inverse, aŭ el indikativo al kondicionalo: us-modo. Mi konsideras tion karakteriza trajto de la ĉina lingvo.

J.V. Dolinsky, ĈSSR

GRAVAJ KOREKTOJ

En la 6-a linio de la unua artikolo "Popola Ĉinio 15-jara" de lasta numero la vorto "burokratismo" devas esti "burokrat-kapitalismo". En la 3-a linio, maldekstre sur p. 246 de la sama numero la vorto "Sesdekdu-jara" devas esti "Sepdekdu-jara".

INDEKSO DE EPĈ 1964

(La titoloj kun “*” estas informoj el “Kurantaj Aferoj”)

SINTEZA:

Por nova venko en la nova jaro	3
Popola Ĉinio 15-jara	195

EKONOMIA KONSTRUADO:

La ĉina industrio de agrikulturaj maŝinoj	4
Elektro en kamparo	6
*La unua balen-ŝipo en Ĉinio	7
La mara transporto de Ĉinio	12
*Ligna plugilo malaperis en Tibeto	32
*La unua pomarbaro en Tibeto	33
En kvin jaroj	51
En la “malriĉa montvalo”	55
*Grandtipa tornilo produktita en Ĉinio	56
*Pli ol mil specoj de teksaĵoj	56
*20 mil irigaciaj konstruoj en Hunan-provinco	56
Ĉina merkato en prospero	58
*Verda murego kontraŭ dezerto	89
La nordokcidento de Ĉinio	99
Armeanoj — terkulturaj pioniroj	104
La “nokta foiro” de teknikaj kunlaboroj	109
Ĉe la bordoj de Jili-rivero	111
*Sesoble da novaj urboj	116
Nia vojo por industriigo	147
La naskiĝo de unu granda fabriko	152
“Fremdlanda oleo” — nomo arkaikiĝinta	156
La belaj trajtoj de Baŭrgaj-agrofarmo	160
*Nova internacia aerodromo en Ŝanhajo	183
En la dek kvin jaroj	198
Plej gravas la kvalito	204
Tri vojaĝoj tra la Granda Kanalo	210
*1400 novaj produktaĵoj	220
*Riĉa rikolto de fiŝkaptado	220
Surpostene	221
*Kor-pulma maŝino produktata en Ĉinio	265
*4,500 teknikaj plibonigoj	267
*Pli da traktoroj en la nordokcidento	267
*Erozio reduktita	267
*Riĉa rikolto de tritiko	275
*Sablo-ŝtormo bridita	275
Sur la monta ŝoseo	276
*Unuaj diplomitoj por dezert-konkero	297

KULTURO, SCIENCO, EDUKADO:

*Rekunigi manon fortranĉitan	32
*Pli da libroj venditaj en la kamparoj	32
*Gazeto por kamparaj gejunuloj	56
La altaj lernejoj en Pekino	66
*Novaj sukcesoj de kamparana sciencisto	68
*Subtropikaj plantoj en mezvarman regionon	68
La unua leciono	75

*La mongola lingvo vaste uzata	84
*Pliaj kulturaj laborantoj en la kamparon	84
*Inĝenieroj el laboristoj	103
La agronomiaj eksperimentoj en nia komunumo	114
*Filmo pri Ganefo	116
*Tibet-lingva telegrafo	116
*Man-alfabeto por surdmutuloj	116
*La unua ĉina kolegio de karbominista medicino	118
*Industrioj de naci-malplimultoj	129
*Esplorado pri la glaciigita tertavolo	129
*Nove trovita fosilio de simi-homo	129
*Nova informo pri la revivigita mano	161
*Antikvaj grotoj malkovritaj	179
*Perdita urbo retrovita	179
*Rara fosilio de antikvaj vertebruloj	180
*Scienca centro sur vasta paŝtejo	180
*Pli da laboristoj akiris fakajn sciojn	180
*Tutlanda kunveno pri sangaj malsanoj	183
La Han-lingva fonetika alfabeto en praktiko	212
*Libroj por mongolaj infanoj	215
*Nova terapio por toksa disenterio	220
*Giganta fosilio de dinosaŭro	231
Nova mejlŝtono de scienca disvolviĝo	263
*Esploroj pri kortbirdoj	265
*Nova kontribuo al fiŝbredado en lagoj	273
*Centro de tropikaj kreskaĵoj	275

LITERATURO, FILMO:

Nia nova buroestro (novelo)	27
Nova kanto sur Te-monto	28
Ĉaŭ Hjuekin — Granda verkisto de Ĉinio	31
“Songo de Buduaro” (filmo)	34
Rakontoj pri Afanti 39, 136, 185,	311
Legendo pri Marko	39
Iris li al Okcidento (kanto)	39
Pri la ĉinaj humuraĵoj	40
Pruntepreni azenon (humuraĵo)	40
Saĝa guberniestro (humuraĵo)	40
Ŝanĝo de ŝuoj (humuraĵo)	41
La novaj domoj de l' komunumo (poemo)	53
Lernad' en Nokto (poemo)	53
*Verkisto petas konsilojn de kamparanoj	68
Novaj atingoj de ĉina literaturo	69
La komunuma sekretario (novelo)	79
Kiam mi al la patrin' adiaŭis (poemo)	83
La krono de koko (fablo)	84
Kukolo (fablo)	85
Malĝojo de filo (humuraĵo)	89
Granda bedaŭro (humuraĵo)	89
Antaŭvido (humuraĵo)	89
*Novelaro por kamparanaj legantoj	89

*Popolaj komunumoj en filmo	89
*Nova poemaro de k-do Maŭ Zedong	103
Pleje dolĉa estas nia vivo (popolkanto)	108
Antaŭe kiam mi trapasis tien ĉi (popolkanto)	108
Sopiro al Pekino (popolkanto)	108
Proverboj	110, 115, 176, 236
Unua de majo! (poemo)	116
Alveno de majo (poemo)	116
La blanka velŝipeto	127
Tra la persikfloroj	130
Ŝafisto kaj lupoj (fablo)	137
Frukto-rikoltado (poemo)	159
Printempa pluvo (poemo)	159
Konkurse kun printempo	159
Kion diras la serpent-kaptisto	166
Fotado (novelo)	171
La tintileto	177
*Premioj por sciencaj kaj edukaj filmoj	183
Piedbato al azeno (anekdoto)	184
Mi estas zorgantino de la pumpmaŝino (poemo)	209
Vulpo, simio kaj aliaj (fablo)	237
Kiel mi komencis verki?	238
“La sekreto de la trezora lagenario”	243
Fazano kaj fajro (fablo)	252
Unua paŝo (novelo)	302
La perejo de la simio	307

ARTOJ, MUZIKO, K. S.

Bildaj paĝoj	
1-2, 23-26, 47-50, 71-74, 95-98, 119-122, 143-146, 167-170, 191-194, 225-228, 259-262, 289-292, 319-320	
Ki Bajŝi	20
*Arta ekspozicio pri komunumoj	129
Nia bela Hingiang	132
“Vojo, nia pen” kaj ĝia komponinto	162
*Studo de ĉina muziko	163
La pekina opero renoviĝas	200
Nova ardo en la pekinaj teatroj	279
Geaktoroj de la Pekina Opero parolas pri la Pekinaj Operoj kun modernaj temoj	282
Alia floro en la arto-bedo de Ĉinio	286

POPOLA VIVO:

*Budhista kunveno de dekunu aziaj landoj	7
30 jaroj sur Tongtian-rivero	14
En vilaĝo de la “nomada popolo”	16
*Ĝojo de antaŭaj kulioj	32
*Kresto de ŝparmono en la bankoj	32
*Studentoj de la naciaj malplimultoj en Gansu- provinco	33
*Pli kaj pli da funkciuloj el naciaj mal- plimultoj	33
*Nova ĝojo sur intern-mongolia stepo	55
La kinejoj en Ŝanhajo	77
*Longdistanca konkurso de kolomboj	89
*Infano vojaĝis sola aerplane	103
*Progreso de Jugur-nacio	118

*Nova evento de lamaismo	118
Ĝojo de maljuna tradukisto	125
Mirindaĵoj koncerne al mono	126
Mia ĝojo	154
Kuraca centro en paŝta regiono	157
Urĝsava taĉmento el vojaĝantoj	158
Filatelio en Ŝanhajo	164
*La lasta neatingita alta montpinto konkerita	179
*La unuaj lernantoj en montvaloj de Himalajo	181
*Tibeta ribelinto rehejmiĝis	181
*Kamparaj kluboj	183
*Pli ol 200 sanatorioj por laboristoj	183
*Islama Korban-festo en Pekino	183
Konkero de la 14-a plej alta monto neniam surgrimita	206
Avo Ŝercemulo	208
*Ĉiam pli multa provizo	215
Mi kreskas en la nova Ĉinio	219
Duafoja vivo	223
Kuraĝo	229
Juna ŝafistino	230
*Ekspozicio de novaj ludiloj	231
En la sklava vilaĝo	232
Dank’ al nia patrio	240
Muziko al fabrikoj kaj vilaĝoj	250
Sporto	251
*Kolomb-konkurso de 1,900 km.	265
La unua generacio de novaj kampanoj de Ĉinio	266
Ni estas jan-an-anoj	270
La pediatria aferoj en Ĉinio	293
En la familio de unu laboristo	296
*Elektraj lampoj en Tibeto	297
*Konferenco de blinduloj kaj surd-mutuloj	297
En montvilaĝeto	298
La fonto de la verkoj	301
*Nova vivo de golaŭ-oj	308
*Longdistanca naĝado	308
Kelkaj novaj rekordoj de la ĉina sporto en 1964 (sporto)	310

FUNDAMENTAJ SCIOJ:

Vejĉio	36, 88, 134, 179, 242, 309
La ĉina palaca lanterno	70
Ĝang Heng, ĉina astronomo antaŭ 1700 jaroj	86
300 specoj da fruktoj	115
La plej varma loko en Ĉinio	117
Li Daĝaŭ — iniciatinto de KPĈ	123
La metalsona arbo	129
Ĉina diablo	135
Letero al malproksimaj geamikoj	
.	136, 184, 252, 311
La origino de la nomo “ŝtonoleo”	156
Ŝtonleono antaŭ 1900 jaroj	165
Kuriozaĵo en la regno de plantoj	165
*Rapida kreska anaso	181
Pekino hieraŭ kaj hodiaŭ	216
*Bronza pezilo antaŭ 2,000 jaroj	231

Pekina opero	240
Kuriozaj floroj sur neĝmonto	241
Spektakloj de Ŝiŝa Pangma	299

*Unu plia U-2-aviadilo de Uson-Ĉiang-kliko faligita	220
Kial Pekino altiras min?	246
Japana amiko parolas pri medicino de Ĉinio	248
Japanaj negrandaj entreprenistoj pri Ĉinio	249
*Kondamno al masakro al budhistoj	250
*Afrikaj kreskaĵoj en Ĉinio	250

AMIKECO, PACO:

La sportkunveno de la nove emerĝantaj fortoj	8
*Poŝtmarkoj por la Unua Sportkunveno de la Nove Emerĝantaj Fortoj	11
Impresoj en Hiroŝima	18
*Landlima traktato inter Ĉinio kaj Afganio subskribita	32
*Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj vizitas amikajn landojn	54
*La ĉina popolo firme subtenas Panamon	55
Ĉinio faris grandiozan aferon	60
Ĉinio, paradizo sur la tero	64
*Teatraĵo kunludita de koreaj kaj ĉinaj aktoroj	89
Revido pri Ĉinio	131
Impresoj de Tanganjika ministro	181
Ke Malio havu sian sukeron	182
Subtenon al la vjetnama popolo en batalo kontraŭ la usona agresio!	196
Usono rompita la Ĝenevan Interkonsenton	196
Ĉinaj esperantistoj subtenas vjetnaman popolon	197

ESPERANTO K. A.:

Rememoroj pri ĉina E-movado	41
Esperanto marŝas	42, 91, 139, 186, 253, 312
Sur nia librobreto	43, 93, 140, 188, 254, 313
Skribas niaj legantoj	45, 90, 138, 188, 256, 314
Korespondi deziras	46, 94, 141, 189, 257, 318
Nova servo de Libroservo de ĈEL	64
La horloĝo ĉe Pekina stacidomo	65
Reklamoj	44, 45, 85, 90, 92, 318
Distra angulo	94, 142, 190, 258, 317
Nia vortareto	137, 186, 252, 311
Penseroj	222
Denove pri senpaga ekzemplero de nia gazeto al esperantistaj grupoj	258

ALDONO:

Tajĝiĉjuan — speco de ĉina korpoekzerco (n-ro 2)
 Sukcese eksplodis la unua a-bombo de Ĉinio
 Deklaro de la Ĉina Popola Respubliko

Distra Angulo

MISMONTADO

(LUDO POR KOLEKTIVO)

La partoprenantoj formu cirkon, kaj la gvidanto staru en ĝia mezo. Li iru antaŭ iun ajn kaj faru al li demandojn pri la korpopartoj al kiuj la demandito devas respondi. Demandante aŭ respondante oni ĉiam devas mismontri alian el siaj korpopartoj ol la temata, kaj ne povas ripeti la samon. Ekzemple, se montrante sian nazon la gvidanto demandas: "Ĉu tio estas buŝo?" La demandito devas tuj respondi montrante alian organon ol la buŝo, ekzemple sian okulon: "Ne, tio estas orelo." Kiu respondas tro malrapide aŭ erare, ricevas punon.

TIA MEZURO

Iu demandis al Johnson la prezidanto de Usono: "Kial la usonaj

militŝipoj invadis en la 2-a de aŭgusto, la maron de la Vjetnama Demokratia Respubliko?"

"Ne, neniam. Ĉiuj niaj ŝipoj veturis nur 12 colojn for de la usona marbordo," diris Johnson levante la ŝultrojn kaj disetendante la manojn.

"Kiel tio povas esti! Ili ja estas en la maro de la Vjetnama Demokratia Respubliko."

"Ne. Mi mem konstatis per pramano mezurado, ke ili estas nur 12 colojn for de la usona marbordo."

"Ha! Kiel do vi mezuris?"

"Mi tion faris per mezurilo sur la globuso."

"Tia mezuro!"

LOGIKO DE MALLABOREMULO

"He! Kial vi prenas nur du brikojn ĉiufoje dum la aliaj po kvar?"

"Ĉar mallaboremuloj ili estas."
 "Mallaboremuloj!?"
 "Jes ja, ili malemas iradi."

SOLVO

al nia rakonto-enigmo: "Tri Saĝuloj" (p. 258 de EPĈ n-ro 5, 1964)

Tiu saĝulo rezonis jene: "Nun vidiĝas du nigraj ĉapoj antaŭ mi. Se la ĉapo kiun mi portas estus blanka, la dua saĝulo vidus ke antaŭ li estas unu nigra kaj unu blanka ĉapoj, kaj sekve li pensus: Se ankaŭ la mia estus blanka, la tria saĝulo tuj dirus ke lia ĉapo estas nigra, vidinte antaŭ si du blankajn ĉapojn. Se li ne povis juĝi, do mi asertu, ke la mia estas nigra. Sed nun ili ambaŭ silentas. Evidente, ankaŭ mia ĉapo estas nigra."

Malalta prezo kaj bela donaco
por abonantoj de

El Popola Ĉinio, 1965

la sola informriĉa, multe ilustrita
kaj bela Esperanta gazeto el Ĉinio

ABONPREZO: por unu jaro £0-5-0, 2.50 gld.
por du jaroj £0-7-6, 3.80 gld.
por tri jaroj £0-10-0, 5.00 gld.

DONACOJ:

1. Por ĉiuj abonantoj
Grandformata multkolora presita **ESPERANTA
KALENDARO, 1965** en 12 folioj kun belaj
bildoj
2. Por ĉiuj varbantoj
16 KOVERTOJ KAJ 32 LETERPAPEROJ kun
ĉinstilaj pentraĵoj

LIMTEMPO:

de 1 okt. 1964
ĝis 31 jan. 1965

REKOMENDU al ni viajn amikojn (kun
adr.), kiuj ankoraŭ ne scias pri EPĈ, por
ke ni sendu al ili senpagajn specimenojn.

Abonu ĉe niaj perantoj en
via lando aŭ rekte ĉe ni.

Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Korespondi Deziras

*S-ro Genĉo Genĉev, str. D. Blagoev, N-ro 15A, Sofia, Bulgario, pri juraj aferoj.

*S-ino Vesela Ivanova Geneva, str. P. Volov, N-ro 21, Sofia, Bulgario, pri literaturaj demandoj.

*Valerij Masliĥov, USSR, Altajo, Varnaul-17, dez. kor. kaj interŝ. pm. pk. ktp.

*Hans Floessbeck, Bonn on/Rhein, Poŝtfako, Mozartstr. 49, dez. kor. pri temoj socialaj, kulturaj, popolmedicinaj, ktp.

*S-ano Uut Medema, 40-jara fraŭlo, Wapenvelderkerkweg 10a, Heerde, Nederlando, dez. kor. kun ges-anoj el Azio, Afriko, Sud-Ameriko kaj Kubo pri ĉiuj temoj.

*Marin Genĉev, str. "Sejnovno" No. 18, Pleven, Bulgario, kun ĉl. pri ĉt. kaj interŝ. pk. k.a.

*Chiritescu Vasile, str. Cõtita No 2, Cluj, Rumanio, dez. kor. kaj interŝ. pm. kun ĉl.

*Lavrik Vina, g. Rostov-na-Donu-33, ul. Magnitogorskaja 43, USSR.

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata gazeto eldonita de
ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 6 (89) 1964

Ĉefa Enhavo

Bildo sur la kovrilo — Kampa-
rana agronomo Ĉen Jongkang
Foto de Sun Kiaŭŝen

Nova Mejlŝtono de Scienca Dis-
volvigo

La Unua Generacio de Novaj
Kampanoj de Ĉinio

Ni Estas Jan-an-anoj

Nova Kontribuo al Fisbredado
en Lagoj

Sur la Monta Ŝoseo

Nova Ardo en la Pekinaj Teatroj
Geaktoroj de la Pekina Opero
Parolas pri Pekinaj Operoj kun
Modernaj Temoj

Alia Floro en la Arto-bedo de
Ĉinio

La Pediatriaĵ Aferoj en Ĉinio
En la Familio de Unu Laboristo
En Montvilaĝeto

Spektakloj de Ŝiŝa Pangma

La Fonto de la Verkoj

Unua Paŝo (Novelo)

La Pereo de la Simio

Veĵcio

Kelkaj Novaj Rekordoj de la
Ĉina Sporto en 1964 (Sporto)

Post la Kurso

Esperanto Marŝas

Sur Nia Librobreto

Skribas Niaj Legantoj

Bildo sur dorskovrilo — Te-folia
Kolektado

Foto de Ĵen Ŝijen

ALDONO:

Sukcese Eksplodis la Unua A-
bombo de Ĉinio

Deklaro de la Ĉina Popola
Respubliko





La Monto Huangšan en Argenta Kostumo.

Foto de Niu Songlin



世界新聞「人民中國報道」雙月刊一九六四年第六期（本刊代號：二一九一五）